

Beletra Edeno

neregula beletra bit-revuo n-ro 10 (novembro 2024)



Ĉiuj kontribuoj estas bonvenaj.

Redaktis Vejdo (vejdo@163.com)

Kontribuis Hong Jia, Laimundas Abromas, Yin Jiabin, Juan Trepiana, Wang Chongfang, Liu Mingbai, Lin Leming, Nan Mu, Dorothea kaj Hans-Georg Kaiser, Bardhyl Selimi, Minosun, Vejdo, Mikaelo Bronštejn, Rita Mkrťčan, Tiberio Madonna, Maria Nazaré Laroca, Lily, Yi Qiao, Rovere Emanuele, Guozhu, Luiza Carol, John Huang

AI-ilustris John Huang, karikatur-esperantigis Paula Ad úriz

Enhavo

Originala prozo

| | |
|---|-----|
| Hong Jia: Post akcidento..... | 003 |
| Laimundas Abromas: Adamĉjo..... | 006 |
| Yin Jiaxin: Mia najbaro Olda Zhang..... | 011 |
| Juan Trepiana: Ŝia rideto..... | 015 |

Tradukita prozo

| | |
|--|-----|
| Ridemulo el Nanling: Jin Ping Mei aŭ Oro, Vazo, Umefloro (trad. Wang Chongfang)..... | 017 |
| Feng Jicai: Grasulo kaj malgrasulo (trad. Liu Mingbai)..... | 069 |
| Guy de Maupassant: Adventuroj de Walter Schnaffs (trad. Leming Lin) | 071 |
| Cai Nan: La urbo sen birdoj (trad. Nan Mu) | 077 |
| Fratoj Grimm: Tri ŝpinistinoj k.a. (trad. Dorothea kaj Hans-Georg Kaiser)..... | 079 |
| Iljet Aliĉka: Vilaĝa historio (trad. Bardhyl Selimi)..... | 087 |
| Gan Bao: Dong Yong k.a. (trad. Minosun)..... | 092 |
| Chiung Yao: En profunda korto (10) (trad. Vejdo)..... | 094 |

Originala poezio

| | |
|--|-----|
| Mikaelo Bronŝtejn: La lasta tago de aŭgusto..... | 102 |
| Rita Mkrťejan: Ni estas tre proksime..... | 104 |
| Tiberio Madonna: Promeno tra la jaro..... | 106 |
| Maria Nazaré Laroca: Olea lampo k.a..... | 110 |
| Vejdo: Edzo fariĝis kapro..... | 113 |
| Lily: Doloro post seksatenciteco..... | 115 |
| Yi Qiao: Somnambulado en koŝmaro k.a..... | 120 |

Tradukita poezio

| | |
|--|-----|
| Zang Kejia: Kio estas la popolo? k.a. (trad. Minosun)..... | 123 |
| Rovere Emanüele: Kvin kanttekstoj (trad. Rovere Emanüele)..... | 125 |
| Wang Wei: Dek ok poemoj (trad. Guozhu)..... | 129 |

Teatro

| | |
|---------------------------------|-----|
| Luiza Carol: Malnaskiĝtago..... | 137 |
|---------------------------------|-----|

Artikolo kaj eseo

| | |
|--|-----|
| John Huang: Turisma vojaĝo tra Tanzanio (2)..... | 140 |
|--|-----|



John Huang, prezidanto de internacia Komerca kaj Ekonomia Federacio (IKEF) nordamerika, ĉefredaktoro de la revuo "La Merkato", estas ĉina-kanada esperantisto kaj komercisto. Li estas la oficiala fotisto por du sinsekvaj Universalaj Kongresoj en 2022 kaj 2024. Li esperantistiĝis jam en la 1980-aj jaroj kaj aktive partoprenis multajn Esperanto-agadojn en la sekvaj jardekoj.



Karikaturoj desegnitaj de **Paula Adúriz** (Hispanio)

Foto sur la kovrilo: ludantaj grandaj pandoj en la bazo de grandaj pandoj en Chengdu, Sichuan-provinco, Ĉinio

Hong Jia (Ĉinio)

Post akcidento

La edzo de Chen Lan laboris en ŝtonminejo. Antaŭ kelkaj tagoj, kiam li hejmeniris rajdante sur motorbiciklo en profunda nokto, li falmortis de sur la vojo de la alta montklifo, kune kun sia motorbiciklo. En funebro Chen Lan post enterigon de sia edzo ekvivis malfacilan vivon kun sia filineto.

Post kelkaj tagoj viro, kiu nomis sin kolego de ŝia edzo, venis al ŝia hejmo por vizito. Portante skatolon da lakto kaj pakaĵo da kukoj, li diris, “Saluton, bofranĵo! Mi nomiĝas Ma San. Mi sentas doloron en la koro pro la morto de via edzo. Hodiaŭ mi venas redoni la monon, kiun li pruntedonis al mi antaŭ unu monato. Ne riproĉu min pro la malfrua redono de mono. Lastatempe mi estas multokupita kaj nur hodiaŭ mi ekhavas liberan tempon.”

Aŭdinte “monon”, ŝi eksentis korpremiĝon. Vere mankas al ŝi mono. Por aranĝi la funebraĵon de sia edzo ŝi jam forkonsumis eĉ la ŝparitan monon, kaj plie la trafika policano diris, ke nenia kompenso doniĝos pro la morto de ŝia edzo, ĉar li rajdis motorbiciklon pro drinkado de alkoholaĵo.

Kiam ŝi pretis malfermi la buŝon por diri ion, ŝia filineto aliris kaj gapis al la pakaĵon da kukoj. Vidinte ŝian malgrasan filineton, Ma San kompateme donis la pakaĵon al la filineto. Tuj poste li elpoŝigis stakon da monbiletoj kaj enmanigis ĝin al ŝi, dirante, “Ĉi tio estas la mono plus interezo, kiun mi prunteprenis de via edzo.” Preninte la monon, ŝi diris, “Do mi serĉu la kvitancon skribitan de vi, kiam vi prunteprenis la monon.” Pro tio ŝi fosis en ĉiuj tirkestoj por trovi la kvitancon, sed ŝi ne sukcesis trovi ĝin. Kun bedaŭro ŝi diris, “Pardonon. Mi ne trovis la kvitancon. Do mi skribu ricevateston, ĉu bone?”

“Nenecese, nenecese,” li haste diris. “Mi kredas vin, bofranĵo.”

Post pliaj kelkaj tagoj Ma San refoje venis al ŝia hejmo. Li elprenis stakon da monbiletoj el sia sako, dirante, “Ĉi tio estas la mono kolektita inter la kolegoj, kiuj volis esprimi konsolon al vi. Mi reprezentas ilin kunporti ĉi monon. Akceptu ĝin, mi petas.”

Post iom da rifuzemo ŝi akceptis la monon.

Pli ol tio li eĉ proponis, ke li trovos laboron en la ŝtonminejo por ŝi. Kun dankemaj larmoj ŝi prenis lin je la mano kaj plorsingultis.

La sekvan tagon Chen Lan konfidis sian filineton al siaj gepatroj kaj ŝi eklaboris en la superbazaro, kiun Ma San rekomendis al ŝi. Post nelonge li diris al ŝi, ke li volos forlasi la ŝtonminejon kaj perlabori per instalado de elektraj aparatoj kune kun

kelkaj kolegoj. La kelkfoja kontaktado igis, ke ili ambaŭ fariĝis pli kaj pli familiaraj.

Kiam ŝia naskiĝtago alvenis, ŝi preparis kelkajn pladojn kaj invitis lin por manĝo. Dum manĝado ŝi demetis haŝiojn kaj ekploris, murmurante, “Kiel korŝira, mia edzo...”

Ma San silentis longan tempon. Li elsuĉis kelkajn plenbuŝojn da alkoholaĵo kaj diris, “Bofranjo, fakte mi respondecas pri la morto de via edzo.”

Okazis, ke tiun nokton Ma San drinkis multe da alkoholaĵo pro io ĉagrena kaj stiris kamionon cele al la ŝtonminejo. Kiam li malklarmense ŝoforis la veturilon antaŭen, blindiga lumo fulmis antaŭ liaj okuloj. Tiam li tuj sobriĝis de la ebriceo kaj volis bremsi la kamionon, sed pro la glitiga montvojo en pluva vetero, li malsukcesis regi la veturilon kaj ĝi frapiĝis kontraŭ la motorbiciklo de ŝia edzo. Kiam Ma San malfermis siajn okulojn en paniko, li nur vidis, ke lia motorbiciklo sin ĵetis flanken kaj ruliĝis suben de la monto. Timante, ke li estos punita pro la trafika akcidento, Ma San eĉ eskapis anstataŭ fari savadon aŭ telefoni al la polico. La sekvan matenon, kiam Ma San aŭskultis la elsendon pri la akcidento, li sentis kulpenton. Li decidis trovi lian familion kaj kompensi liajn familianojn per iom da mono. Kaj fine li trovis lian edzinon.

Aŭskultinte lian rakontadon, Chen Lan diris nenion. Ŝi restis silenta longan tempon. Preninte grandajn glutojn da alkoholaĵo, ŝi falis en profundan dormon. Kiam ŝi vekigis, ŝi trovis sin kuŝanta kviete sur la lito. Kaj Ma San malaperis jam frue.

De tiam Ma San neniel respondis al la telefonvokoj de Chen Lan kaj ŝi iris al lia luita domo por informiĝi pri li, sed liaj samlokanoj diris, ke li jam reiris al la naskovilaĝo. Aŭdinte tion, ŝi eligis suspiron.

Fakte, kiam li venis, dirante, ke li redonas la monon, ŝi jam naskis suspekton, ĉar ŝi konis sian edzon, kiu ŝatis drinkadon kaj hazardludon. Kaj lia salajro tute disipiĝis por alkoholaĵo kaj hazardludo. Li eĉ ne povis pagi la lernejan kotizon de la filineto. Ĉu li povus pruntedoni monon al aliaj? Post la duafoja vizito de Ma San, ŝi renkontis konaton, kiu laboris en la ŝtonminejo, kaj informiĝis ke Ma San tute ne laboris tie. Pro tio ŝi preskaŭ sciigis pri la tuta afero. Sed ŝi konsideris, ke li estas honestulo kaj li senintence kaŭzis la akcidenton.

Post unu monato Ma San memvole sin turnis al ŝi per telefonvoko. Li diris, “Bofranjo Chen, tio eble estas karmo, ke mia kruro rompiĝis...” Okazis, ke dum ĉi tiuj tagoj li perlaboris por vivteno. Pro mispaŝo li falis de sur la skafaldo kaj rompis al si la kruron. Ĉar li ne povis piediri, oni reportis lin al la antaŭa luita domo. Pro tio, ke liaj kolegoj ne povis zorgi pri li, li do sin turnis al Chen Lan.

Kun brula maltrankvilo ŝi tuj hastis al la luita domo. Sidante sur la litrando, ŝi diris, “Fraĉjo Ma, tiun tagon, kiam ni festis mian naskiĝtagon, mi ploris pro tio, ke mi vivis dek jarojn kun la mortinta edzo, li tamen ne donis eĉ unu naskiĝtagon manĝon

al mi. Mi konsideris, ke vi estas bonulo. Mi dankas vin pro tio, kion vi faris por mi.”

Suspirinte, li mallaŭte diris, “Mi estas kulpa. Mi devas min denunci al la polico.”

Tamen Chen Lan replikis, “Ne, ne. Mi vere estas kulpa.”

Ŝia edzo havis brutalan temperamenton. Li emis bati siajn edzinon kaj filineton per pugno kaj piedoj ofte senmotive. Chen Lan diris plorante, “Ne gravas, ke li batas min, sed li ne devus malbone trakti mian filineton. La antaŭan vesperon antaŭ lia akcidento li batis min ĝis sveno. Kiam mi vekigis, mi trovis, ke li metis la filineton en la bankuvon plenan de malvarma akvo, ne lasante al ŝi eliri el la bankuvo, nur pro tio, ke, vidinte lin bati min ĝis sveno, ŝi forte mordis lian manon. En tia frosta vetero, se mi vekigus pli malfrue, ŝi certe mortus de frosto. Ĉu li estis bestia kiel besto? Pro tio mi frotrompis la bremsan fadenon de lia motorbiciklo...”

Ma San estis tiel surprizite, ke li ne povis eligi unu vorton. Post iom da tempo li diris kun suspiro, “Do vi finfine liberigas de tia brutala homo. Tiu, kiu batas virinon kaj infanon, ne estas kalkulata kiel bona viro. kaj meritas mortpunon!” Ili rigardis vidalvide kaj brakumis unu la alian sub instigo de amsento kaŝita en la koro.

Post nelonge ili geedziĝis kaj komencis feliĉan kaj harmonian vivon. Tamen Chen Lan kovis sekreton kaŝitan de Ma San: tiun tagon, kiam ŝi volis frotodifekti la bremsan fadenon de la motorbiciklo de sia edzo, ŝi hezitis kaj fine ne faris tion. Kiam ŝi diris al Ma San, ke ŝi estas kulpa, li vere volis malpliigi lian memproĉon.

Sed ekster ŝia atendo, tiun nokton antaŭ unu jaro, lia kamiono vere ne frapiĝis kontraŭ la motorbiciklo de ŝia edzo. Tiam ankaŭ Ma San dronis en ebria stato. Kiam li vidis la lamplumon de la motorbiciklo, li tuj bremsis la kamionon ĝustatempe. Tamen pro malluma nokto kaj pluva vetero, la motorbiciklo glitis de sur la montklifo kaj ŝia edzo perdis la vivon. *



esperantigita de **Paula Adúriz** (Hispanio)

Laimundas Abromas (Litovio)



Adamĉjo

Jen, li venas, malsupreniras laŭ Parodos-strato, preter la parko Vitauto. Kaj ne gravas, kien li nun turnos sin – dekstren aŭ maldekstren. Tutegale baldaŭ per etaj paŝetoj li atingos Laisve-avenueon. Li laŭlonge trairos ĝin kaj venos en la straton Vilniaus, iros ankoraŭ cent paŝojn kaj ĉe la angulo

aŭtoro, Laimundas Abromas

de la strato Zamenhof li por momento haltos.

Ĉu indas de Ĵaliakalnis malsupreniri perpiede al Senamiestis nur por trinki bieron aŭ kafon, iom fumi kaj simple sidi kun ŝajne konataj homoj? Adamĉjo posedas maron da libera tempo, eĉ oceanojn, pro tio li ĉiam piediras. Kien li rapidu, kial? Li ĉiam trairas Zamenhof-straton, ĝi estas kurta, mallarĝa kaj kurba, kiel multaj stratoj de la malnova urboparto.

En Zamenhof-strato, ĉe la domo, numero kvin, li por kelkaj minutoj haltas. De malproksime tiu domo allogas Adamĉjon pro la mistero. De malproksime vidiĝas, ke tiu domo estas eksterordinara. Kaj vere tiun domon ŝirmas la sekretoj por neniu travideblaj. Adamĉjo rememoras, kiam li eniris tiun misteran domon unuan fojon. Tio okazis antaŭ multaj jaroj. Ĉi tie li eksciis pri Esperanto, lernis ĝin. Li bone memoras, kiel en tiu domo furoris aktiva esperantista agado. Kiom da interesaj, impresaj vesperoj li pasigis ĉi tie kun samideanoj? Multe da famaj esperantistoj venis ĉi tien de malproksimaj landoj... Ho ve! Dum multaj jaroj tiu domo estas forlasita, neglektita...

Adamĉjo returniĝas kaj revenas al Vilniaus-strato. Li venas ĉi tien, venas li ĉiam sola, ĉiam kun kurte pritonditaj haroj, kaj vestinta tiun saman eksmodan pantalonon. Se iu pensas, ke Adamĉjo stultas, duonsaĝas aŭ simple estas gapulo, tiu tre eraras, ĉar por neniu kategorio li taŭgas. Diablo scias, kio kaŝas sin ekster lia humila rideto. Tamen ankaŭ neniu opinias lin saĝa. Liaj konatuloj ne kontraŭas kaj permesas al li apude sidi, fojfoje aĉetas al li bieron.

Mi neniam vidis Adamĉjon tro eldrinkintan. Li neniam provokis, neniam ekscitis la homojn proksime sidantajn, kiel tion faras liaj konatuloj, kuntrinkantoj. Nu, se ili ne alkoĉiĝas al tiuj homoj, proksime sidantaj, do almenaŭ per fia vorto akompanas

tiujn, ekkrias ion tute sensencan, absurdan.

Adamĉjo ne kondutas tiele. Se li eltrinkas du-tri bokaletojn da biero, li neniam falas de sur la seĝo, kiel liaj kuntrinkantoj. Tiuj, falinte surplanken, insultas diablon kaj ĉiujn ĉirkaŭe

Mi vidis lin sur la benko en Laisve-avenuo solsole sidantan dum malfrua oktobra vespero. Mi vidis lin irantan kaj per la blovspirado varmigantan la manojn, kiuj eterne ruĝis pro la frosto. Mi vidis lin en multaj kafejoj kaj bierejoj de Senamiestis, sed neniam vidis lin ebriiĝintan. Ankaŭ rapidantan. Li iras ĉiam per tia sama ŝparema paŝo, la kapon iomete kliniginte sur la dekstran ŝultron, kvazaŭ dezirante ion pli bone ekvidi. Jaketo lia estas tiu sama – verda, kun grandaj poŝoj. Ĝuste tiun jaketon vestintan mi memoras lin. Ĉu nur memoras? Pro kio? Ja Adamĉjo pli viglas ol viva –li ĉiam paŝas kaj paŝas en tiuj samaj stratoj, tiuj samaj kortoj, tra kiuj oni povas veni en la aliajn flankstratojn. Li posedas kvazaŭ propran fermitan itineron, kies „kontrolaj punktoj“ estas tiuj etaj kafejoj kaj bierejoj.



Estis tempo, kiam mi, iomete pli longe forestinte en la urbo, denove revenadis ĝin. La unua mia konatulo, kiun mi plej ofte renkontadis, estis Adamĉjo. Li kutime aliradis min kaj petis cigaredon aŭ kvindecndan moneron, neniam pli. Kaj ŝajnis al mi, ke la urbo ne ŝanĝiĝis tute, ĉio restis tiel, kiel estis pli frue. Oni povis pensi, ke, malgraŭ ĉio, estas io eterna kaj konstanta. Kaj eĉ tiu Adamĉjo. Kion mi rememoras ankoraŭ el tiuj renkontiĝoj kun li? Do, jen. Foje li aliris min (pro kio min?

eble pro tio, ke mi ankaŭ iam lernis Esperanton), kaj per intima voĉo demandis: „Ĥej, diru al mi, ĉu vi aŭdis tiun kanton „La kri““. Certe, mi aŭdis ĝin kaj Adamĉjo, tre kontenta pro la respondo, forpaŝis laŭ sia vojo. Ekde tiu momento kaj mi fojfoje demandas lin: „Ĉu vi ankoraŭ memoras „La kri““?. Li ĉiam plezure ekridetas, eĉ sereniĝas kaj kapjesas.

Interalie, okazas, ke malofte mi renkontas la konatan personon. Kaj, renkontinte lin, ni plenumas kvazaŭ iun riton. Anstataŭ diri „Kiel vi fartas?“ aŭ ion similan, ni diras ion konatan nur al li unu, almenaŭ ion sensignifan kaj stultan. Renkontinte unu la alian ni interparoladas serioze kaj pri nenio. Poste, adiaŭante, ni unu al alia diras: „Ĝis la revido inter la vivantoj“!. En tiuj vortoj, (ĉu nur ni duope tiel pensis?) estis kaŝita almenaŭ guteto da nigra humuro, eble pro tio al ni plaĉis tiel adiaŭi. Kiam mi renkontas surstrate Adamĉjon, mi de malproksime ekkrias: „Kiel agrablas vidi vin! Estu salutata inter la vivantoj“!. Tamen tiu nigra humuro en tiuj ĉi vortoj, pro io nekomprenebla, ne plu restis. Ĝenerale restis neniu humuro.

Tamen Adamĉjo ĉiam ekridetas, kvazaŭ garantianta ŝajnan kontinuaĵon, iluzion, ke la tempo iam scipovas ekhalti surloke. Pensado pri la tempo, ĝia senco, relativeco, mem esenco de tempo, oni povas diri, pereigis Adamĉjon. Tamen ĉu pereigis? Eble ne pereigis lin, eble nur permesis al li iĝi tia, kia li volis esti? Ĉu li malplibonas, malpli feliĉas, ol tiuj sklavoj de la vino kaj biero? Se oni serioze pripensas, oni vidas, ke Adamĉjo estas feliĉa. Ĉar li koleras kontraŭ neniu, li ne luktas por io, li ne sentas envion kaj koleron. Ĉu vere? Eble li sentas?

Iam mi vidis lin en la kafejo kune kun alta, simpatia fraŭlino. Adamĉjo ŝajnis feliĉa, ili ion vikle preparolis. Li min, kompreneble, ne rimarkis. Ĉu intence? Sed poste mi neniam rimarkis Adamĉjon kun tiu fraŭlino. Li restis unu kaj sola, kiel antaŭe. Mi ne demandis lin, kie estas lia amikino? Nur iam poste Tadeo elbabilis, malkaŝis la sekreton, ke amikino de Adamĉjo jam delonge loĝas en Venecio. Tien veturigis ŝin iu italo samideano, veninta Litovion al Kaŭnas geedziĝcele. Do jen kiel okazis. Tiu sama tempo, kompreneble, kuracis ĉiujn korvundojn de Adamĉjo. Kaj li plu vizitadas la kafejojn kaj bierejojn de Senamiestis, malsekante en la pluvo kaj frostiĝante vintre. Ĉiam tiel same vestinta, ĉiam sen gantoj kaj kun ruĝaj kondiloj.

Ĉu tutan tempon Adamĉjo estis tia? Certe ne! Jen ĉi tie kaŝas sin tiu mallonga kaj eble ne tre interesa historio pri la senco de la tempo. Historio, kiu ruinigis (ĉu vere ruinigis?) lian normalan vivon. Iam Adamĉjo tre bone lernis kaj finis mezgradan lernejon per ora medalo kaj rajtis ekstudi en iu ajn supera lernejo. Sed li elektis fizikon kiel studobjekton en la universitato. Neniu miris, ke li du unuajn kursojn finis tre bone, kun plej altaj poentoj.

Iun tagon, promenante tra la urbo, Adamĉjo rimarkis allogan afiŝon. Oni invitis al publika prelego pri internacia lingvo, okazonta en la sidejo de Esperanto Asocio.

Oni ja soifas pri ĉio nova. Scivole li partoprenis tiun ĉi prelegon por varbi homojn por Esperanto-kurso. Tiu prelego iugrade lin impresis, ĉar li aŭdis ion novan, ion nekonatan. Instruisto interese parolis, multe laŭdis Esperanton, ĝian valoron, kulturon kaj internan ideon. La afero kaptis lin ĝisfunde. Adamĉjo komencis deflankiĝi de samkursanoj, rifuzis universitatajn aranĝojn. Li multe legis pri Esperanto kaj en Esperanto. Komence la kapablan studenton ĉiuj ne kolere nur primokis, sed iom poste maltrankviliĝis eĉ profesoroj. Oni jam parolis, ke en lia kapo ne ĉio hejmas, ke en lia kapo mankas klapo. Tamen neniu volis perdi plej bonan studenton.

Adamĉjo neniam konflikteis, nur ridetis –pardoneme kaj neofendante. Li ne parolis pri Esperanto, ne koleris kontraŭ primokantoj, li ne ŝajnis esti profeto aŭ io alia. Unutage li ĉesis viziti lekciojn en universitato. Al ĉikanemuloj Adamĉjo ripetadis, ke lia vojo estas alia kaj petis, ke neniu malhelpu lin. Li forlasis universitaton. Neniu interesis lin, krom la interna ideo, interpopola amikeco, kio nestis en lia kapo. Multaj pensis, ke Adamĉjo pro siaj libroj simple freneziĝis kaj penis forgesi lin.

Li provis labori. Komence li pretiĝis abiturientojn por la ekzameno de fiziko. Poste li laboris en malsanulejo kiel flegisto, deĵoranto en lernejo, gardisto en tenejo de hejtmaterialoj kaj ankoraŭ ie. Tamen li nenie alkonformiĝis — en tiuj laboroj ankaŭ validis propraj reguloj, leĝoj kaj kutimoj. Adamĉjo neniujn devojn atentis, pro tio lin baldaŭ oni forpeladis. Tiam li komencis vagabondi tra la urbo kaj vizitadi kafejojn. La novaj konatuloj de Adamĉjo, kun kiuj li konatiĝis en tiuj kafejoj, ne ignoris lin kaj ne priridis liajn strangecojn. Ili ĉiuj iom strangis — iuj estis kun longaj haroj, dum multaj tagoj ili faris nenion. Verdire, iuj versis. Adamĉjon neniu forpeladis, iuj eĉ regalis lin per kafo aŭ biero. Liaj konatuloj instruis lin fumi, drinki vinon, instruis lin miri pri nenio, instruis lin kiel elturniĝi trafinte en policejon kaj iujn aliajn etajn ruzaĵojn. Baldaŭ ili ĉesis atenti Adamĉjon—li komencis tedi al ili. Adamĉjo, kompreneble, ankaŭ iom disreviĝis pri ili, sed ne tiom, por ke deflankiĝi.

Inter tiuj ŝajnaj gekonatuloj estis ankaŭ kelkaj fraŭlinoj-belulinoj, tamen malordemaj, malpuraj. Iujn el ili Adamĉjo ĝis nun memoras: Smilga, Ofelia, Krizantemo, Mirta, Finka.

Somere Adamĉjo plej ofte preferis la kafejojn „Randevu“ kaj „La oka mejlo“, kiuj troviĝas proksime unu al alia en Senamiestis. Ili estis haveno por ĵurnalistoj, artistoj, verkistoj, vagabondoj kaj aliaj. Adamĉjo aperadis ĉi tie kelkfoje dum la tago, sed kiam li foriradis, neniu lin rimarkis. Kiam li denove revenadis, eĉ neniu demandis, kie li forestis. Sed kiam Adamĉjo malaperis por tuta monato, iu pro la enuo malfermis la buŝon kaj elvoĉis —, sed kie estas nia „kromĉaro““.

Maturiĝis somerfino. Pro la varmo la stratoj de urbo malpleniĝis. Ĉiuj loĝantoj kaŝis sin en la ombro aŭ subtegmente. Unu tagon Smilga alportis novaĵon: en la urbo

aperis Adamĉjo. Ŝi ekvidis lin ĉe angulo de la stratoj Vilniaus kaj Zamenhofo. Multaj konatuloj jam apenaŭ memoris lin.

Kaj jen „Randevu“-kafejon eniris Adamĉjo. Li rimarkis kelkajn konatajn vizaĝojn kaj direktis sin rekte al ili. Li sidigis apude, kvazaŭ nenie estis forestinta, kaj mendis tason da kafo. Kompreneble, iu scivolis kaj demandis, kie li dum tuta monato vagabondis. Adamĉjo gustumis kafon, profunde enspiris, iomete pensis kaj komencis rakonti. Iuj eĉ ne aŭskultis, kion li rakontis kaj, verdire, li ne multe rakontis.

Do, unumatene, kun sunleviĝo li forlasis urbon Kaunas kaj direktis sin suden. Adamĉjo iris perpiede, sur nudajn ŝultrojn vestinte malnovan peltaĵon kaj surŝultren metinte ŝtofanan saketon. En la saketo estis la pano kaj „Fundamento“. Enmane li tenis bastonon por defendi sin kontraŭ la hundoj kaj apogi sin laciĝinte. Dormis li subĉiele, volvante sin en malnovan peltaĵon, aŭ en forlasitaj fojnejoj, aŭ simple en fojnostakoj. Li manĝis panon kaj trinkis akvon. Lia celo estis Bjalistoko, la naskiĝurbo de Majstro, de interna ideo. Adamĉjo sukcese atingis ĝin. Ho, kiel mirinde aspektis tiu urbo en la valo de rivereto Bjala. La urbo, en kiu naskiĝis Ludoviko Zamenhof kaj interna ideo, vere estis eksterordinare ĉarma. Dum kelkaj tagoj li restis en Bjalistoko, vizitis ĉiujn lokojn, ligitajn al la aŭtoro de Esperanto. Antaŭ la monumento de Zamenhof li trifoje kliniĝis ĝis la tero kaj ekiris reen al Kaunas. Kiel araboj vizitintaj Mekon, povas konsideri sin veraj muzulmanoj, tiel samideanoj, vizitintaj Bjalistokon, iĝas veraj esperantistoj.

Oho, aha, tio ion signifas, ion meritas. Ke Adamĉjo tion efektiviĝu, neniu esperis, neniu atendis, neniu suspektis. Iuj eĉ sentis sin iumaniere ofendigitaj: pro kio tion efektiviĝis tiu kompatindulo, sed ne ili? Kaj neniu priridis lin. Pro kio priridi, rikani? Ĉar ne unu el ili irus eĉ pli longe por ekvidi ion interesan, ion mirindan.

.....

Jen, jen, li jam aperis kaj tuj per etaj paŝoj turnos sin dekstren. Ne, ne, ĉifoje li direktis sin maldekstren, rekte al Laisve-avenuo, paŝ-paŝ, frap-frap, paŝo post paŝo. Tutegale li intencis veni al Zamenhof-strato. Ĉu li irus vane tiom longan vojon perpiede de la fino de Ĵaliakalnis al Senamiestis?

Ho! Kafo multekostiĝis kaj verŝajne ankoraŭ prezaltiĝos. Sed Adamĉjo trinkos ĝin, por taso da kafo la mono sufiĉos. Se ne sufiĉos, li prunteprenos kvindecendan moneron.

Notoj:

Ĵaliakalnis (Verdamonto) –urboparto de Kaunas, situanta sur altaĵo.

Senamiestis (Malnova urbo) - urboparto de Kaunas, fakte urbocentro

Yin Jiaxin (Ĉinio)



aŭtoro, Yin Jiaxin

Mia najbaro Olda Zhang

1

En mia vilaĝo troviĝis maljunulo, stranga kaj neforgesebla. Oni nomis lin Olda Zhang, apenaŭ memorante lian realan nomon Zhang Dawa.

Olda Zhang estis maljuna fraŭlo, kies

domo situis proksime de la mia. En la pasintaj jaroj, novajn domojn sinsekve konstruigis ĉiuj vilaĝanoj escepte de Olda Zhang. Li diris, ke li ne havas sufiĉe da mono por konstruado de nova domo. Cetere li ne volis malkonstrui la malnovan domon, en kiu li iam loĝadis kune kun siaj gepatroj kaj gefratoj. Nur loĝante en tiu ĉi domo, li sentis sin trankvila kaj plezura. Li decidis loĝi ĉi tie ĝismorte.

Olda Zhang, ĉiam parolŝparema, malofte havis kontakton kun aliaj. Li ŝajne tre ĝuis sian solan kaj liberan vivon.

Mia karmemora avo iam rakontis iom pri la antaŭa vivo de Olda Zhang. En 1937 kiam japana armeo atakis Nordan Ĉinion, Zhang-familio havis kvar homojn: gepatroj, kvinjara filino kaj sepjara Zhang Dawa. Por malhelpi la sudeniron de japanaj trupoj, la registaro ordonis eksplode krevigi la digon de la Flava Rivero. Disversiginta akvo inundis la vastan ebenaĵon inkluzive nian vilaĝon. Ĉiuj vilaĝanoj devigite vagis ĉie por almozetado. Survoje la fratino de Zhang Dawa mortis de malsato. En la sekva jaro, dum Zhang Dawa kaj la gepatroj almozetis en Shandong-provinco, ili renkontis japanajn soldatojn kiuj rabis al la popolo havaĵojn. Ili respektive eskapis sencele. En la ĥaoso, Zhang Dawa disiĝis de siaj gepatroj.

Post kiam la inundo malaperis, vilaĝanoj sinsekve hejmeniris. El Zhang-familio nur la gepatroj jam revenis. Ilia dua filo naskiĝis en 1945 kiam Japanio kapitulacis. Malfeliĉe, kiam la bebo havis tri jarojn, lin trafis cerba paralizo. Ankoraŭ pli malfeliĉe, somere de 1955 la patro eksuferis je podagro, kaj poste pli kaj pli severe, tiel ke li iompostiome perdis laborkapablon. Zhang-familio vivis pli kaj pli malfacile. La patrino jam havis neniun metodon vivteni la familion, kiam neatendite revenis Zhang Dawa, kiu tiam estis alta, belaspekta kaj forta junulo. Tio okazis en la jaro

1957.

Oni ne sciis, kion Zhang Dawa spertis dum la pasintaj dudek jaroj, sentante lin iome fremda, ne tiel vigla kaj parolema kiel en la infaneco. Reveninte hejmen, Zhang Dawa apenaŭ parolis pri sia travivaĵo en la pasinteco, ne volis kontakti nek babili kun vilaĝanoj. Renkonte al iu ajn najbaro, li nur ridete ŝancelis la kapon por saluto; kiam okazis kunveno de tuta vilaĝo, li senvorte sidis en iu malhela angulo. Neniu virino volis edziniĝi al viro kun tia karaktero kaj el tia mizera familio kia la lia. Do li ĉiam restis fraŭla.

En 1968, lia patro mortis de malsano. En 1979, lia patrino forpasis kaj sekve lia paralizita frato en 1997. Turmentoj kaj mizeroj rongadis tempon. Zhang Dawa jam fariĝis Olda Zhang.

Malriĉulo parencojn ne havas. Antaŭe mi apenaŭ vidis, ke iu parenco vizitis Zhang-familion. Dume, Olda Zhang neniam forlasis la vilaĝon por viziti iun ajn parencon. Tamen, ekde la enterigo de sia frato, dum ĉiu Festo de Mortintoj, farinte oferon ĉe la tomboj de siaj gepatroj kaj frato, Olda Zhang tuj forlasis la vilaĝon por du aŭ tri tagoj. Oni demandis al li, kien kaj por kio li forveturis. Li ĉiam eviteme respondis, ke li iris aliloken nur por sin distri de trista humoro.

2

Kiel vilaĝestro, mi ĉiutage salutis al Olda Zhang por prizorgi lian farton. Tiun matenon post la unua neĝfalo en la jaro 2006, mi kiel kutime iris al la domo de Olda Zhang. Mirigite, mi trovis ke li ĝemante kuŝas en sia korto. Li ĵus glitis kaj falis tiel peze, ke li ne povis sin levi. Mi tuj telefonis al la centro de medicina helpo kaj li tuj enhospitaliĝis.

La kuracisto diagnozis, ke unu lia sakra vertebro jam krevis kaj li devas ricevi kirurgian operacion kiel eble plej frue. La tuta kosto de la operacio kaj kuracado taksis je pli ol 90,000 juanoj. Olda Zhang certe ne havis kapablon pagi la sumon, nek la vilaĝa komitato de administrado. Olda Zhang esprimis rezigni la operacion kaj kuracadon. La kuracisto eksplikis, ke ricevinte la operacion kaj kuracadon, Olda Zhang eble resaniĝos tiom kiom li kapablos sin mem prizorgi; male, se li rezignos, li ne povos restariĝi por vivi sen vartado. Mi kaj la aliaj anoj de la vilaĝestraro ne sciis kion fari por helpi al Olda Zhang, kiam li ekrememoris ion kaj diris al mi, ke eble gubernia buroo de civila administrado volas liveri monhelpon.

Doninte al mi du ŝlosilojn, Olda Zhang diris: “Bonvolu iri al mia domo. Malfermu la spegulŝrankon en mia dormoĉambro. Sur la supra septo estas rotanĝa kesto, kiun vi malŝlosos per la malgranda ŝlosilo. En la kesto troviĝas eta ferskatolo. Vi montros la aĵojn en la skatolo al gvidantoj de la gubernia buroo de civila administrado. Mi esperas, ke ĉi tiuj aĵoj utileblus por solvi mian malfacilon.”

Mi eniris la domon de Olda Zhang kaj malŝlosis la rotanĝan keston. Tuj falis en miaj okuloj kompleto de eksmoda militista uniformo. Sub la uniformo mi eltrovis la ferskatolon, en kiu kuŝas paketo. Malkovrinte la ŝtofpakumon, mi ŝtoniĝis de mirego. Al la okulo prezentigis unu ruĝa atestilo kaj kelke da militmeritaj medaloj, inter kiuj sin trovas eĉ unu Medalo pri Liberigo. Mi malfermis la atestilon kaj eklegis: “Tiu ĉi atestilo atestas, ke kamarado Zhang Venko en aprilo de 1947 aliĝis al la Ĉina Popola Liberiga Armeo kaj...” *Ha, kiu estas Zhang Venko? Ĉu estas Olda Zhang? La atestilo pruvas, ke li iam laboris en Zhongnanhai, kie ŝtataj gvidantoj laboras kaj loĝas, ĉu vere?*

Gvidantoj de la gubernia buroo de civila administrado tuj raportis la aferon pri Olda Zhang al la urba buroo. Tre baldaŭ konstatigis la identeco de Olda Zhang, kiu ja estas Zhang Venko. Je granda surprizo, Olda Zhang en sia juneco fariĝis batalheroo kaj eĉ servis al ŝtata gvidanto kiel gardisto.

Sciemaj ĵurnalistoj sinsekve alvenis la malsanejon por intervui Olda Zhang. Laŭ intervjuoj, oni sciis la rakonton de lia junaj jaroj.

Tiun jaron post disiĝo de siaj gepatroj, Zhang Dawa daŭre vagadis almozpetante. En sia deka jaro, li ekservis knabon de riĉa familio. Profitante la ŝancon, li ellernis legi. En la aĝo de dek kvar jaroj, li fariĝis komizo de grenvendejo. Printempe de la jaro 1947, li aliĝis al la Ĉina Popola Liberiga Armeo. Ĉe soldat-registriĝo la oficiro al li diris: “La nomo Zhang Dawa ne estas oreplaaĉa, eĉ iomete vulgara.”

“Vi donas la novan al mi, ĉu?”

“Nia trupo nepre iros de venko al alia,” la oficiro diris: “Do vi nomiĝas Zhang Venko, ĉu bone?”

Zhang Venko ĉiufoje batalis tiel brave, ke li akiris elstarajn meritojn. Post nelonge li varbiĝis membro de la Ĉina Komunista Partio. Kiam la trupo faris preparon por ataki trans la riveron Changjiang, Zhang Venko ricevis ordonon enposteniĝi kiel gardisto en Zhongnanhai. Ok jarojn poste, li kune kun iuj aliaj gardistoj estis liberigitaj el servo kaj reiris al sia hejmloko.

Laŭregule, li povis okupi postenon en iu gubernia organo. Sed, vidinte kriplan patron, paralizitan fraton kaj antaŭkadukiĝintan patrinon, li decidis resti hejme por prizorgi la familion.

Unu ĵurnalista al Olda Zhang petis: “Ĉu vi povus al ni diri ion pri via sperto en Zhongnanhai?”

“Ne, nenion. Mi neniam diru!” li kategorie rifuzis.

“Kial ne?” nekompreneble demandis la ĵurnalista.

Olda Zhang duonfermis siajn okulojn kvazaŭ en la cerbo serĉante fragmentojn de la pasinteco.

“Ĉe nia forlaso de Zhongnanhai,” li ekrememoris: “ĉefministro Zhou donis al ni

aŭdiencon, instrukciante ke ni ne ĝenu lokan registaron, konservu sekreton kaj ne malkaŝu nian sperton en Zhongnanhai je ajna tempo kaj ajna ejo.”

3

Kun tia identeco, kompreneble, Olda Zhang ĝuis favoran traktadon kiel emeritiĝinta veterana kadro. Li ricevis senpagan operacion kaj kuracadon. Pli ol tri monatojn daŭris la konvalesko, dum kiu ĉiutage li aŭ kuŝis en la lito aŭ sidis en la rulseĝo. Fine de marto, Olda Zhang kapablis stariĝi kaj fari kelkajn paŝojn, kiam, kontraŭ ĉia atendo, li proponis ke li iros aliloken por tri tagoj. Mi ekmemoris, ke revenos Festo de Mortintoj je la kvina de aprilo, kaj ĉiujare en tiu ĉi tempo li forveturis oni ne scias kien. Ĉiuj admonis lin rezigni aŭ prokrasti la vojaĝon, sed li obstine insistis pri sia ideo. Diskutinte inter si pri la afero, la superaj gvidantoj decidis, ke Olda Zhang devas en mia varto plenumi la vojaĝon.

Mi ne atendis, ke nia celloko estas Pekino.

Per aŭtobuso, ni ambaŭ iris al Zhengzhou, la ĉefurbo de nia provinco, kaj de tie ni trafis trajnon, kiu post tuta nokto atingis Pekinon. Survoje, Olda Zhang al mi sciigis, ke li deziras tributi respekton al la restaĵoj de prezidinto Mao.

Elirinte la stacidomon, ni en taksio rektis al Tian'anmen Placo.

Kiam mi la rulseĝon puŝis antaŭen, Olda Zhang restis silenta, ŝajne droninte en medito.


Ĉe la pordego de Memoriga Halo pri Prezidinto Mao, forpuŝinte min, li stariĝis, forlasis la rulseĝon kaj strebe piediris en la antaŭsalonon. Vizaĝe al la blankmarmora statuo de prezidinto Mao, ordiginte sian uniformon, kun serioza mieno, li staris en soldatrigida pozicio kaj fiksrigardis la statuon por momento. Poste li levis sian dekstran manon kaj faris militistan saluton. Larmoj estis ruliĝantaj sur liaj vangoj.

El la tria eldono de INK



esperantigita de **Paula Adúriz** (Hispanio)

Juan Trepiana (Argentina)



Ŝia rideto

Mi estis kelnero dum mia tuta vivo, kaj ofte mi pensas, ke mi jam vidis ĉion, kio povas esti vidita. Sed ekde antaŭ tri monatoj ĝis hieraŭ, kiam la nokto falas, ŝi eniras la kafejon, precize je la sama horo.

aŭtoro, Juan Trepiana

“Saluton, kelnero! Bonvolu du glasojn da ruĝa vino. Mi atendas elegantan kavaliron.”

“Volonte, sinjorino!”

Post kelkaj minutoj, ŝi malaperas en la mallumo. Iuj tagoj, kun iom da humuro, mi diras al mi mem, “Nu, jen venas la fantoma sinjorino.” Alifoje, ŝi profunde min ĝenas. Ĉiam du glasoj da vino restas apenaŭ gustumitaj sur la tablo, ĉiam ŝi malaperas sen ke mi povas vidi ŝin foriri. Ŝajnas kiel absurda ŝerco. Simple, la nokto ĉirkaŭprenas ŝin kaj mi restas konfuzita. Ĉiam la sama afero, senĉese ripetita...

Mi ofte cerbumas pri tio: Morgaŭ mi diros al ŝi, ke mi devis pagi ŝiajn vinglasojn, sed fine, mia empatio venkas. Ŝi estas maljuna virino, kaj mi pensas, ke ŝia menso eble ne plu funkcias klare... Sed hodiaŭ estas la tago! Mi ne plu povas toleri la situacion. Ŝi ĝenas min, kaj mi koleriĝas. Mi decidas peti, ke ŝi pagu aŭ forlasu la kafejon.

Noktiĝas, kaj la lumo en la kafejo malheliĝas.

“Saluton, kelnero! Bonvolu du glasojn da ruĝa vino...”

“Mi pardonpetas, sinjorino, sed mi devas diri al vi...”

“Pardonu. Ĉu vi povas sidigi apud mi?”

“Ho, nu... mi pensas... mi pensas ke jes...” Kurioze, sur la tablo antaŭ mi, stariĝas du glasoj da vino.

“Bonvolu, trinku iom. Je via sano!”

“Je via sano, sinjorino! Sed...”

“Hodiaŭ estas la tago,” ŝi diras preterpase kun malpeza rideto, “kaj ŝi ridetas tiel bele.”

“Kia speciala tago estas hodiaŭ?”

“Komprenu, ni nun devas foriri. Akurate!”

Subite, la kafejo ŝanĝiĝas, kvazaŭ magia transformo. Mi rigardas ŝin denove, kaj ŝi estas bela virino kun juna kaj tiom mistera rideto... Mirinde, spegulo, kiun mi ne rimarkis antaŭe sur la muro, donacas al mi la bildon de juna kelnero, vestita laŭ la malnovaj manieroj, kun buklo, blanka saketo, oraj butonoj. Mi kredas rekonii min en tiu bildo. Mi portas, amuze, grandan kaj malplenan kelnerpladon. Ĝi mem estas alia spegulo reflektanta la plafonon ornamitan per malnovaj lumoj. Magio de la speguloj, la tempo, la vivo... Reflektoj de reflektoj, la lumludoj...

Ni leviĝas, kaj io sonas kiel malproksimaj sonoriloj...

Ni tre malrapide, tenante unu la alian per la mano, transiras la pordon.

Surhavante sian mantelon de steloj, la nokto nin ĉirkaŭprenos.



Ridemulo el Nanling (vivanta dum la dinastio Ming)

Jin Ping Mei aŭ Oro, Vazo, Umefloro

Ĝia konsterna mirindeco kuŝas ne sole en tio, ke ĝiaj kvintesencaj partoj estas tiel rimarkindaj, dum ĝiaj riproĉeblaj partoj estas tiel terure okulfrapantaj, sed eĉ en la fakto, ke ĝi, kvankam multfoje kondamnita kiel malpermesita libro dum pli ol kvarcent longaj jaroj post sia apero, ĉiam ĉarmis kaj ĉarmas la sennombrajn legantojn per sia neimageble magia forto. Sekve, tute sen troigo, oni povas aserti, ke ĝi estas la sola el la ĉinaj romanoj, kiu estas la plej alloga kaj samtempe estas elmetata al plej multaj malaproboj kaj riproĉoj. En la komencaj jaroj post sia publikiĝo ĝi iam estis laŭdegata kiel la unua el la kvar mirindaj romanoj (la ceteraj tri estas *La Romano pri la Tri Regnoj*, *Ĉe la Akvorando* kaj *Pilgrimo al la Okcidento*).

tradukinto *Wang Chongfang*

ĈAPITRO 27

Flovazo malkaŝis sekreton en Smeralda Pavilono;

Ora lotuso ebruis en sovaĝa orgio sub la vitlaŭbo


*Ambirdoj interne de la brokaĵaj litkurtenoj,
Paro da gefenikoj sub la brodita litkovrilo.
Unu sama amor-avido, mil malsamaj pozoj;
La karnoj aromaj estas brilaj kaj diafanaj.
La jada fluto estas buŝe ludata en malhelo,
La delikata klitorio estas kaŝe gustumata.*

*El la kurtena vualo, kun malvarma parfumo,
Ŝi oblikve jetas ameman rigardon al la karulo.
Kun li, ĉiu minuto valoras mil pecojn da oro,
Kaj la matena horo rapidas kiel fluganta sago.
Dum la steloj falas sur la skulptitan fenestron,
La luno sin turnas, laŭ la koridoro, al la foro.*

Laibao revenis el la Orienta Ĉefurbo kaj faris sian raporton al Ximen Qing.

“Kiam mi atingis la ĉefurbon,” li diris, “mi iris vidi la majordomon, Zhai Qian, kaj donis al li vian leteron. Poste mi estis alkondukita al la Imperiestra Guvernisto Cai. Kiam Lia Ekscelenco jetis rigardon al la donacisto, li akceptis ĉiujn donacojn. Poste mi klarigis la okazon, kaj Lia Ekscelenco diris: ‘Mi ordonos, ke letero estu

skribita en kelkaj tagoj, kaj sendos iun kun la letero al la Revizoro de Shandong kun la peto, ke li liberigu la sal-komerciston, Wang Sifeng kaj la aliajn, entute dek du, kiuj estis arestitaj en la malliberejo de Cangzhou.”



Florvazo malkaŝis sekreton en Smeralda Pavilono. Ora Lotuso ebruis en sovaĝa orgio sub la vitlaŭbo.

La onklo Zhai ankaŭ sendis sian respekton al vi kaj diris, ke li esperis, ke vi mem venos al la ĉefurbo por la naskiĝtago de Lia Ekscelenco, la dek-kvina de la sesa monato, ĉar li havas iun aferon por diskuti kun vi.”

Aŭdinte la raporton, Ximen Qing treege ĝojis. Li tuj sendis Laibao iri diri tion al la riĉa najbaro Qiao.

Dum ili parolis, Ben la Kvara kaj Laixing envenis, sed, vidante, ke la mastro estas okupita, ili staris flanke, ĝis Laibao foriris. Poste Ximen Qing sin turnis al Ben la Kvara:

“Mi supozas, ke vi revenis de la kremaciejo, ĉu ne?”

Ben la Kvara ne kuraĝis paroli, sed Laixing paŝis antaŭen kaj flustris:

“Song Ren venis al la kremaciejo, kaj rifuzis permesi la forbruligon de la kadavro. Liaj paroloj estis ekstreme krudaj kaj malĝentilaj, kiujn mi ne kuraĝas ripeti.”

Se Ximen Qing ne aŭdus pri tio, nenio povus okazi, sed aŭdinte tiujn vortojn, li ekflamis per kolero kaj sakris:

“Tiu mortinda kanajlo! Kia abomeninda estaĵo!”

Li tuj sendis servoknabon por alvoki Chen Jingji kaj diris al la junulo, ke li skribu leteron al la subprefekto Li.

Poste li sendis Lai'an, kun la letero, iri al la urbodomo. La subprefekto Li tuj sendis du pedelojn, kiuj ligis Song Ren kaj kondukis lin al la juĝejo. Li estis akuzita pri ĉantaĝo provante uzi la mortintan virinon kiel rimedon eltrudi monon. Li estis torturita per prembastonoj¹ kaj ricevis ankaŭ dudek tiel solidajn bastonbatojn, ke la sango abunde gutadis laŭ la kruroj. Li estis devigita subskribi la leĝan promeson: ne plu fari ĝenadon al la domo de Ximen Qing. Samtempe la subprefekto Li ankaŭ ordonis al policianoj kaj la fajristoj, en la ĉeesto de servistoj de Ximen Qing, plenumi la kremacion.

Song Ren estis batita tiel severe, ke liaj du kruroj estis kovritaj per vundoj. Reveninte hejmen, li estis trafita de tiama epidemio kaj, post nur kelkaj tagoj, li mortis.

Vere:

Erarvaganta homo hazarde trafas la Dion de Katastrofoj;

Malsata fantomo renkontas Zhong Kui², la demonpelanton.

Tuj kiam Ximen Qing finis la aferon de Aroma Lotuso, li komencis kolekti tricent taelojn da arĝento, kiujn li konfidis al la arĝentisto Gu, por ke li direktu, en la somerdomo en la ĝardeno, grupon da artmetiistoj en la farado de la naskiĝtaga donaco destinita al la Imperiestra Guvernisto Cai, nome kvar arĝentaj viraj statuetoj, el kiuj ĉiu, alta je pli ol unu futo, portas la ideografiaĵon prezentantan “longvivecon”. Krome, li farigis ankaŭ paron da oraj vinkruĉoj kun inkrustita surskribo “longviveco” kaj aĉetis du jadajn pokalojn en formo de persikoj, du kompletojn da karmezinaj silkaj roboj kun kvinkoloraj broditaj piton-desegnoj el Hangzhou, sed ankoraŭ mankis du ruloj da nigra kaj skarлата ŝtofo por farado de manteloj kun piton-desegnoj, kiuj estis nenie aĉeteblaj je ĉia prezo.

Tiam Florvazo diris al li:

“Mi havas iom da tia ŝtofo ne fason tondita en mia loko. Ĝi estas en la supra etaĝo. Venu kun mi kaj havu pririgardon al ĝi.”

Ximen Qing do iris kun ŝi, kaj ili elektis kvar kompletojn: du karmezinajn kaj du nigrajn. Ili ĉiuj estis ore galonitaj kaj broditaj per kvinkoloraj piton-desegnoj. Ili estis certe multe pli fajnaj ol ĉiaj aĉeteblaj. Ximen Qing ekstreme ĝojigis. Li ordonis, ke oni tuj paku ilin ĉiujn, kaj ke Laibao kaj la komizo Wu refoje ekiru, la dudek-okan de la kvina monato, sur la vojon al la Orienta Ĉefurbo.

Du tagojn poste estis la komenco de la sesa monato. La vetero estis varmega. Ĉe la tagmezo la fajra suno estis tiel brula, kiel flamanta ombrello pendanta ĉe la zenito. En la vasta ĉielo vidiĝis neniun numero, kaj la varmega ŝajnis sufiĉa, por

bruligi la rokon kaj fandi la metalon.

Iam iu poeto verkis la jenan poemon, kiu priskribas tian varmegan veteron:

*De sude la Dio de Fajro venas, vipante la fajran drakon;
Liaj flamantaj standardoj ruĝigas la tutan ĉielan volbon.
La sunrado restas ĉe la zenito, farante nenian moviĝon;
La miloj da regnoj estas torturataj kvazaŭ en ruĝa forno.
La Kvin Montoj estas sekaj, kun nuboj vaporigintaj,
La Dio de Ondoj kuŝas sur la marfundo, suferante soifon.
Kiam en iu vespero venos bonfara zefiro malvarma,
La bruliga varmego sub la ĉielo estos tute forbalaita.*

En tiuj tagoj la vetero estis tiel varmega, ke Ximen Qing ne eliris el la domo. Li restis hejme, lasante siajn harojn nearanĝitaj kaj la simplan tunikon nebutonumita, por eviti plian varmon. Li iris en la somerdomon en la ĝardeno kaj rigardis tie la servoknabojn, kiuj sin okupis je akvumo de floroj. Li vidis, ĝuste antaŭ la Smeralda Pavilono, poton da aroma dafno en sia plena florado. Li diris al la servoknabo Lai'an, ke li prenu malgrandan akvumilon, kaj rigardis lian aspergon al la floroj. Ora Lotuso kaj Florvazo ambaŭ estis vestitaj en malpeza arĝentkolora silko kaj longa jupo de hela flavo kun franĝo el ora fadeno. Florvazo portis karmezinan veŝton, kaj Ora Lotuso tiun de arĝenta kaj ruĝa koloro.

Nur Ora Lotuso havis neniun formalan kufon: ŝi aranĝis sian hararon en granda ŝveligita hartubero sub blua harar-reto laŭ la Hangzhou-a modo, tra kiu kvar tufoj da haroj estis lasitaj elvidiĝi. Sur la frunto estis gluitaj tri turkisaj floretoj, kiuj reliefigis la belecon de ŝiaj pudrita vizaĝo kaj olee brilanta hararo, de ŝiaj ruĝaj lipoj kaj perlaĵ dentoj. La du virinoj alvenis kun ridetoj, manon en mano.

“Vi estas ĉi tie, rigardante la flor-akvumon,” diris Ora Lotuso, ekvidinte Ximen Qing. “Kial vi ankoraŭ ne kombis al vi la hararon?”

“Vi do diru al unu el la servistinoj, ke ŝi alportu al mi akvon,” diris Ximen Qing, “por ke mi ĉi tie faru lavon al mia hararo.”

“Demetu vian akvumilon,” diris Ora Lotuso al Lai'an, “kaj iru al mia ĉambro. Diru al unu el miaj servistinoj, ke ŝi rapide alportu iom da akvo kaj kombilon.”

Lai'an jesis kaj foriris. Ekvidinte la belan dafnon, Ora Lotuso paŝis al ĝi, preta deŝiri kelkajn ĝiajn florojn por meti ilin en sian hararon, sed Ximen Qing haltigis ŝin.

“Ne ilin tuŝu, vi stranga glatlanguleto! Mi do donos unu al ĉiu el vi.”

Efektive, Ximen Qing jam deŝiris kelkajn duone florantajn ĉe la flankoj de la grapolo, kaj trempis ilin en la akvo en turkisa porcelana vazo.

“Ha, mia infano,” diris Ora Lotuso kun rideto, “vi jam plukis plurajn florojn! Kial vi kaŝas ilin ĉi tie sen donaci eĉ unu al via patrino?”

Ŝi ekprenis unu kaj fiksis ĝin en sian hararon. Ximen Qing donis unu al Florvazo. Tiam Umefloro venis al ili kun spegulo kaj kombilo, kaj ankaŭ Krizantemo, kiu portis pelvon da akvo. Ximen Qing donis tri florojn al Umefloro kaj diris al ŝi:

“Alportu ĉi tiujn al Luna Sinjorino, Gracia Li kaj Jada Turo, por ke ili portu po unu en sia hararo, kaj, krome, ankaŭ invitu la Trian Sinjorinon veni aliĝi al ni. Diru al ŝi, ke mi volus aŭdi ŝin ludi ion por mi sur la lun-liuto.”

“Donu tiun por la Tria Sinjorino al mi,” diris Ora Lotuso. “Mi persone alportos ĝin al ŝi. Vi do sendu per Umefloro la du aliajn por Luna Sinjorino kaj Gracia Li. Post kiam mi revenos, vi devos doni al mi unu plian el tiuj ĉi floroj pro mia peno voki la kantontinon por vi. Mi ĝin meritos.”

“Iru do!” diris Ximen Qing. “Mi donacos al vi post via reveno.”

“Mia infano, kiu edukis vin tiel obeema?” diris Ora Lotuso. “Sed, se vi pensas, ke vi povos trompe sendi min voki la Trian Sinjorinon kaj poste donos al mi nenion, mi tien ne iros. Vi devos doni ĝin, antaŭ ol mi iros por ŝin voki.”

“Vi eta malĉastulino!” diris Ximen kun rideto. “Eĉ en tia afero bagatela vi penas havigi al vi pli da profito.”

Li do donis al ŝi ankoraŭ unu floron, kaj ŝi fiksis ĝin inter la haroj ĉe la tempio. Nur tiam ŝi konsentis iri al la malantaŭo, lasante Florvazon sola tie kun Ximen Qing.

Ximen Qing rimarkis, ke sub sia maldika silka jupo Florvazo portas skarlatan silkan kalsonon, kiu estas delikate diafana, tiel ke, kiam ŝi staras en la sunlumo, ĝi lasas diveni ŝian freŝe gracion karnon kaj ŝiajn jadajn ostojn. Tiumomente subita lasciva ekdeziro invadis lin, antaŭ ol li tion konsciis. Vidante, ke ĉirkaŭe estas neniun personon, kaj neglektante la kombadon de siaj haroj, li portis Florvazon sur la longan someran kanapon, kaj, levinte la jupon ĝis ŝia ventro kaj tirinte malsupren ŝian skarlatan kalsonon, komencis ludi kun ŝi la ludon, kiu estis nomata “eksciti fajron sur la alia flanko de la monto”³. Ili ludis sufiĉe longan tempon sen sperm-elĵeto. Kaj ilia plezuro estis kiel la ekstazo de “paro da kunflugantaj ambirdoj”.

Ili tute ne atendis, ke Ora Lotuso efektive ne iros malantaŭen por voki Jadan Turon. Ŝi iris nur ĝis la malantaŭa pordo kondukanta al la ĝardeno, kaj, post ioma pripenso, decidis transdoni la floron al Umefloro kaj petis ŝin porti ĝin al la Tria Sinjorino. Poste ŝi revenis al la Smeralda Pavilono, senbrue paŝante piedpinte kaj staris ekstere ĉe la fenestro, por subaŭskulti. Ŝi aŭskultis sufiĉe longan momenton kaj aŭdis, ke interne ili estas ĝuste en sia plezura agado.

“Ho, mia koro,” ŝi aŭdis, ke Ximen Qing diras al Florvazo, “via kara paĉjo tiel forte amas nenion alian, krom via postaĵo tiel ĉarme blanka. Hodiaŭ lasu al via paĉjo ĝui ĝin ĝis plena plezuro.”

Post iom da plia tempo ŝi aŭdis, ke Florvazo mallaŭte diras al Ximen Qing:

“Mia dolĉa paĉjo! Indulgu min, ne enŝovu tiel krude! Mi min sentas ne tro bone. Lastafoje, vi ludis kun mi tro forte, kaj mi sentis en la subventro ian doloreton, kiu komencis mildiĝi nur en la lastaj tagoj.”

“Kiel vi ne sentas vin bone?” demandis Ximen Qing. “Kion do vi volas diri per tio?”

“Mi do al vi tion ne kaŝos: mi estas graveda de pli ol unu monato. Bonvolu do trakti min iom milde, kun indulgemo.”

Aŭdinte la vortojn, Ximen Qing estis tute ekster si de ĝojo.

“Kial, mia karega,” li diris, “kial vi ne diris al mi pli frue? Se tio estas, kiel statas la fakto, via paĉjo do kontentiĝos nur per mallonga ludo.”

Sekve, kiam lia plezuro atingis sian kulminan pasion, li firme ĉirkaŭprenis ŝiajn koksojn per la manoj kaj, sen plua reteno, lasis sian semon elĵetita kiel el ŝprucfonto. La juna virino, en la subo, arkigis siajn gambojn kaj ricevis lian semon en la plej bona pozicio.

Forpasis longa momento, dum kiu ĉio, kio povis esti aŭdata, la spiregado de Ximen Qing kaj la virina voĉo milda kiel la oriola, estis komplete subaŭskultita de Ora Lotuso, kiu staris ekstere ĉe la fenestro.

Dum ŝi ankoraŭ aŭskultis, Jada Turo subite venis de malantaŭe.

“Kion vi faras ĉi tie, Kvina Franjo?” ŝi demandis.

Ora Lotuso faris al ŝi signon, ke ŝi silentu, kaj ili ambaŭ eniris. Ximen Qing estis tiel konfuzita, ke li ne sciis, kien meti siajn manojn kaj piedojn.

“Mi forestis tiel longan tempon,” diris Ora Lotuso al li, “kaj kion vi faris dume? Ŝajnas, ke vi ankoraŭ eĉ ne kombis al vi la hararon, nek lavis la vizaĝon.”

“Mi atendis, ke servistino alportu al mi la jasmenan sapon,” diris Ximen Qing. “Jen kial mi ankoraŭ ne lavis al mi la vizaĝon.”

“Mi preferas min reteni, por ne diri pri tio, kion vi ĵus faris,” diris Ora Lotuso. “Ĉu vi vere atendis la sapon? Estas ne mirinde, ke via vizaĝo estis frotlavita eĉ pli blanke, ol la postaĵo de iu virino!”

Ximen Qing donis nenian atenton al tiu ĉi diro, sed, kiam li finis siajn kombadon kaj lavadon, li sidiĝis apud Jada Turo.

“Kion vi faris en la malantaŭo?” demandis Ximen Qing. “Ĉu vi alportis la lun-liuton?”

“Mi ĵus estis en la ĉambro de la Granda Fratino,” respondis Jada Turo, “surfadenigante la perlojn por fari el ili kap-ornamaĵojn por nia Granda Franjo, por ke ŝi povu porti ĝin en ŝia hararo tiam, kiam ŝi iros ĉeesti la te-donacan ceremonion por la estonta novedzino de sia nevo Wu Shunchen, Tria Fratino Zheng, post kelkaj tagoj. La lun-liuton baldaŭ alportos la servistino Umefloro.”

Post momento Umefloro venis kaj diris:

“Mi jam alportis la florojn al la Granda Sinjorino kaj la Dua, kaj ili akceptis ilin.”

Ximen Qing do diris al ŝi, ke ŝi preparu vinon por ili. Baldaŭ estis alportita pelvo da glacia akvo, en kiu estis trempitaj prunoj kaj flosantaj melonoj. En la pavilono li *ĉirkaŭpremis ruĝojn kaj karesis verdojn*⁴, dronante en luksa ĝuado.

“Kial vi ne sendis Umefloron inviti la Grandan Fratinon aliĝi al ni?” demandis Jada Turo.

“Ŝi ne emas vinon trinki,” respondis Ximen Qing. “Ne necesas ŝin ĝeni.”

Sekve Ximen Qing prenis la honoran sidlokon, kaj la tri virinoj sidiĝis ambaŭflanke.

Vere:

Kiom da kruĉoj da plej bona nektaro estis elversitaj,

Tiom da delikataj pladoj estis elmetitaj kaj frandataj.

Ora Lotuso rifuzis sidi sur sia seĝo, sed anstataŭe sidis nur sur la malvarma pizoverda porcelana tabureto.

“Kvina Franjo,” diris Jada Turo, “venu sidi sur tiu ĉi seĝo. Mi timas, ke la tabureto povos doni al vi malvarmon.”

“Ne gravas,” diris Ora Lotuso. “Maljuna mi estas, kaj sen ajna fetto en la ventro, mi ne timas malvarmon.”

Baldaŭ, kiam la vino estis trifoje enverŝita al ĉiuj fratinoj, Ximen Qing diris al Umefloro, ke ŝi alportu la lun-liuton al Jada Turo por ludi, kaj la *pipaon* al Ora Lotuso, kaj diris:

“Vi du kantu al mi la kantserion, kiu komenciĝas per la melodio ‘*La Ruĝa Reĝo Estas en Regpotenco kaj Lia Gloro Plenigas la Subliman Malplenon*’.”

Ora Lotuso rifuzis, dirante:

“Mia infano, mi min demandas, kiu vin edukis tiel ruza. Dum mi kantos, vi du faros nenion alian, ol vin amuzi. Mi ne faros tion, krom se ankaŭ nia fratino Florvazo havos ian muzikilon por ludi.”

“Sed ŝi scias ludi nenian muzikilon,” protestis Ximen Qing.

“Se ŝi ne scias ludi,” diris Ora Lotuso, “ŝi do staru flanke kaj batu la takton per klakilo.”

“Vi eta malĉastulino!” diris Ximen Qing. “Ĉio, kion vi faras, estas nur babilaĉi.”

Li do ordonis al Umefloro alporti ruĝan eburan klakilon kaj konsentigis Florvazon teni ĝin en la mano.

Poste la du muzikludantinoj komencis ludi, delikate plukante la silkajn kordojn per siaj sveltaj fingroj etenditaj, kun Printempa Gracio, la servistino de Florvazo, kiu staris flanke, friskigante ilin per ventumilo. Ili kune kantis la melodion *Sovaĝaj Anseroj Transflugantaj la Sablon*. Kiam la kanto estis finita, Ximen Qing proponis

al ĉiu el ili pokalon da vino. Ora Lotuso foj-refoje iris al la tablo, por trinki plenuŝon da glacia akvo aŭ manĝi kelkajn fruktojn.

“Kial hodiaŭ vi manĝas nur malvarmaĵojn, Kvina Franjo?” demandis Jada Turo.

“Maljuna mi estas,” respondis Ora Lotuso kun rideto, “kaj nenio aparta estas en mia ventro. Kial do necesas al mi timi malvarmaĵojn?”

Florvazo estis tiel embarasita, ke ŝia vizaĝo jen ruĝiĝis, jen paliĝis. Ximen Qing jetis al Ora Lotuso rigardon kaj diris:

“Vi eta malĉastulino! Vi ĉiam parolas sensencaĵojn!”

“Mia bona fraĵo, estas vi, kiu parolas tro multe,” diris Ora Lotuso. “Ĉiaokaze, mi estas nur *kiel la senila maljunulino, kiu, kuŝante sur la lito, penas manĝi viandon peklitan kaj sekigitan — ŝi devas manĝi ŝirpecon post ŝirpeco*⁵. Kian rilaton tio havas al vi?”

Ĝuste kiam ili drinkis, subite la nuboj komencis kolektiĝi en la sudoriento, nebulo ekmalheligis la nordokcidenton. De fore venis malklara rulbruanta tondrado, sekvata de ekpluvego, kaj, rezulte de tio, la floroj kaj aliaj plantoj en la ĝardeno, ĉiuj estis komplete malsekiĝintaj.

Vere:

Nova akvo abunde aldoniĝas al ĉiuj riveroj kaj la maro;

Verdaj bambuoj kaj ruĝaj granatarboj estas pure lavitaj.

Iom pli poste la pluvo ĉesis, la restaĵo de ĉielarko pendis en la malproksima ĉielo, kaj la sunaj radioj reaparis en la okcidento.

Vere, la okazo estas:

La subtilaj pluvgutoj pasantaj humiligas la jasperon peronon,

La vespera friska venteto refreŝigas la kvietan korton pura.

Ĝuste tiam Eta Jado aperis, kiu venis de la malantaŭo por inviti Jadan Turon.

“La Granda Franjo volas mian helpon,” diris Jada Turo. “Tie estas iom da perloj ankoraŭ ne surfadenigitaj. Mi do iru tien, alie ŝi koleros.”

“Ni du do iru kune,” diris Florvazo. “Mi volas vidi, kiel mia fratino surfadenigos perlojn, por fari el ili kap-ornamaĵojn.”

“Atendu momenton, kaj mi donos al vi adiaŭ-kanton,” diris Ximen Qing.

Ĉe tio li prenis la lun-liuton kaj donis ĝin al Jada Turo por ludo. Dum li akompane manklakis, ili ĉiuj kune kantis la kanton *Liangzhou-Prehudo*:

Vespera ekpluvo falas sur mian fenestron sudan;

Jen ruĝaj petaloj pelmele flosas sur la lageta supraĵo.

Iom post iom kvietiĝas la tondra rulado;

La pluvo ĉesas, kaj la nuboj disiĝas.

Ĉie odoras lotusa aromo, ŝvebanta en la dek-lia spaco,

La nova luno pendas en la ĉielo, kiel arĝenta hoko:

*Ho, kia vidaĵo senfine bela de la Naturo!
Freŝe banita en akvo orkidee parfumita,
Mi staras forlasita en mia vespera tualetto,
En la izolita korto krepuska, pigra mi dormi ne emas.*

Ĥore:

*Laŭte kantu la gajan kanton "Ora Fadeno",
Trinku la pokalojn toste proponitajn!
Ĉe glacimonto kaj neĝa balustrado, preparita la festeno.*

Sed, en ĉi klara mondo nia,

Kiom da homoj povus esti per ĝi regalataj?

Ili daŭrigis la kantadon laŭ la sama melodio kun malsama teksto:

En la ombro salika subite ekĉirpas novaj cikadoj tedaj,

En la korton flugadas lampiroj kun siaj ek-ek-briletoj.

Aŭdu: de kie venas la kanto de akvokaŝtan-kolektantinoj?

Jen ili revenas en sia pentrita boato ĉe la vesperiĝo.

Vidu: la steloj jam sinkas pli kaj pli malalten,

Kaj interne de la ruĝaj pordegoj regas nur silento:

Tiu ĉi spektaklo estas eĉ pli ol rave ĝuinda.

Leviĝu, kaj per viaj delikataj manoj

Rearanĝu vian hartuberon nubosimilan.

La luno verŝas lumon sur la gazajn kurtenojn,

Kaj la homoj ne emas dormi, en ĉi bela nokto.

Ĥore:

Laŭte kantu la gajan kanton "Ora Fadeno",

Trinku la pokalojn toste proponitajn!

Ĉe glacimonto kaj neĝa balustrado, preparita la festeno.

Sed, en ĉi klara mondo nia,

Kiom da homoj povus esti per ĝi regalataj?

Ili daŭrigis la kantadon laŭ la melodio "Kreskanta Pli kaj Pli Alta":

Inter la ondetoj ludas paro da ambirdoj,

Turnante kaj returnante la verdajn lotusfoliojn,

De kiuj disŝutiĝas la perloj de delikata aromo.

Parfumita venteto ŝvebas,

Super la bonodoraj herboj,

Kaj apud la izolita pavilono.

Sidante ĉi tie, en kvieteco, mi sentas

La spiriton refreŝigita, antaŭ ol tion konscii.

Kial do serĉadi la Paradizon aŭ Mirlandon?

Ĥore:

Ni timas, ke la okcidenta vento revenos kun aŭtuno,

Kaj la fluantaj jaroj pasos for de ni, nerimarkeble.

Dum ili kantadis, antaŭ ol ili tion konsciis, ili jam alvenis al la angula pordo. Jada Turo donis sian lun-liuton al Umefloro kaj iris al la malantaŭo, kune kun Florvazo.

“Atendu min, Meng la Tria,” kriis Ora Lotuso, “ankaŭ mi iros.”

Ĝuste kiam ŝi estis preta ekiri, Ximen Qing kaptis ŝin je la mano, dirante:

“Vi glatlanguleto, ĉu vi provas forgliti? Sed mi nepre ne lasos vin iri for.”

Li donis al ŝi ektiregon tiel forte, ke ŝi preskaŭ falis.

“Vi stranga estaĵo!” diris la virino. “Ili ambaŭ jam foriris. Kial vi ne permesas al mi foriri?”

“Ni du trinku ankoraŭ iom da vino,” diris Ximen Qing, “kaj nin amuzu ludante en-poton-ĵetadon⁶ ĉi tie sub la rokaĵoj. Venu kaj trinku tri pokalojn kun mi.”

“Vi stranga estaĵo,” diris Ora Lotuso, “ni povos ludi sufiĉe bone tie en la kiosko. Kial ludi ĉi tie? Kaj vi vane petos tiun ĉi junan karnopeceton Umefloro alporti vinon ĉi tien. Ŝi rifuzos tion fari. Ĉu vi min ne kredas?”

Ximen Qing do diris al Umefloro, ke ŝi iru alporti vinon. Ŝi tuj donis la lun-liuton al Ora Lotuso kaj foriris sen respondo, eĉ sen returni la kapon.

Prezinte la lun-liuton en sian manon, la virino ludis ĝin iom da tempo kaj poste diris:

“Mi jam lernis de Meng la Tria kelkajn ariojn.”

Dum ŝi ludis, ŝi rimarkis, ke apud la rokaĵo kreskas granatarbo kun floroj, kiuj pompe dispetaliĝis post la pluvo. Bonhumore plukinte branĉeton, ŝi fiksis ĝin sur unu flanko de ŝia nubosimila hararo.

“*Mi estas virino sufiĉe maljuna, por surporti nur la floron ‘tri-tag-fastan’,*” ŝi pri si komentis.

Kiam Ximen Qing aŭdis tion ĉi, li alpaŝis antaŭen kaj levis ŝiajn du orlotusajn piedetojn en la aeron, petole minacante:

“Vi eta malĉastulino! Se mi ignoras la decon de la mondo, mi fiksus kun vi ĝis via morto.”

“Vi stranga sentaŭgulo!” diris Ora Lotuso. “Ne tiel fanfaronu. Atendu, ĝis mi demetos la lun-liuton flanken.”

Ĉe tio ŝi metis ĝin sur la randon de la florbedo.

“Mia filo,” ŝi diris, “vi ĵus finis vian plenkŝan amuziĝon kun la Sesa Fratino. Kial vi nun venas min turmenti?”

“Vi stranga sklavino,” diris Ximen Qing. “Vi parolas nur sensencaĵon. Kiu ĵus havus ion kun ŝi?”

“Mia knabo,” diris Ora Lotuso, “kion ajn vi faras, vi neniel povas trompi min, la ĉi-lokan ter-diinon. Kiu do vi pensas, ke mi, via panjo maljuna, estas? Kaj vi eĉ provas min trompi! Dum mi ĵus estis for de vi, por alporti la floron en la malantaŭon kaj vi du estis solaj, kion bonan do vi lasis al vi fari tiam?”

“Vi freneza malĉastulino!” kriis Ximen Qing. “Ĉesu kun via sensencaĵo.”

Tion dirante, li kuŝigis ŝin sur la florbedon, inter la floroj, kaj donis al ŝi kison. La virino senprokraste respondis lin per elŝovo de sia lango en lian buŝon.

“Se vi nomos min ‘mia plej kara paĉjo’,” diris Ximen Qing, “mi vin indulgos kaj lasos vin leviĝi.”

La virino trovis ŝin nepova kontraŭ lia volo, ŝi murmuris al li:

“Mia plej dolĉa karulo! Sed mi ne estas tiu, kiu plej plaĉas al vi, kial do vi venas min tiel turmenti?”

Koncerne la paron, kiu sin pikis reciproke, vere:

Inspirate de sunbrilo la oriola lango trilas plej lerte;

Post pluvo la flora branĉo montras apartan ĉarmon.

Post kiam la du ludis kelkan tempon, la virino diris:

“Kial ni ne irus al la vitlaŭbo kaj ludos tie en-poton-ĵetadon? Ni do kune iru.”

Ŝi do prenis la lun-liuton en la manon kaj ekludis, kantante la duan parton de

Liangzhou-Preludo:

En klara nokto, la animoj estas serenaj;

Kiel agrable friska estas la vetero!

Lunlumo banas la Palacon de Pura Malpleno

Sur la granda Jaspa Teraso⁸.

La gedioj, la gesenmortuloj, kolektiĝas

Por la plej grandioza festeno,

Aŭ, pli precize, karnavalo.

Kvankam tempo flugas kiel arĝenta sago,

La muzikado kaj kantado daŭre sonoros

En la Kristala Palaco.

Ĥore:

Ni timas, ke la okcidenta vento revenos kun aŭtuno,

Kaj la fluantaj jaroj pasos for de ni, nerimarkeble.

Finalo:

La tempo pasas kiel ekfulmo;

Mirinde belas ĉi nokto.

Sed ve, ĝi tro hastas al la fino.

Risku ĉion por plezuro,

Brue kantante en granda gajo!

La du paŝis ŝultron ĉe ŝultro. Baldaŭ ili ĉirkaŭiris la lazuran lageton, randiris la florlaŭbon, preterpasis antaŭ la Smeralda Pavilono, kaj alvenis al la celita loko. Ili larĝe malfermis la okulojn kaj havis rigardon ĉirkaŭen: ĝi estis vere belega vitlaŭbo.

Jen, vidu nur:

*Ĉe ĉiuj flankoj, la skulptitaj ŝtonaj balustradoj
Estas ĉirkaŭitaj de verdaj folioj dense amasiĝintaj.
Prujnita koloro, kiu frapas la okulojn,
Estas kliniĝantaj kvastoj kun mil purpuraj globetoj.
Aŭtuna forta aromo, kiu atakas la nazajn truojn,
Estas elspirita de dek mil verdaj pendantaj rubandoj nubosimilaj.
Guton post gutu, la “ĉevalina lakto”
Estas la kalcedona suko en la kristalaj aferoj.
La ronde ŝvelintaj verdaj perloj
Estas la smeraldaj kurtenoj ornamitaj per ora pulvoro.
Tiuj specioj estis transplantitaj
El la foraj Okcidentaj Regionoj.
Ilia rara aromo estis kaŝita
En la Palaco de Dolĉa Fonto.
Vere: en ĉiuj sezonoj ĝi estas beligita
Per serenaj floroj sur florantaj arboj.
La hela lunlumo kaj la pura venteto
Estas neaĉeteblaj je ĉia alta prezo.*

Ili venis al la vitlaŭbo. Tie troviĝis du someraj taburetoj, kaj apud ili estis vaso por la ludo de en-poton-ĵetado. Ora Lotuso demetis la lun-liuton kaj ludis la ludon kun Ximen Qing. Tiam venis Umeffloro kun vino, kaj Krizantemo portanta keston da frandaĵoj kun bovlo da glaciigitaj fruktoj.

“Vi juna karnopeceto!” diris la virino. “Vi ĵus foriris en atako de malbona humoro. Kio do decidigis vin nun veni kun tiom da bonaj manĝaĵoj?”

“Ni ĉie serĉadis vin,” plendis Umeffloro. “Kiu povus anticipi, ke vi englitos ĉi tien?”

Krizantemo demetis sian ŝarĝon kaj foriris.

Ximen Qing malfermis la keston kaj trovis ĝin dividita en ok fakojn kun malsama frandaĵo en ĉiu. Krome, en la kesto estis ankaŭ arĝenta kruĉeto da vinbera vino, du malgrandaj oraj pokaloj en formo de lotusa semreceptaklo, du paroj da eburaj manĝbastonetoj. Ili estis surtabligitaj. Ximen Qing kaj Ora Lotuso sidiĝis vizaĝ-kontraŭ-vizaĝe kaj daŭrigis la ludon de en-poton-ĵetado. Ili ludis “Trapasi Ponton por Enŝovi Pavan Plumon”, “Sovaĝaj Anseroj en Inversigita Flugado”, “Sinsekvaj Trapasoj de Ekzamenoj”, “Du Qiao-fratinoj Studentaj Siajn Librojn”,

“Yang Guifei⁹ Dormanta en la Printempo”, “La Nigra Drako Eniĝanta en Sian Kavernon”, kaj “Perla Kurteno Inverse Kunrulita”, ktp. Entute, ili ludis pli ol dek ludojn, kaj la virino jam sufiĉe ebriiĝis post trinko de punpokaloj da vino. Du ruĝaj persikfloroj jam floris sur ŝiaj vangoj, kaj ŝiaj amoraj okuloj estis tiel abundaj je oblikvaj okulumoj, kiel je aŭtunaj ondetoj.

Ximen Qing ekvolis trinki la afrodiziigan Kvin-Spican Vinon kaj sendis Umefloron, por ĝin alporti.

“Vi glatlanguleto,” diris Ora Lotuso. “Bonvolu fari al mi ankoraŭ unu favoron. Iru en mian ĉambron kaj alportu la someran bambuan maton kaj kapkusenon. Mi estas komplete dormema kaj volus kuŝi ĉi tie por kelka tempo.”

Intence afektante la koketecon de trodorlotita knabineto, Umefloro diris:

“Ankoraŭ unu favoron?” ŝi diris. “Vi jam donis al mi tiom da ordonoj, kiujn neniu preskaŭ povus plenumi!”

“Se vi ne volos iri,” diris Ximen Qing, “mi sendos Krizantemon por tion fari. Vi do alportu la vinon. Jen ĉio.”

Ĉe tio Umefloro foriris, skuante la kapon dum la paŝado.

Post iom da tempo Krizantemo revenis kun la mato, la kapkuseno kaj maldika litkovrilo.

“Demetu ilin,” ordonis Ora Lotuso al ŝi, “kaj eliru fermante post vi la ĝardenan pordon. Poste iru resti en via ĉambro, kaj ne revenu, antaŭ ol mi vin vokos.”

Krizantemo jesis kaj, farinte tion, kion ŝia mastrino ordonis, foriris.

Ximen Qing leviĝis, demetis sian jad-koloran gazan tunikon, pendigis ĝin sur la balustradon, kaj iris rekte al la florar-subtenilo apud la peonia laŭbo, por fari pison.

Reveninte li vidis, ke la virino jam sternis la bambuan maton kaj pretigis la maldikan litkovrilon kaj kapkusenon sub la vitlaŭbo, kaj ŝi sin jam nudigis, ĝis neniu strieto da tolo restis sur ŝia korpo. Ŝi kuŝis sur la dorso laŭ sia tuta longo, kun la paro da skarlataj ŝuoj ankoraŭ sur siaj piedetoj, ventumante sin per blanka silka ventumilo.

Kiam Ximen Qing vidis tian spektaklon, lia diboĉema koro estis ekscitita, kaj, sub la alkohola efiko, ankaŭ li senigis sin je ĉiuj siaj vestoj kaj sidiĝis sur tabureto, lasante al siaj piedfingroj tikli ŝian klitoron, la “koron de ŝia bela floro”. Lia tiklado estigis tian efikon, ke ŝia vagina fluidaĵo elfluis, kvazaŭ heliko sekrecius sian mukon. Poste li demetis la skarlatajn broditajn ŝuetojn de la virino, malligis ŝiajn piedajn rubandojn kaj per ili ligis ŝiajn maleolojn al supra latiso de la vitlaŭbo, tiel ke ŝi aspektis ĝuste kiel “ora drako etendanta siajn ungegojn”.

Rezulte de tio, ŝia vagina aperturo estis vaste malfermita, ŝia “ruĝa hoko” estis komplete malkovrita, kaj ŝia “kokina lango” estis elŝovita el la interno. Ximen Qing do klinis sian torson, tenante sian penison en siaj manoj, metis ĝin en la buŝon de ŝia vagino, kaj komencis ataki ŝin en la pozicio “Inversa Eniĝo de Sago Pafita”.

Apogante sin per unu mano sur ŝia kapkuseno, li faris la enŝovon per sia tuta forto. Li faris ŝovon post ŝovo, ĝis ŝia vagina abunde sekreciita fluidaĵo seninterrompe fluadis, farante tian sonon, kian faras granda aro da misgurnoj naĝantaj en la ŝlimo. La virino, el la subo, senĉese balbutadis: “Paĉjo, paĉjo! Ho, mia karulo!”

Ĝuste kiam ili alproksimiĝis al la orgasmo, neatendite aperis Umefloro, kiu venis kun varmigita vino. Tuj kiam ŝi vidis, kio okazas, ŝi demetis la vinkruĉon kaj forkuris rekte al la supro de la artefarita monteto el rokpecoj, la plej alta punkto de la ĝardeno, kie ŝi klinis sin super la ŝaktablo kaj amuziĝis per ŝakpecoj.

Levante sian rigardon supren, Ximen Qing ekvidis ŝin kaj geste alvokis ŝin malsupren, sed ŝi rifuzis.

“Vi glatlanguleto!” li kriis. “Se mi vin ne povos malsuprenigi, vi atendu kaj vidu.”

Li do, forlasinte la virinon, supreniris sur la ŝtonaj ŝtupoj per grandaj paŝoj por ŝin kuratingi, sed tiam Umefloro jam komencis malsupreniri per la vojeto dekstre de la monteto, kiu pasis tra la Groto de Kaŝita Printempo. Kiam ŝi atingis la mezon de la vojo, kie ŝi provis sin kaŝi inter la densaj folioj kaj floroj, en nigra ombro Ximen Qing kaptis ŝin kaj prenis ŝin en siajn brakojn.

“Finfine mi vin retrovis, vi glatlanguleto!” li diris.

Poste li milde brakumis ŝin kaj portis ŝin al la vitlaŭbo.

“Antaŭ ĉio, vi trinku pokalon da vino!” li diris kun rideto.

Li sidigis ŝin sur siaj genuoj, kaj la du pasigis la pokalon inter si de buŝo al buŝo.

Rimarkante, ke la du piedetoj de la virino estis pendigitaj de sur la supro de la vitlaŭbo, ŝi diris:

“Mi ne scias, kiel vi povis fari tian aferon,” ŝi diris. “En ĉi plena taglumo, se iu pasanto hazarde vidus, kiel tio ŝokus la decon!”

“Ĉu la angula pordo estas fermita?” demandis Ximen Qing.

“Jes,” respondis Umefloro, “mi fermis ĝin post mi, kiam mi venis.”

“Eta glatlangulino,” diris Ximen Qing, “vi povos vidi, kiel mi ludas ‘jetadon en karnan poton’. Tiu ĉi variaĵo estas nomata ‘Pafu al la Arĝenta Ansero per Ora Globeto’. Vi rigardu. Por ĉiu globeto trafinta la celon, mi trinkos pokalon da vino.”

Ĉe tio li prenis jade flavan prunon el la glacia akvo en la bovlo kaj ĵetis ĝin al la aperturo de la vagino de la virino. Li sinsekve ĵetis tri, kaj ĉiu el ili trafis la klitoron. Ximen Qing do trinkis tri pokalojn da Kvin-Spica Vino. Li ankaŭ ordonis Umefloron enverŝi pokalon da vino kaj donis ĝin al la virino, kaj tiu ĝin trinkis.

Poste Ximen Qing enŝovis prunon en la vaginon de la virino, kaj lasis ĝin resti ene sen fari iun ajn pluan agon, kio havis la efikon eksciti la virinon, ĝis ŝia amora deziro tumultiĝis, kaj ŝia vagina fluidaĵo komencis senĉese elfluadi, tiel ke ŝi sentis

sin tro malforta, ŝiaj stelsimilaj okuloj malklariĝis, kaj ŝiaj kvar membroj inertigiĝis sur la mato.

“Ho, kia kruela karulo!” ŝi murmuris. “Mi mortas de via turmenta ekscito!”

Ŝia oriola voĉo tremetis kaj iom post iom svenis. Ximen Qing donis nenian atenton al ŝi, sed diris al Umefloro, ke ŝi lin ventumu ĉe la flanko, dum li regalas sin nur per vino. Pokalon post pokalo li trinkis, ĝis fine li kuŝiĝis sur la granda fotelo kaj endormiĝis.

Ekvidinte, ke li jam endormiĝis en ebrio, Umefloro senbrue alpaŝis kaj, por fari al si certiĝon, donis al li provan kareson. Poste ŝi malaperis tre rapide, kiel strio da fumo, forkurante per trapaso de la Groto de Kaŝita Printempo al la malantaŭo. Ŝi aŭdis, ke iu vokas trans la angula pordo, kaj ŝi ĝin malfermis: tie estis Florvazo.

Neniu ĝenis la dormon de Ximen Qing. Li dormis preskaŭ du horojn, antaŭ ol vekigi. Kiam li malfermis siajn okulojn, li vidis, ke la du blank-karnaj kruroj estas ankoraŭ pendigitaj ambaŭflanke de sur la supro de la vitlaŭbo. Rimarkante, ke Umefloro ne plu apudestas, li ne povis plu reteni sian voluptemon, kaj, sin turninte al la virino, diris:

“Nun, mi lasos al vi havi min, mia malĉastulino!”

Ĉe tio li fingre elfosis la prunon el ŝia vagino kaj manĝigis ĝin al la virino. Poste li sidigiĝis sur kapkuseno, eltiris la saketon de seksaj instrumentoj el la poŝo de sia vesto, kaj fiksas ĉe la bazo de sia penis la arĝentan subtenan ringon sulfuritan.

En la komenco li nur tiklis ĉirkaŭ la buŝo de la vagino, rifuzante penetri profunde, kio havis la efikon eksciti la virinon, ĝis ŝi arkigis sian dorson responde al ĉiu lia movo, senĉese kriante:

“Paĉjo, mia karulo, rapide eniru, kaj tuj! Vi mortigas de malpacienco vian malĉastulinon! Mi scias, ke vi koleras kontraŭ mi pro Florvazo kaj intence min turmentas per tio. Hodiaŭ mi jam trovis, kiel ruza vi povas esti, kaj poste mi ne plu kuraĝos vin provoki.”

“Vi eta malĉastulino,” diris Ximen Qing kun rideto, “se nur vi jam lernis vian lecionon, ni povos pli bone intertrakti...”

Ĉe tio, post iom plua tiklado de ŝia klitorio, li retiris sian organon, kaj, palpserĉante en sia poŝo, li trovis alian saketon. Malferminte ĝin, li elpinĉis el ĝi iom da afrodiziiga unĝvento nomata “Amoraj Kriroj el Buduara Belulino” kaj, per ĝi ŝmirinte la buŝon de ŝia vagino, forte enŝovis sian organon en ŝin kaj donis kelkajn puŝojn per ĝi. Tre baldaŭ lia tuta organo fariĝis pli firma kaj ekbaŭmis. Ĝiaj elstaraj vejnoj ŝvelis, kaj ĝia kapo estis rekte levita, kvazaŭ ĝi furioziĝus. Ximen Qing klinis sian kapon, por pli bone observi la ripetatajn enŝovojn kaj retiriĝojn kaj satigi siajn okulojn je vidado de tia spektaklo. Dume la virino, kuŝante apud la kapkuseno, kun stelsimilaj okuloj malklaraj, senĉese ĝemis kaj balbute kriadis:

“Ho, grand-penisita karulo! Per kia mirindaĵo vi eniris en min? Ho, daŭrigu, daŭrigu! La jukado en la klitorio de tiu ĉi via malĉastulino jam enpenetris en la medolon de ŝiaj ostoj. Ho, kompaton al mi, kaj lasu min indulgata.”

En la buŝo de tiu ĉi malĉastulino, nenia esprimo, kiel ajn neelparoleble obscena, estis lasita neeldirita.

Koncerne Ximen Qing, per unu spiro, seninterrompe li jam faris tri aŭ kvar cent energiajn puŝojn. Sin apogante, kun vizaĝo malsupren, sur la kapkuseno kaj la mato per la du manoj, arkigante sian dorson per sia tuta forto, kaj respondante ŝiajn movojn, li retiris sian organon ĝis ĝia kolo kaj ree enŝovis ĝin ĝis ĝia radiko, je ankoraŭ pli ol cent fojoj. La virino, en la subo, senĉese forviŝis per sia buŝtuko sian vaginan sekreciaĵon, sed ĝi daŭre fluadis, tiel ke la mato komplete malsekiĝis. Ximen Qing alterne lasis la peniskapon jen malaperi en ŝian vaginon, jen reapari el ĝi, sin movante antaŭen kaj malantaŭen, kaj senindulge ŝin pli kaj pli ekscitadis.

“Nun la tempo jam venas al mi,” anoncis ŝin Ximen Qing, “por ludi ‘La maljuna Bonzo frapas la sonorilon’. Estu preta.”

Subite li arkigis sian dorson posten kaj faris ekpuŝon tiel forte, por ke lia organo penetru rekte ĝis ŝia “vagina ĉambro”. La tiel nomata “vagina ĉambro” estas la plej profunda parto de la virina seksorgano, kiel pistilo de floro en burĝono. Kiam la peniskapo atingas tiun punkton sen devio, la tuŝo estigas ian nedireblan agrablecon kaj perfektan kontentecon, kiel ĉe la viro, tiel ankaŭ ĉe la virino.

Sed la virino sentis ekdoloron kaj respondis per subita supren-eksalto de la korpo, rezulte de kio, aŭdiĝis krako: rompiĝis la sulfurita arĝenta ringo en ŝi. La okuloj de la virino tuj perdis sian klarecon, ŝia spirado malfortiĝis ĝis apenaŭa aŭdebleco, la langa pinto fariĝis glacie malvarma, kaj ŝiaj kvar membroj inertiĝis sur la mato.

Ximen Qing terurigiĝis kaj haste malligis la piedajn rubandojn, per kiuj ŝiaj piedetoj estis pendigitaj de sur la supro de la vitlaŭbo. Li do elfosis la sulfuritan ringon el ŝia vagino. La ringo jam rompiĝis en du pecojn.

Poste li subtenis Oran Lotuson por helpi ŝin preni la sidan pozicion. Post paso de sufiĉe longa tempo, ŝiaj okuloj komencis malfermiĝi kun surprizo kaj repreni sian klarecon, kaj iom post iom ŝi revenis al sia konscio.

Ŝi sin turnis al Ximen Qing kaj diris, kun larma koketeco, per karesa voĉo:

“Mia propra karulo, kiel vi povis esti tiel kruela kontraŭ mi hodiaŭ? Mi preskaŭ perdis mian vivon en viaj manoj. Ekde hodiaŭ vi neniam devos fari similon al mi. La vivo ne estas bagatelo. Nun mi ankoraŭ sentas kapturton, tiel ke mi apenaŭ scias, kie mi estas.

Rimarkante, ke la suno jam sin klinas okcidenten, Ximen Qing haste helpis al ŝi surmeti siajn vestojn, kaj vokis Umefloron kaj Krizantemon forporti la litajojn kaj

helpi kune kun li subteni ŝin en ŝian ĉambron.

Umefloro revenis al la ĝardeno por superrigardi, kiel Krizantemo formetas la malplenajn pokalojn kaj teleretojn. Ĝuste kiam ŝi estis preta fermi la ĝardenan pordon, la fileto de la ĉefservisto Laizhao, Fera Bastoneto, eksaltis el sub la florar-subtenilo kaj ĝenadis ŝin petante fruktojn por manĝi.

“De kie vi venis, vi petoluleto?” diris Umefloro, donante al li kelkajn prunojn kaj persikojn. “Via paĉjo drinkis ĝis ebriiĝo. Tuj forkuru al la antaŭo! Alie, se li vidos vin ĉi tie, mi timas, ke vi ricevos batojn.”

La simieto prenis la fruktojn kaj tuj malaperis.

Umefloro fermis la ĝardenan pordon kaj revenis al la ĉambro, kie ŝi helpis Ximen Qing kaj la virinon enlitiĝi.

Vere:

En la mateno, luksa festeno en gajo,

En la vespero, belulino en la brakoj.

Sed, ve! La ĝojo ne daŭras longe, ĝi efemeris:

La fluanta tempo postkuras la vesperajn nubojn.

Notoj:


- Prembastonoj: ĉina antikva torturilo, kiu konsistis el du bastonoj ŝraŭbtenile kunligitaj, inter kiuj oni premis la gambojn de la torturato.*
- Zhong Kui estas legenda dio, supozata kiel forpelanto de demonoj, kies bildo kutime estis uzata por esti surgluita kiel amuleto ĉe la enirejo al domoj por forbari malbonajn influojn.*
- Eksciti fajron sur la alia flanko de la monto: esprimo signifanta ian korpan pozicion de homa sekskuniĝo.*
- Ĉirkaŭpremi ruĝojn kaj karesi verdojn: ĉi tie ‘ruĝoj’ kaj ‘verdoj’ metafore aludas ĉarmajn virinojn.*
- Esti nur kiel la senila maljunulino, kiu, kuŝante sur la lito, penas manĝi viandon peklitan kaj sekigitan — ŝi devas manĝi ŝirpecon post ŝirpeco: humura xiehouyu signifanta “senutile estas multe paroli, kaj por ŝi sufiĉas eta aludo”.*
- En-poton-jetadon: en la antikveco, ludo ludata ĉe drinka festeno, en kiu la partoprenantoj jetis sagojn en poton; kaj tiu, kiu faris pli da trafaj jetoj, estis gajninto, dum la perdinto estis devigita trinki punpokalojn da vino laŭ la ludregulo.*
- Mi estas virino sufiĉe maljuna, por surporti nur la floron “tri-tag-fastan”: la senco de tiu ĉi humura esprimo kuŝas en la vortoludo en la originalo “hua” (花), kiu ĉi tie havas duoblan sencon: “floro” (带“花”) kaj “malforta vidpovo” (眼“花”).*
- La Jaspa Teraso: lokoj loĝataj de senmortuloj en la legendo.*

9. Yang Guifei: t.e. Yang Yuhuan, la unuaranga kromedzino de la imperiestro Xuanzong de la dinastio Tang, fama per sia beleco.

ĈAPITRO 62

La taŭista pastro Pan sorĉe vokis dian generalon; Ximen Qing amare ploregis pri la morto de Florvazo

*Kiel paro da jadaj harpingloj neantaŭdestinitaj,
La fiŝo estas en la lago, sed la gruo en la ĉielo.
La purpura fenikso! Ne fiere flugu en la spegulo;
La blua birdo!¹ Famo diras, ke vi jam ne plu laboras.
Kiel akvo elverŝita teren ne povas esti rekolektita,
La fideleco devus pruviĝi firma kaj neŝanĝebla.
Ĉe iro preter la monto, kie ŝi kolektis aromajn herbojn,²
Ruĝaj larmoj pluve verŝiĝos en la alian mondon.*



*La taŭista pastro Pan sorĉe vokis dian
generalon.*



*Ximen Qing amare ploregis pri la morto de
Florvazo.*

Kiam Ximen Qing konstatis, ke nenia medikamento povas produkti la plej malgrandan efikon sur la malsano de Florvazo, kaj ke ĉiuj sortodivenoj, kiujn li konsultis, senescepte donis la rezulton de la prognozo malbonaŭguran kaj sinistran, li tute ne sciis, kion fari.

En la komenco Florvazo ankoraŭ povis fari sian plejblon por kombi al si la hararon kaj lavi al si la vizaĝon, kaj ŝi ankoraŭ povis ellitiĝi por sidi sur la fekujo, sed poste, iom post iom, ŝi perdis sian apetiton, kaj ŝia figuro pli kaj pli malgrasiĝis. En tre mallonga tempodaŭro ŝi, kiu iam havis florsimilan aspekton, jam fariĝis tiel malgrasa kaj malforta, kiel flava velkinta folio. Ŝi ne plu havis la fortunon ellitiĝi por plenumi siajn naturajn bezonojn, sed simple kuŝis sur vatita matraco kovrita per tavolo da sorba herbopapero. Timante, ke alia enveninto povos esti ĝenata de la malagraba odoro, ŝi diris al siaj servistinoj, ke ili ĉiam tenu incenson bruligita en la ĉambro. Observante, ke ŝiaj brakoj estas tiel malgrasaj, kiel arĝentaj stangetoj, Ximen Qing ploris, dum li preskaŭ ĉiam restis ĉe ŝi en la ĉambro. Li iris en la oficejon nur en ĉiu dua tago.

“Mia kara fraĉjo,” protestis Florvazo. “Vi devus regule iri al via oficejo. Mi ne volas, ke vi neglektu viajn oficajn devojn pro mi. Ne estu maltrankvila pri mi. Mia malsano ne tre gravas. La sola ĝeno estas nur la sang-elfluo el la malsupra korpo. Se ĝi nur ĉesos, mi povos ree malfermi mian buŝon por manĝi kaj trinki, kaj tiam mi resaniĝos. Vi estas viro kaj ne devus ĉiam gardi mian ĉambron, tiel kroĉante vin al mi.”

“Mia tre kara franjo,” ploris Ximen Qing, “kiel mi povus forlasi vin, kiam mi vidas vin en tia stato?”

“Ho, kia stultulo vi estas!” diris Florvazo. “Se mi ne mortos, tio estos en ordo. Sed se la Fatalo jam dekretis, ke mi devus morti, kiu povus malebligi mian morton?”

“Mi havas ion por diri al vi,” ŝi daŭrigis. “Mi ne scias kial, sed, kiam ajn mi estas sola en la ĉambro, mi sentas timon. Ŝajnas, kvankam malklare kaj malprecize, ke iu aperas antaŭ mi. En la nokto mi konstante sonĝas pri li. Svingante tranĉilon aŭ alian armilon, li minace krias kontraŭ mi, kun la infaneto en siaj brakoj. Foje, kiam mi proksimiĝis al li kaj penis preni al mi la infaneton, li forpuŝis min tiel krude, ke mi falis sur la teron. Tiam li diris, ke li jam aĉetis al si alian domon kaj volas, ke mi iru kun li. Foje kaj refoje li tiel obsedas min. Sed tion mi ja malvolontus rakonti al vi.”

Tion aŭdinte, Ximen Qing diris:

“*La morto de homo similas al lampa estingiĝo.* Dum tiuj ĉi pluraj jaroj, kiu scias, kien li jam iris? Evidente, tio estas la rezulto de la fakto, ke vi suferas tro longedaŭran malsanon kaj perdis tiom multe da sango, ke vi fariĝis tiel malforta

fizike kaj spirite. Mi kredas, ke ne estas malbona spirito, nek demono, nek monstro, nek fantomo de iu parenco aŭ de iu senrilata persono, kiu venas vin obsedi kaj ĝeni. Sed morgaŭ mi sendos iun al la templo de la ĉefpastro Wu por akiri du magiajn desegnaĵojn, kaj gluos ilin sur la pordo de via ĉambro. Tiam ni povos vidi, ĉu ekzistas demono aŭ malbona spirito en tiu ĉi domo.”

Dirinte tion, li eliris kaj sin direktis al la antaŭo. Tie li ordonis al Dai’an, ke li rapidu sur rajdbesto al la Templo de Jada Imperiestro por akiri la magiajn desegnaĵojn. Kiam Dai’an rajdis sur la vojo, li renkontis Ying Bojue kaj Xie Xida kaj, desaltinte de la rajdbesto, ilin salutis.

“Kien vi rapidas? Ĉu via mastro estas hejme?” ili demandis.

“Paĉjo estas hejme, kaj mi iras al la Templo de Jada Imperiestro por akiri la magiajn desegnaĵojn,” respondis Dai’an.

Ying Bojue kaj Xie Xida do iris viziti la domon de Ximen Qing.

“Kiam nia frato Xie aŭdis, ke nia bofratino estas en malbona parto, li estis terure timigita,” diris Ying Bojue, “sekve ni venas demandi pri ŝia sanstato.”

“En tiuj ĉi lastaj tagoj,” diris Ximen Qing, “ŝi fariĝis tiel malgrasa, ke ŝi aspektas kiel alia persono. Tio tiel multege embarasas min, ke mi komplete ne scias, kion fari.”

“Fraĉjo,” diris Ying Bojue, “pro kio vi sendis Dai’an al la templo?”

Ximen Qing do rakontis al ili pri la timo, kiun Florvazo havas tiam, kiam ŝi restas sola en la ĉambro.

“Ŝi timas, ke en la domo povas esti malbona spirito aŭ demono, kiu ĝenas ŝin, sekve mi sendis la servoknabon por peti de la ĉefpastro Wu du magiajn desegnaĵojn, kiuj povos esti gluitaj sur la pordo de ŝia ĉambro kun la celo subpremi ilin.”

“Fraĉjo,” diris Xie Xida, “tio estas la rezulto de la fakto, ke la vitala spirito de mia bofratino estas en troa malforteco. Ekzistas nenia malbona spirito, nek demono, kiu farus malbonon al la homo.”

“Fraĉjo,” diris Ying Bojue, “se vi vere volas forpeli malbonajn spiritojn, tio ne estas malfacila afero. La taŭista pastro Pan el la templo Kvin Montoj ekstere de la urbopordego estis trejnita en la arto ekzorci demonojn kaj malbonajn spiritojn. Li estas populare konata kiel lerta Demon-kaptanto Pan kaj konstante savas homojn per siaj desegnaĵoj de magia figuro aŭ medikamentoj. Fraĉjo, se vi invitos lin veni ĉi tien, li povos ekzameni la ĉambro de mia bofratino, por vidi, ĉu ekzistas ia malbona spirito tie sin kaŝanta. Se efektive ekzistas, li povos tion konstati. Se vi petos lin kuraci ŝian malsanon, li ankaŭ povos tion fari.”

“Post kiam mi akiros la magiajn desegnaĵojn de la ĉefpastro Wu,” diris Ximen Qing, “ni certigos nin, kie li loĝas, kaj, se necesos, vi do rajdu sur azeno kun mia servoknabo por lin inviti.”

“Estos nenia problemoj,” diris Ying Bojue. “Mi iros kun plezuro. Kaj se tiam la Ĉielo montros kompaton al mia bofratino, ke ŝi povu resaniĝi, mi volontos iri, *koŭtoŭante* sur mia ĉiu paŝo, se necesos.”

Ili kune parolis kelkan tempon, kaj poste Ying Bojue kaj Xie Xida leviĝis kaj foriris.

Kiam Dai’an revenis kun la magiaj desegnaĵoj, ili estis gluitaj sur la pordo de la ĉambro de Florvazo, sed tiun vesperon ŝi ankoraŭ timis kaj diris al Ximen Qing:

“Ĵus la mortinto, kune kun du aliaj homoj, venis min aresti, sed kiam ili vidis, ke vi envenas, ili tuj kuris eksteren kaj sin kaŝis.”

“Vi ne devus kredi je tiaj malbonaj spiritoj,” diris Ximen Qing. “Tio estas nenio. Hieraaŭ fraĵo Ying venis diri al mi, ke tiuj halucinoj estas la rezulto de viaj ekstremaj magreco kaj malforteco. Li diris, ke ekster la urbopordego, en la Templo Kvin Montoj, troviĝas taŭista pastro nomata Pan, kiu estas lerta en la kuracado de homoj per sia magia akvo, kaj ankaŭ en la ekzorcado de malbonaj spiritoj. Morgaŭ matene mi petos fraĵon Ying iri inviti lin, ke li venu vin resanigi. Se efektive ekzistas ia malbona spirito vin ĝenanta, ni ankaŭ povos peti lin forpeli ĝin.”

“Mia bona fraĵo,” diris Florvazo, “sendu inviti lin kiel eble plej baldaŭ. Tiu aĉulo ĵus tre koleris ĉe sia foriro. Kredeble li ree venos morgaŭ. Invitu kiel eble plej rapide tiun taŭistan majstron.”

“Se vi timas,” diris Ximen Qing, “mi sendos servoknabon kun palankeno venigi Arĝenton ĉi tien, por ke ŝi vin akompanu kelkajn tagojn.”

Florvazo skuis sian kapon kaj diris:

“Ne, ne venigu ŝin. Mi timas, ke tio ĝenus ŝin en ŝia laboro.”

“Se estas tiel,” diris Ximen Qing, “mi do venigos la maljunulinon Feng, ke ŝi vin prizorgu dum kelkaj tagoj, ĉu bone?”

Pri tio Florvazo kapjesis. Ximen Qing tuj sendis Lai’an por voki la maljunulinon Feng el la domo en Leona Strato, sed ŝi ne estis tie, lasante la pordon ŝlosita.

Lai’an diris al Orelpurigilo, la edzino de Laizhao:

“Tuj kiam ŝi revenos, nepre diru al ŝi, ke ŝi kiel eble plej rapide venu al la domo de nia mastro. La Sesa Sinjorino ŝin vokas kaj atendas en sia loko.”

Ximen Qing ankaŭ ordonis al Dai’an:

“Morgaŭ matene vi devos akompani vian oĉjon Ying al la templo Kvin Montoj ekster la urbopordego por inviti la taŭistan majstron Pan veni ĉi tien.”

En la sekva tago, la bonzino Wang sin montris. Ŝi venis vidi Florvazon, portante kun si keston da speciale senŝeligita rizo, dudek grandajn platkukojn kaj kesteton da peklitaj kaj spicitaj melongenoj. Kiam Florvazo vidis, ke ŝi venas, ŝi haste diris al Printempa Brilo, ke tiu helpu al ŝi leviĝi en sidan pozicion, por ŝin akcepti. La

bonzino Wang kunmetis la manplatojn sur la brusto kaj salutis ŝin laŭ la budhista maniero, kaj post tio Florvazo invitis ŝin sidiĝi.

“Respektinda Wang,” diris Florvazo, “de kiam vi foriris por aranĝi la presadon de tiu sutro, mi neniam plu vidis eĉ vian ombbron. Mi malsaniĝis ĝis tia seriozeco, kaj vi eĉ ne faris al vi la klopodon veni min vidi.”

“Sinjorino mia,” diris la bonzino Wang, “mi komplete ne sciis pri via malsaniĝo. Mi sciigis pri tio nur kiam la Granda Sinjorino sendis serviston al la bonzinejo la alian tagon. Kaj koncerne la presadon de la sutro, vi probable ne scias, ke inter tiu malĉasta bonzino Xue kaj mi okazis kverelo pri tio. Ĉio, kion mi faris por la sutropreso pro vi, estas *pelo de la fiŝo en la reton*³ de la bonzino Xue, kiu komplotis kun la presisto por akiri al si ŝmirmonon de kvin taeloj da arĝento, dum mi ricevis nenium kupreron. Sinjorino, per tio vi ja kreis al vi fortunon, dum tiu maljuna malĉastulino, en la estonteco, pro tio finiĝos per damniĝo en Aviĉon. Ŝia agaĉo ĵetis min en tian koleran humoron, ke mi eĉ forgesis veni en la naskiĝtago de la Granda Sinjorino.”

“Ĉiu kreas sian propran karmon,” diris Florvazo. “Lasu do al ŝi agi laŭ sia plaĉo. Ne kverelu kun ŝi.”

“Mi havis nenian intencon kvereli kun ŝi,” diris la bonzino Wang.

“La Granda Sinjorino havas malkontentecon kontraŭ vi,” diris Florvazo. “Ŝi diris, ke vi eĉ neglektis la voĉlegon de la sutroj por ŝi.”

“Ho, mia bodisatvo!” protestis la bonzino Wang. “Kvankam mi povas esti iom forgesema, tamen mi neniam kuraĝis neglekti la voĉlegon de la sutroj por ŝi. Mi voĉlegis la sutrojn en mia loko dum la lasta tuta monato, kaj mi finis tion nur hieraŭ. Veninte ĉi tien hodiaŭ, mi unue iris al la malantaŭo por vidi ŝin kaj rakontis al ŝi pri mia plendmotivo. Kiam mi diris al ŝi: ‘Mi ne scias, ke la Sesa Sinjorino estas en malsano, kaj mi havas nenion alian por proponi, krom tiu ĉi kesto da speciale senŝeligita rizo, iom da peklitaj kaj spicitaj melongenoj kaj kelkaj platkukoj, kiujn ŝi povos manĝi kun sia kaĉo,’ la Granda Sinjorino diris al Eta Jado, ke ŝi konduku min ĉi tien por vin vidi.”

Kiam Eta Jado malfermis la kestojn kaj montris al ŝi la enhavojn, Florvazo diris:

“Dankon al vi pro via farita peno.”

“Franjo Printempa Brilo,” diris la bonzino Wang, “prenu du platkukojn kaj varmigilo, por ke mi povu propraokule rigardi vian mastrinon, dum ŝi manĝos ilin kun iom da kaĉo.”

Printempa Brilo do akceptis la proponitajn donacojn kaj ilin formetis.

“Preparu iom da teo por la respektinda majstrino Wang por trinki,” ordonis Florvazo al Printempa Brilo.

“Mi ĵus trinkis iom da teo en la ĉambro de la Granda Sinjorino en la malantaŭo,”

diris la bonzino Wang. “Ordonu al ŝi kuiru iom da kaĉo, por ke mi povu vidi vin manĝi ĝin.”

Baldaŭ Printempa Brilo primetis la tablon kaj surtabligris kvar specojn de kukoj, por regali la bonzinojn Wang kun teo. Post tio ŝi alportis la kaĉon por Florvazo kaj ankaŭ teleron da peklitaj kaj spicitaj melongenoj kaj teleron da varmigigitaj platkukoj, kun paro da eburaj manĝbastonetoj. Printempa Brilo tenis la manĝbastonetojn, dum la nutristino Laŭdezira staris flanke tenante la kaĉobovlon; ili kune helpis al Florvazo manĝi la kaĉon dum kelka tempo. Sed nur post manĝo de du aŭ tri buŝoj da kaĉo kaj mordo de parteto el platkuko, Florvazo jam skuis sian kapon, ĉesis manĝi, kaj diris al ili depreni la manĝilaron.

“Por ni homoj,” diris la bonzino Wang, “*la nutraĵo kaj akvo estas la vivo*. Tiu ĉi estas tre bona kaĉo. Ĉu vi ne prenos ankoraŭ iom pli da ĝi?”

“Mi volontus ĝin manĝi,” diris Florvazo, “se mi povus ĝin engluti.”

Printempa Brilo do formovis la te-tableton. La bonzino Wang levis la litkovrilon flanken kaj, kiam ŝi vidis, ke la karno de la korpo de Florvazo jam ŝrumpis preskaŭ ĝis nenio, la vido donis al ŝi ektimiĝon.

“Ho, sinjorino mia!” ŝi ekkriis. “Kiam mi forlasis vin je la lasta fojo, vi jam fartis sufiĉe pli bone. Kio faris vin tiel malgrasa?”

“Ŝi ja fartis iom pli bone,” diris Laŭdezira. “Ŝia malsano origine komenciĝis kiel rezulto de subpremata kolero, kaj paĉjo invitis kuraciston veni ŝin ekzameni. Ŝi prenis la medikamentojn de li preskribitajn ĉiutage, kaj ŝi jam preskaŭ resaniĝis. Sed, en la oka monato, ŝia knaba bebo estis frapita de ektimo, kaj pro tio li malsaniĝis. Mia mastrino estis multege maltrankvila pri li tage kaj nokte, kaj ĉiam sin multe okupis pri lia prizorgo, tiel ke ŝi eĉ ne povis endormiĝi. Kvankam ŝi esperis, ke li povos resaniĝi, tamen, kontraŭ ŝia atendo, li mortis. Ŝi ne povis sin deteni de plorado tutajn tagojn, kaj, krom tio, ŝi suferis de subpremata kolero kaj sekreta rankoro en sia koro. Sub tiaj cirkonstancoj eĉ persono kun korpo forĝita el fero aŭ ŝtono apenaŭ povus elteni ĉion ĉi tion. Estas tute ne mirinde, ke ŝi remalsaniĝis ĝis tia seriozeco. Kiam oni suferas de subpremata kolero, oni povas fari plendon al iu ajn alia, kaj tio povas helpi al oni mildigi sian doloron en la koro. Sed mia mastrino ne eligas eĉ unu vorton ĉi-rilate. Ŝi restas silenta, eĉ se oni premas ŝin per demandoj.”

“Kio aŭ kiu kaŭzis al ŝi koleron?” demandis la bonzino Wang. “Via mastro tiel amas ŝin, kaj la Granda Sinjorino ŝin tre respektas. El la kvin aŭ ses aliaj sinjorinoj ĉirkaŭ ŝi, kiu povus en efektiveco doni al ŝi la kaŭzon de kolero?”

“Respektiginda Wang,” diris la nutristino, “ĉu vi vere ne scias...?”

Ĉe tio, sin turninte al Printempa Gracio, ŝi diris:

“Iru eksteren kaj pririgardu, ĉu la pordo estas fermita aŭ ne.”

Poste ŝi daŭrigis:

“Estis la Kvina Sinjorino en la apuda ĉambro, kiu ĉagrenis nian mastrinon. La kato el ŝia loko ungvundis la manon de ŝia knaba bebo, kio kaŭzis al li konvulsiojn. Kiam la mastro venis hejmen, li demandis ŝin pri tio, sed ŝi detenis sin de diro pri la okazaĵo. Nur pli poste, kiam la Granda Sinjorino rakontis al li, kio okazis, li kaptis kaj ĵetis la katon kontraŭ ŝtonon ĝis morto; sed la Kvina Sinjorino ankoraŭ rifuzis konfesi sian kulpon kaj eĉ elverŝis sian koleron sur nin. En la oka monato, post kiam la knaba bebo mortis, ŝi ĉiutage *fingromontris la moruson kaj insultis la soforon*⁴ el sia ĉambro, esprimante sian malican plezuron en la malfeliĉo de nia mastrino en cent diversaj manieroj. Nia mastrino, en sia ĉambro ĉi tie, povis aŭdi perfekte klare ĉion, kion ŝi diris. Kiel ŝi povus sin deteni de ĉagreniĝo? Ĉiukaze, kvankam ŝi forte ĉagreniĝis en kaŝeco, ŝi ne lasis siajn larmojn montritaj. Ĝuste pro tiaj subpremata kolero kaj sekreta rankoro en sia koro, ŝi remalsaniĝis ĝis tia severeco. Nur la Ĉielo scias, kiel bonkora estas nia mastrino. La bonajn aferojn, kiuj okazas, ŝi tenas en sia koro; la malbonajn aferojn, kiuj okazas, ŝi same tenas en sia koro. En siaj rilatoj kun la aliaj edzinoj de sia edzo, ŝi neniam permesis al si ruĝiĝi de kolero kontraŭ iu ajn alia. Se ŝi havas aparte belan veston, ŝi detenas sin de apero en ĝi, antaŭ ol la aliaj povas havi similan por porti sur si. En tiu ĉi tuta domanaro ekzistas neniu persono, kiu ne ricevus de ŝi bonon el siaj rilatoj kun ŝi. Sed, kun bedaŭro mi diras ke, malgraŭ ricevo de bono el ŝia malavareco, ekzistas tiuj, kiuj havas neniam bonajn vortojn por diri kontraŭ ŝi post ŝia dorso.”

“Kial do ili ne diras bonajn vortojn pri ŝi?” demandis la bonzino Wang.

“Kiel ekzemple,” respondis Laŭdezira, “iam la maljuna sinjorino Pan, la patrino de la Sesa Sinjorino, venis viziti sian filinon. Tiam la mastro volis dormi en la ĉambro de la Kvina Sinjorino, sekve la maljuna sinjorino venis ĉi tien por nokti kun nia mastrino. Kiam ŝi estis preta foriri, nia mastrino donis al ŝi kelkajn ŝu-suprojn, vestojn kaj iom da mono, fakte, ekzistis preskaŭ nenio, kion ŝi ne volus doni al ŝi, sed la Kvina Sinjorino diris neniujn bonajn vortojn pri nia mastrino.”

Kiam Florvazo aŭdis tion, ŝi riproĉis la nutristinon:

“Ne diru tiajn vortojn, vi virinaĉo! Kial vi senmotive kritikis ŝin? Lasu al ŝi agi laŭ sia plaĉo. *La Ĉielo estas altega, tamen ĝi neniam fanfaronas; la Tero estas dikega, tamen ĝi neniam parolas.*”

“Mia Sinjoro Budho,” ekkriis la bonzino Wang, “Kiu povus scii, ke vi havas tiel bonan koron? La Ĉielo havas okulojn kaj vidas ĉion sur la tero. Vi certe estos rekompenĉita por viaj bonoj en la estonteco.”

“Respektinda majstrino Wang,” diris Florvazo, “Kian rekompencon mi povus ricevi? Mi eĉ ne povis protekti la vivon de mia sola infano, kaj nun mi mem estas destinita vivi ne pli longe. Suferante tian malsanon en mia malsupra korpo, eĉ se mi estus fantomo, mi povus fari nenium facilan paŝon dum marŝo en tia stato. Mi volus

doni iom da arĝento al vi, respektinda majstrino Wang, kun la espero, ke en la estonteco, post kiam mi mortos, vi povos aranĝi, ke kelkaj bonzinoj regule voĉlegu por mi la sutron *Sanga Kuvo*, por elaĉeti min el tiu ĉi malbona karmo mia.”

“Mia bodisatvo!” ekkriis la bonzino Wang. “Vi faras al vi tro da zorgoj! Via koro estas tiel bona, ke la Ĉielo certe vin protektos.”

Dum ili parolis, Qintong eniris kaj diris al Printempa Brilo:

“Paĉjo jam donis ordonon, ke vi ordigu la ĉambron. La bofrato Hua la Unua baldaŭ envenos por vidi, kiel fartas via mastrino. Nun li sidas en la antaŭa halo.”

La bonzino Wang do leviĝis kaj diris:

“Mi iros al la malantaŭo por kelka tempo.”

“Respektinda majstrino,” diris Florvazo, “ne reiru hejmen, sed restu kaj tenu kompanion kun mi kelkajn tagojn. Mi havas aliajn aferojn por diskuti kun vi.”

“Mia mastrino,” respondis la bonzino Wang, “mi ne foriros.”

Baldaŭ poste Ximen Qing enkondukis Hua la Unuan por vizito, sed Florvazo restis kuŝanta sur la briklito sen diri vortojn.

“Mi sciis nenion pri via malsano,” diris la bofrato Hua, “ĝis hieraŭ, kiam servisto el via loko venis diri tion al mi. Morgaŭ ankaŭ via bofratino venos vin vidi.”

Florvazo respondis nur:

“Mi faras al vi multe da klopodo.”

Kaj poste ŝi turnis sian vizaĝon en la alia direkto.

La bofrato Hua sidis kun ŝi kelkan tempon kaj poste leviĝis kaj revenis al la antaŭo, kie li diris al Ximen Qing:

“Kiam mia mortinta onklo, la maljuna eŭnuko, servis kiel la gubernatoro de Guangnan, li reportis kun si iom da medikamento *pseŭdoginsengo* (*Panax pseudo-ginseng*). Ĉu ŝi jam uzis tian medikamenton aŭ ne? Kia ajn speco de utersangado, kian virino suferas, se kvin unc-centonoj da tiu ĉi medikamento en pulvorigita formo estos prenita kun vino, ĝi tuj haltigos la sang-elfluon. Mia bofratino ankoraŭ konservas kvanton da tia herba medikamento. Kial ŝi ne prenas iom da ĝi?”

“Ŝi provis ankaŭ tiun medikamenton,” diris Ximen Qing. “La alian tagon, la prefeko Hu de Dongping venis fari viziton, kaj ni diskutis pri tiu ĉi malsano. Li proponis ankaŭ preskribon, konsistantan el karbonigitaj palmaj fibroj kaj blankaj krestofloroj, dekokitaj kun vino, sed ĝi haltigis ŝian sangadon nur por unu tago, kaj poste la sango elfluis eĉ pli abunde.”

“Tiuokaze,” diris la bofrato Hua, “ŝia kondiĉo pruviĝas malfacile kuracebla. Bofraĉjo, vi devus prepari por ŝi ĉerkajn tabulojn kiel eble plej frue, por ke ili estu pretaj nur en okazo de bezono. Morgaŭ mi sendos ŝian bofratinon veni ŝin vidi.”

Kiam li finis parolon, li stariĝis kaj foriris.

Kiam la nutristino kaj Printempa Brilo sin okupis je ŝanĝo de la tavolo da sorba

herbopapero sub la korpo de Florvazo, la maljunulino Feng envenis kaj salutis ilin per riverenco.

“Mia panjo Feng,” diris Laŭdezira, “vi nun jam vin tenas grandsinjorine. Kial vi ne venis vidi nian mastrinon? Hieraŭ paĉjo sendis Lai’an venigi vin, sed li diris, ke via pordo estas ŝlosita. Kien do vi foriris?”

“Mi ne povas rakonti tion al vi per kelkaj vortoj,” diris la maljunulino Feng, “kian malfacilan vivon mi vivas, ĉiutage irante al la templo por ĉeesti budhismajn ceremoniojn. Mi ekiras tien frue en la mateno kaj revenas en la vespera mallumo, ĉar mi devas havi traktadon kun la bonzo Zhang, la bonzo Li, aŭ la bonzo Wang.”

“Kaj tamen, kiel vi povus havi la rezistpovon kontraŭ tiuj ĉi bonzoj?” demandis Laŭdezira. “Feliĉe, la pia majstrino Wang ne estas ĉi tie vin aŭskultante.”

Tion aŭdinte, Florvazo ekridetis, dirante:

“Nia maljuna panjo Feng neniel povas fari tian aferacon. Ŝi nur parolas ŝercan sensencaĵon.”

“Nia maljuna panjo Feng,” diris Laŭdezira, “ĝuste kiam vi estis plej bezonata, vi vin ne montris. Dum la lastaj tagoj, la mastrino ne englutis eĉ unu plenuŝon da kaĉo, ĉar ŝi estas tre deprimita en la koro. Sed nun, tuj kiam vi alvenis, vi jam ridigis ŝin. Se vi restos kaj prizorgos ŝin nur kelkajn tagojn, mi estas certa, ke ŝia malsano malaperos.”

“Jes,” diris la maljuna Feng, “mi estas granda magiisto, kiu kapablas forturni la katastrofon de la mastrino.”

Ĉe tio ĉiuj ree ekridis.

La maljuna Feng do etendis sian manon por palpi la korpon de Florvazo sub la litkovrilo kaj diris:

“Mastrino, ĉio estos en ordo, se nur vi povos senti vin iom pli bone.”

Poste ŝi daŭrigis:

“Ĉu ŝi povos ellitiĝi por sidi sur fekujo per si mem?”

“Estus bone, se ŝi povus,” diris Printempa Brilo.

“Antaŭ kelkaj tagoj, ŝi dufoje faris sian plejblon ellitiĝi subtenate de ni. Sed dum la lastaj du tagoj ŝi ĉiam restis sur la briklito. Ni sternis tavolon da sorba herbopapero sub ŝi kaj ŝanĝis ĝin du aŭ tri fojojn en ĉiu tago.”

Dum ili babilis, Ximen Qing envenis kaj, ekvidinte la maljunulinon Feng, diris:

“Maljuna Feng, vi devus ofte veni ĉi tien por vidi ŝin. Kiel do okazis, ke post via foriro vi neniam plu revenis?”

“Mastro,” protestis la maljunulino, “Kiel mi povus intence ne reveni? La lastaj kelkaj tagoj estis ĝuste la sezono de la jaro por pekli legomojn kun la espero kapti la okazon perlabori kelkajn monerojn. Kondiĉe ke mi havas kvanton da legomoj en la domo, se iu mizerulo estas kondukita al mi, mi povos doni al li iom por manĝi. Alie,

kiel mi povos trovi la monerojn por aĉeti la legomon?”

“Kial vi ne diris tion al mi?” diris Ximen Qing. La alian tagon oni rikoltis legomojn sur mia bieno. Se mi donus parton de la rikoltaĵo, tio sufiĉus.”

“Mi multe dankas vin,” diris la maljunulino, “sed mi ne kuraĝis vin ĝeni.”

Tion dirinte, la maljunulino eliris kaj pasis en alian ĉambron.

Ximen Qing sidigis sur la rando de la briklito, apud kiu Printempa Brilo sin okupis je bruligo de rut-incenso.

“Kiel vi vin sentas en la koro?” demandis Ximen Qing.

Poste li sin turnis al Printempa Brilo kaj daŭrigis:

“Ĉu via panjo manĝis kaĉon aŭ ne ĉi-matene?”

“Estas iom pli bone ol antaŭe: ŝi manĝis iom,” diris Printempa Brilo. “La majstrino Wang alportis al ŝi kelkajn platkukojn, kaj ilin mi varmigis por ŝi, sed ŝi mordetis nur iom da ili. Ŝi povis engluti nur kelkajn buŝojn da kaĉo, antaŭ ol ŝi rezignis la manĝon.”

“Momenton antaŭe,” diris Ximen Qing, “fraĉjo Ying kaj mia servoknabo iris eksteren de la urbopordego por inviti la taŭistan pastron Pan veni vin ekzameni, sed li ne estis tie. Morgaŭ mi sendos Laibao sur azeno ree lin serĉi.”

“Sendu iun serĉi lin kiel eble plej baldaŭ,” diris Florvazo. “Apenaŭ mi fermas miajn okulojn, tiu ulaĉo ekaperas antaŭ mi kaj min persekutas.”

“Tio estas nur la rezulto de via malfortiĝinta spirito,” diris Ximen Qing. “Nur lasu vian menson en trankvilo kaj malstreĉiteco, kaj ĉesigu vian imagon pri li. Mi estas certa, ke post kiam mi venigos tiun taŭistan majstron ĉi tien por forpeli tiun malbonan influon por vi kaj vi prenos iom el lia medikamento, vi resaniĝos.”

“Mia kara fraĉjo,” diris Florvazo, “de kiam mi estis trafita de tiu ĉi terura malsano, jam restas al mi preskaŭ neniu espero resaniĝi. Mi esperis, ke mi povos resti kun vi, por ke mi povu dividi kun vi la vivon kelkajn pliajn jarojn, kaj poste, eĉ se mi mortos, ni povos jam ĝui la pli longan kunvivon kiel geedzoj. Sed kiu povus atendi, ke nun, en mia aĝo de dudek sep jaroj, post kiam mi unue perdis mian karan infaneton kaj poste, pro mia malbona sorto, estis frapita de tiu ĉi fatala malfeliĉo, mi devos forlasi vin por ĉiam? Se mi iam revidus vin, nia reenkontiĝo okazus nur ĉe la enirejo de la Infero.”

Parolante, ŝi prenis Ximen Qing je la mano kaj firme tenis ĝin en sia propra, dum la larmoj pluve falis el ŝiaj du okuloj kun senĉesaj plorsingultoj, ĝis ŝi sufokiĝis kaj plu povis eligi nenian sonon.

Ankaŭ Ximen Qing estis komplete venkita de tristego kaj ploris, dirante:

“Mia bona franjo, se vi havas ion por diri, diru nur!”

Dum ili kune ploradis en ŝia dormoĉambro, subite Quintong envenis kaj diris:

“Iu servosoldato venis sciigi vin, paĉjo, ke morgaŭ estas la dek-kvina tago de

la monato. Oni atendas, ke vi partoprenu en la ceremonio de riverenco al la imperiestra tabuleto kaj prezidu en la ĝenerala kunsido por diskuti la nesolvitajn aferojn en la oficejo. Ĉu vi iros aŭ ne? La servosoldato atendas vian respondon, por ke ili povu vin servi ĉe la okazo.”

“Mi ne povos iri morgaŭ,” diris Ximen Qing. “Prenu mian vizitkarton kaj transdonu ĝin al Lia Honoro Xia, por ke li prizorgu la ceremonion riverenci al la imperiestra tabuleto sen mi.”

Qintong diris jes kaj foriris.

“Mia bona paĉjo,” diris Florvazo, “se vi faros laŭ mia deziro, morgaŭ nepre iru al la oficejo. Vi ne devus neglekti viajn publikajn aferojn pro mi. Mi scias, kiam mi mortos: estas ankoraŭ tro frue.”

“Mi restos en la hejmo kaj tenos kompanion kun vi kelkajn tagojn,” diris Ximen Qing. “Kiel mi povus elteni la foriron de vi? Metu vian menson en malstreĉitecon kaj estu trankvila. Ĝus la bofrato Hua proponis al mi, ke mi ne plu prokrastu prepari la tabulojn de ‘longviveco’ por via ĉerko, kun la espero, ke via malfeliĉo povos esti fortornita per ili. Tiukaze vi certe resaniĝos.”

Florvazo konsente kapjesis kaj diris:

“Do estu tiele. Sed ne lasu al vi esti fraŭdita, ke vi vane elspezos tro da mono. Sufiĉos, se vi elspezos ĉirkaŭ dek taelojn da arĝento por aĉeti al mi pretfaritan ĉerkon, kaj poste enterigu min apud la tombo de via unua edzino. Sed ne kremaciigu min, se vi alte ŝatos niajn reciprokajn sentojn kiel edzo kaj edzino. Tiukaze, pli aŭ malpli frue, estos por mi pli konvene preni al mi iom el la oferaĵoj prezentitaj al la mortintoj. La membroj de via familio estas tiel grandnombraj, ke vi bezonas konsideri pri la ŝparo, por ke vi povu bone vivteni ilin en la estonteco.”

Aŭdinte ŝiajn vortojn, li ekhavis la senton, kvazaŭ tranĉilo tranĉus lian hepaton kaj galvezikon, kaj glavo trapikus lian korpon kaj koron.

“Mia karega franjo,” li diris kun plenvizaĝaj larmoj, “kiel vi povus paroli tiamaniere? Eĉ se mi, Ximen Qing, estus ekstreme malriĉa, mi neniel povus lasi vin traktata en nedigna maniero.”

Dum ili parolis, Luna Sinjorino envenis, kun malgranda korbomanĝo plena de freŝaj pomoj, kaj diris:

“Franjo Florvazo, mia bofratino Wu sendis tiujn ĉi pomojn al vi por manĝi.”

Ŝi do diris al Printempa Brilo:

“Lavu tiujn ĉi puraj kaj poste tranĉu ilin en pecojn por via panjo.”

“Ankoraŭfoje,” diris Florvazo, “mi dankas vian bofratinon pro ŝia zorgo pri mi.”

Momenton poste Printempa Brilo senŝeligis la pomojn, tranĉis ilin en pecojn, kaj metis ilin en bovlon. Ŝi elektis pecon kaj metis ĝin en la buŝon de sia mastrino, sed tiu nur maĉis el ĝi iom da suko por gustumi kaj poste elbuŝigis ĝin. Luna

SinJORino timis lacigi ŝin, kaj helpis al ŝi kuŝiĝi sur sia flanko, kun la vizaĝo al la muro, kaj lasis ŝin dormi en paco.

Ximen Qing kaj Luna SinJORino do eliris kaj konsiliĝis unu kun la alia pri la situacio.

“Koncerne la fratino Florvazo,” ŝi diris, “ŝajnas al mi, ke ŝia malsano jam proksimiĝas al kriza stadio. Vi devus prepari kompletan da ĉerkaj tabuloj por ŝi kiel eble plej baldaŭ, por ke ili povu esti uzablaj en okazo de bezono. Se vi atendas ĝis en la lasta momento, tiam ĉio estas en tia konfuzo, ke estos malfacile trovi dece bonan ĉerkon en mallonga tempo. Tiukaze, vi povos *esti kiel ĉevalo penanta kapti raton*.⁵”

“Hodiaŭ,” respondis Ximen Qing, “la bofrato Hua proponis la samon al mi. Ĵus, kiam mi menciis tion ĉi al ŝi, ŝi rekomendis, ke mi ne elspezu tro multe da mono, kaj diris, ke ŝi kontentiĝos kun pretfarita ĉerko. Ŝi diris ankaŭ: ‘La membroj de via familio estas tiel grandnombraj, ke vi bezonas konsideri pri la ŝparo, por ke vi povu bone vivteni ilin en la estonteco.’ Ŝiaj vortoj profunde kortuŝis min, kaj mi estis forte afliktita eĉ ĝis nun.”

Poste li daŭrigis:

“Ni do atendu, ĝis la taŭista majstro Pan venos, kaj faru konsideron pri la afero, antaŭ ol serĉi por ŝi ĉerkon.”

“Vi ne klare vidas la situacion,” diris Luna SinJORino. “Rigardu, kiel ŝi jam ŝanĝiĝis. Ŝi fariĝis tiel malgrasa, ke ŝi apenaŭ konservas sian homan formon. Ŝi perdis la apetiton, ĝis la grado ne povi trinki eĉ guton da akvo. Vi ankoraŭ esperas, ke ŝi resaniĝos. Ni devus esti preparitaj por du eventualaĵoj, *kiel se oni tamburas kaj marŝas antaŭen unuflanke kaj ŝvingas la flagon por signali retiriĝon aliflanke*.⁶ Se ŝi estos sufiĉe feliĉa por resaniĝi, ni povos ĉiam teni la ĉerkon por doni al iu alia. Tio kostos al ni ne tro multe.”

“Konsentite!” diris Ximen Qing.

Li do iris al la granda halo kaj sendis servoknabon alvoki Ben la Kvaran.

Kiam Ben la Kvara alvenis en la akceptan halon, Ximen Qing demandis lin:

“Kiu, kiom vi scias, havas la plej bonajn ĉerkajn tabulojn por vendo? Mi volus, ke vi kaj mia bofilo prenu iom da arĝento kun vi kaj iru trovi kompletan.”

“Laŭ mia scio, la loko de la bataliona komandanto Chen ĉe Granda Strato,” diris Ben la Kvara, “lastatempe akiris kelkajn kompletojn da bonaj ĉerkaj tabuloj.”

“Se li kavas bonajn uzeblajn,” diris Ximen Qing, sin turnante al Chen Jingji, “vi iru al la malantaŭo kaj petu de via bopanjino kvin grandajn arĝentajn ingotojn⁷, por ke vi du povu iri trovi kompletan.”

Baldaŭ Chen Jingji revenis kun kvin arĝentaj ingotoj kaj foriris por la komisiono.

Ili revenis nur post la tagmezo.

“Ni iris al la loko de la bataliona komandanto Chen kaj pririgardis ĉiujn ĉerkajn tabulojn, kiujn li havas,” diris Chen Jingji, “sed ni trovis ilin mezkvalitaj, kaj la prezo, kiun li postulis, estas tro alta. Sur nia revena vojo ni hazarde renkontis vian boparencon Qiao surstrate, kaj li diris, ke la *ĝujfeno* Shang havas kompletan da bonaj ĉerkaj tabuloj. Origine ili estis reportitaj de lia patro el sia oficevojaĝo kiel prefektuja juĝisto de Chengdu en Sichuan kaj estis preparitaj por lia edzino. En la komenco troviĝis du kompletaj da ĉerkaj tabuloj produktitaj en la loko Persika Kaverno, unu el kiuj jam estis uzita, sekve tiu ĉi estas la sola kompleto restanta. Tiu ĉi estas perfekta kompleto konsistanta el kvin pecoj: du flankoj, malsupro, kovrilo, kaj antaŭo, kaj la nepre postulata prezo estas tricent sepdek taeloj da arĝento. La boparenco Qiao iris kun ni tien por pririgardi tiujn ĉerkajn tabulojn kaj trovis, ke ili efektive estas de senkompare supera kvalito. La boparenco Qiao marĉandis kun la *ĝujfeno* Shang kelkan tempon, sed li nur volis redukti la prezon je 50 taeloj da arĝento. Li diris, ke se ne pro la fakto, ke li intencas iri al la ĉefurbo por partopreni en la metropola ekzameno en la estonta jaro, li certe ne konsentus cedi tiun ĉi kompletan da ĉerkaj tabuloj.”

“Ĉar nia kara boparenco Qiao tion proponis,” diris Ximen Qing, “ni pripesu tricent dudek taelojn da arĝento kaj transportigu la tabulojn ĉi tien. Sed vi faru tion senbrue, sen *svingi sonoriletojn kaj bati tamburojn*!”

“Li jam akceptis niajn ducent kvindek taelojn,” diris Chen Jingji, “sekve ni ŝuldas al li ankoraŭ sepdek taelojn, por fini la negocon.”

Li do revenis al la malantaŭo kaj diris al Luna Sinjorino, ke ŝi donu al li pliajn sepdek taelojn da arĝento. Preninte la arĝenton, la du foriris por finplenumi la komision.

Ĉe la vespera krepusko, subite aperis kelkaj fortikuloj, kiuj enportis la ĉerkajn tabulojn tra la pordego, envolvitajn en skarлата felto, metis ilin en la antaŭan korton, kaj, foriginte la envolvajojn, montris ilin al Ximen Qing. Post pririgardo Ximen Qing trovis, ke ili efektive estas tre bonkvalitaj ĉerkaj tabuloj. Dungitaj metiistoj tuj estis venigitaj por ilin segi, kaj dum la segado, la tabuloj eligis aroman odoron, kiu agrable tiklis la nazon. Ĉiu peco estis kvin kolorojn dika, du futojn kaj kvin kolorojn larĝa, kaj sep futojn kaj kvin kolorojn longa.

La koro de Ximen Qing estis plena de ĝojo kaj kontenteco. Poste li venigis Ying Bojue kaj montris ilin al li, dirante:

“Ĉu vi iam antaŭe vidis tiel bonajn ĉerkajn tabulojn?”

Ying Bojue esprimis sian admiron kaj ŝutis senfinajn laŭdojn pri ili.

“Kiel oni diras, ke *en la mondo ĉio havas sian propran posedanton*. Tiuj ĉi ĉerkaj tabuloj estas destinitaj sole nur por ŝi. Estas klare evidente, ke sufiĉos al mia bofratino, kiu havis la fortunon edziniĝi al vi, fraĵo, ke ŝi finiĝos en posedo de tiuj

ĉi ĉerkaj tabuloj.”

Poste, sin turninte al la metiistoj, li diris:

“Se vi nur donos vian atenton por kiel eble plej bone fari vian laboron, via dunganto rekompencos vin per kvin taeloj da arĝento.”

“Komprene!” respondis la metiistoj, kaj ili daŭrigis sian diligentan laboron en la antaŭa halo, laborante dum la tuta nokto por konstrui la ĉerkon kiel eble plej rapide.

Ying Bojue do rekomendis al Laibao,:

“Morgaŭ frumatene, ĉe la tagiĝo, vi devos iri inviti la taŭistan majstron Pan. Se li volontos veni, vi akompanu lin ĉi tien. Tiu ĉi afero toleros nenian prokraston.”

Fininte sian parolon, li daŭrigis la kompanion kun Ximen Qing tiuvespere en la antaŭa halo, rigardante la laboron de la metiistoj, kiuj faris la ĉerkon, kaj li rehejmenigis nur post la noktiĝo.

“Revenu kiel eble plej frue morgaŭ matene,” diris Ximen Qing. “Mi timas, ke la taŭista majstro Pan povos alveni sufiĉe frue.”

“Konsentite!” respondis Ying Bojue.

Poste li diris ĝisrevidon kaj eliris tra la pordego.

Ni daŭrigu nian rakonton. Kiam la maljunulino Feng kaj la bonzino Wang tenis kompanion kun Florvazo en ŝia ĉambro tiunokte, sin montris Ximen Qing, kiu envenis por vidi ŝin post kiam la laboro haltis por ripozo en la antaŭo, kaj li volis dormi en la ĉambro.

Florvazo faris rifuzon, dirante:

“Vi ne devus havi tian intencon. En tiu ĉi ĉambro regas malpureco kaj malordo, kaj ankaŭ ili du estas ĉi tie. Tio estas nekonvena. Vi iru dormi en iu ajn alia loko.”

Vidante, ke la bonzino Wang kaj la maljunulino Feng estas tie, Ximen Qing do iris en la ĉambron de Ora Lotuso por dormi tie.

Florvazo diris al Printempa Brilo, ke ŝi fermu la postan pordon kaj certiĝu pri la riglado. Poste ŝi ordonis al ŝi eklumigi la lampon, malfermi ŝian kofron, kaj eligi el ĝi kelkajn vestojn kaj arĝentajn kap-ornamaĵojn, kaj meti ilin apud ŝi.

Antaŭ ĉio, ŝi vokis la bonzino Wang alproksimiĝi, donis al ŝi kvintaelan arĝentan ingoton, kune kun rulo da silko, kaj diris:

“Post kiam mi mortos, ĉiaokaze, vi nepre invitu kelkajn bonzinojn voĉlegi por mi la sutron *Sanga Kuvo*.”

“Mia sinjorino,” protestis la bonzino Wang, “vi estas tro maltrankvila. Kredeble vi resaniĝos.”

“Prenu tion, kion mi donas al vi,” diris Florvazo, “kaj ne diru al la Granda Sinjorino, ke mi donis al vi arĝenton. Diru al ŝi nur, ke mi donis al vi tiun ĉi rulon da silko por kompensi vian aranĝon de la voĉlego de la sutro.”

“Mi komprenas, kion vi diras,” diris la bonzino Wang, kaj ŝi akceptis la

arĝenton kaj la silkon.

Poste Florvazo vokis al si ankaŭ la maljunulinon Feng, ŝi prenis kvar taelojn da arĝento el sub sia kapkuseno, kune kun blanka silka jako, flavan damaskan jupon kaj arĝentan kombilon, kaj donis ilin al ŝi, dirante:

“Maljuna Feng, vi estas mia familiara kunulino. Vi ĉiam servis min ekde mia infaneco ĝis la nuna tempo. Nun, post kiam mi mortos, tiuj ĉi objektoj povos servi al vi kiel memoraĵoj, kaj vi povos uzi tiun ĉi arĝenton por pagi la koston de via ĉerko. Koncerne la tian domon, vi ne bezonos esti maltrankvila. Mi parolos al via mastro pri ĝi, por ke vi povu ĉiam loĝi tie kiel ĝia gardanto. Mi estas certa, ke li neniam elpelos vin el ĝi.”

La maljunulino Feng akceptis la arĝenton kaj la vestojn permane kaj genuiĝis por *koŭtoŭi* al ŝi kun larmoj en la okuloj, dirante:

“Ŝajnas, ke mia bona ŝanco finiĝos. Se nur vi restos vivanta, mi povos kalkuli je vi por protekti min. Sed se io malbona okazus al vi, tiam de kiu mi povus min dependi?”

Florvazo vokis al si ankaŭ la nutristinon Laŭdezira kaj donis al ŝi purpuran damaskan jakon, bluan damaskan jupon, malnovan satenan mantelon, du harpinglojn kun ora kapeto, kaj arĝentan diademon, dirante:

“Tiuj ĉi objektoj estos la pruvo de la fakto, ke vi mamnutris mian knaban bebon. Nun, la knabeto jam mortis, sed, kiel mi diris, mi ne volas, ke via laboro finiĝu post la ĉeso de via mamnutrado. Estis mia espero, ke se nur mi restos vivanta, mi povos havi alian okazon por vin plu uzi. Kaj tamen nun, neatendite, mi baldaŭ mortos, sed mi parolos al via mastro kaj la Granda Sinjorino kaj proponos, ke post mia morto, se la Granda Sinjorino naskos filon, ili restigu vin kiel la mamnutristinon de ŝia infaneto. Mi nun donas tiujn ĉi objektojn al vi kiel memoraĵojn. Volu do ne plendi kontraŭ mi.”

La nutristino falis sur la genuojn kaj *koŭtoŭis*, dirante kun larmoj en la okuloj:

“Mi havis la solan esperon, ke mi povos servi vin ĝis la fino. Vi neniam montris vian koleran mienon al mi, nek levis vian voĉon riproĉi min. Estas mia malbona ŝanco, ke la bebo mortis, kaj vi estis trafita de tiu ĉi fatala malsano. Bonvolu, ĉiaokaze, nepre diri al la Granda Sinjorino, ke mia edzo jam mortis, kaj mi esperas, ke se mi nur vivos, mi povos daŭrigi la servon al la mastro kaj la mastrino. Se mi devos foriri, kien do mi iros?”

Kiam ŝi finis sian parolon, ŝi akceptis la vestojn kaj la kap-ornamaĵojn, *koŭtoŭis*, kaj poste levigis kaj staris flanke, senĉese forviŝante larmojn el siaj okuloj.

Florvazo do alvokis Printempan Brilon kaj Printempan Gracion, kiuj genuiĝis antaŭ ŝi dum ŝi alparolis ilin:

“Ankaŭ vi du servis min ekde via infaneco. Nu, post kiam mi mortos, mi ne

povos plu zorgi pri vi. Al vi ambaŭ ne mankas vestoj por porti, sekve ne necesas, ke mi donu al vi iun ajn veston, sed mi donos al ĉiu el vi tiujn ĉi du paroĵn da arĝentaj harpingloj kun ora kapo kaj tiujn ĉi du florajn kap-ornamaĵojn el oro, kiel memorajojn. Kiel mia pli aĝa servoknabino, Printempa Brilo, ĉar via mastro jam defloris vin, vi ne povos forlasi tiun ĉi familion. Mi petos la Grandan Sinjorinon lasi vin servi en ŝia loko. Kiel mia pli juna servoknabino, Printempa Gracio, mi petos la Grandan Sinjorinon serĉi al vi alian familion por servi, por eviti, ke post mia morto oni ĵetu al vi oblikvan rigardon en tiu ĉi loko, kaj moku vin kiel senmastran sklavinon. Mi ne volas, ke miaj servoknabinoj suferu malestimon, kaj mi tre timas, ke vi povos trovi neniun alian mastrinon, kiu povus toleri, same kiel mi, tiajn petolaĵojn kaj kapricojn kvazaŭ de trodorlotita infano, kiajn vi kutime montris, dum vi servis ĉe mi. Ho, kia kompatinda infano!”

La servoknabino Printempa Gracio, genuante kaj plorante, diris:

“Panĵo! Mia bona panĵo! Mi ne forlasos ĉi tiun lokon eĉ ĝis la morto!”

“Ne estu stulta,” diris Florvazo. “Se vi restos en tiu ĉi loko, kiun vi servos?”

“Mi gardos vian spirit-tabuleton,” diris Printempa Gracio.

“Eĉ se oferado povos esti farata al mia spirit-tabuleto dum kelkaj tagoj,” diris Florvazo, “finfine venos la tago, en kiu ĝi estos forbruligita. Tiam vi havos neniun alian eblecon, ol forlasi ĉi tiun lokon.”

“Mi do servu la Grandan Sinjorinon kune kun mia franĵo Printempa Brilo,” diris la servoknabino.

“Nu bone, estu do tiele,” diris Florvazo.

La knabino Printempa Gracio estis ankoraŭ iom tro naŭva por plene kompreni la situacion, sed la knabino Printempa Brilo, aŭdinte la rekomendojn de sia mastrino, prenis la objektojn, kiujn ŝia mastrino donis, eksplodis per tiel kordolora plorego, ke ŝi apenaŭ povis eligi eĉ unu vorton.

Vere:

Larmantaj okuloj fikse rigardas larmantajn okulojn;

Kor-rompita persono simpatias alian kor-rompitan.

Tiun nokton Florvazo donis al ĉiu el ili siajn lastajn vortojn.

En la sekva tagiĝo Ximen Qing envenis en ŝian ĉambron, kaj Florvazo demandis lin:

“Ĉu vi jam aĉetis ĉerkon por mi aŭ ne?”

“La ĉerkaj tabuloj jam estis aĉetitaj kaj alportitaj al nia domo hieraŭ,” respondis Ximen Qing, “kaj nun ili estas farataj en ĉerkon en la antaŭo, kun la espero, ke via malsano povos esti forigita per tio. Se vi resaniĝos, ni preferos iam fordoni ĝin al iu alia.”

“Kiom da arĝento vi elspezis por la tabuloj?” demandis Florvazo. “Vi ne devus

vane elspezi tro da mono.”

“Ne tre multe,” respondis Ximen Qing. “Mi elspezis nur iom pli ol cent taelojn da arĝento.”

“Estas tro!” diris Florvazo. “Do lasu ĝin preta por mi!”

Parolinte kun ŝi iom da tempo, Ximen Qing revenis al la antaŭo por rigardi la iradon de la ĉerkofarado.

Poste Luna Sinjorino kaj Gracia Li venis ŝin vidi. Vidante, ke ŝi estas en ekstreme serioza stato, ili demandis:

“Franjo Florvazo, kiel vi vin sentas?”

Florvazo kaptis Lunan Sinjorinon je la mano kaj ekploris, dirante:

“Granda Franjo, mi neniel povos resaniĝi.”

Ankaŭ Luna Sinjorino ploris, kaj ŝi diris:

“Franjo Florvazo, se vi havas ion por diri, parolu! La Dua Sinjorino estas ĉi tie kun mi, vi povas diri al ni du.”

“Kion mi havas por diri?” diris Florvazo. “Dum tiuj ĉi jaroj, en kiuj ni estas fratinoj, vi estas ĉiam tiel bona kontraŭ mi. Mi sincere esperis resti kun vi ĝis miaj kapharoj blankiĝos, sed, kontraŭ mia atendo, mia sorto pruviĝas kruela. Unue mi perdis mian karan knabon, kaj nun, mi estas tiel malfeliĉa, ke mi falis en tiun ĉi teruran malsanon, kiu baldaŭ min mortigos. Post mia morto, tiuj ĉi du servoknabinoj miaj havos neniun, kiu ilin prizorgus. Ĉar la mastro jam defloris la pli aĝan el ili, mi proponas, ke ŝi restu en via loko, servante vin. Koncerne la pli junan, se vi deziras uzi ŝin, tenu do ŝin ĉe vi. Se ne, volu trovi al ŝi senedzinan viron kun modesta familio kaj edzinigi ŝin al li, por ke ili vivu la vivon de edzo kaj unusola edzino. Tiukaze ŝi povos ne fariĝi objekto de moko kiel senmastra sklavino, kaj tio estos la konvena rekompenco por la servo, kiun ŝi faris por mi. Tiam, post mia morto, miaj buŝo kaj okuloj povos resti fermitaj en kontenteco. Krome, la nutristino Laŭdezira plurfoje esprimis sian nevolontecon forlasi tiun ĉi domon. Se vi bonvolus fari al mi la favoron plenumi ŝian deziron, ankaŭ tio estos konvena rekompenco por ŝia servo en la mamnutrado de mia infano. Kaj en la estonteco, kiam via propra filo estos naskita, konfidu do al ŝi la mamnutradon de la bebo.”

“Kara franjo Florvazo,” diris Luna Sinjorino, “estu komplete trankvila. Ni zorgos pri tiuj ĉi aferoj. Ni devas nin prepari por la plej malbona okazo kaj nutri la plej bonan esperon. *Se vi vere trovos la montojn tro altaj kaj la akvojn tro malaltaj*⁹, mi aranĝos, ke Printempa Brilo servu ĉe mi, kaj Printempa Gracio ĉe la Dua Sinjorino. La knabino, kiu nun servas en la loko de la Dua Sinjorino, ne estas honesta, nek diligenta, kiu estos forsendita pli aŭ malpli baldaŭ. Tiam mi anstataŭigos ŝin per Printempa Gracio. Koncerne la nutristinon Laŭdezira, ĉar vi diras, ke ŝi havas neniun lokon por iri, mi tenos ŝin en nia domo egale en la okazo, ĉu mi havos infanon aŭ

ne, kaj en la estonteco mi aranĝos, ke ŝi edziniĝu al unu el la servistoj de nia domo.”

“Franjo Florvazo, ne estu maltrankvila pri tiuj ĉi aferoj,” aldonis Gracia Li. “Ni du bone zorgos pri ĉio ĉi tio. En la estonteco, post kiam finiĝos la observo de la funebra periodo pro vi, mi prenos la knabinon Printempa Gracio en mian lokon por servi ĉe mi, kaj mi traktos ŝin kun aparta zorgo.”

Florvazo do vokis la nutristinon kaj siajn du servoknabinojn, ke ili paŝu antaŭen kaj *koŭtoŭu* al siaj du bonfarantinoj. Luna Sinjorino ne povis sin deteni de larmoj.

Iom pli poste, Jada Turo, Ora Lotuso, kaj Bela Neĝo venis vidi, kiel ŝi statas, kaj Florvazo diris al ĉiu el ili kelkajn fratinecajn vortojn, kiuj estis kiel afablaj, tiel ankaŭ kortuŝantaj.

Post kiam Gracia Li, Jada Turo, Ora Lotuso, kaj la aliaj retiriĝis, krom Luna Sinjorino, kiu sola restis en la ĉambro kun ŝi, Florvazo mallauĉte diris kun ploro al ŝi:

“Granda Franjo, en la estonteco, se vi naskos filon, prenu la plej grandan zorgon pri li, por ke li povu esti la radikoj, kiu eternigos la familian linion de lia patro. Ne estu tiel stulta kaj senatenta, kia mi estis, nek lasu vin insidi de iu alia.”

“Franjo,” diris Luna Sinjorino, “mi komprenas, kion vi diras.”

Karaj legantoj, estas necese ĉi tie mencii la fakton: Tiu ĉi sola frazo havis tian efikon sur Lunan Sinjorinon, ke, pli poste, post la morto de Ximen Qing, kiam al Ora Lotuso ne estos permesite plu resti en la domo, tio ŝuldiĝos tute al tiu ĉi mortolita diro de Florvazo en la memoro de Luna Sinjorino.

Vere:

Jen ĉiama vero: nur dankemo kaj malamo

Kolektas sur si nenian polvon dum mil jaroj.

Dum ili parolis, Qintong aperis kaj transdonis la ordonon, ke ili purigu la ĉambrojn kaj bruligu incenson, ĉar jam alvenis la taŭista majstro Pan el la templo Kvin Montoj. Luna Sinjorino do superrigardis la purigon de la ĉambro fare de la servistinoj, preparon de iom da teo infuzita en purigita akvo, kaj la ekbruligon de treege fajna incenso. Ŝi kaj la aliaj sinjorinoj do sin kaŝis en la apuda dormoĉambro por subaŭskulti kaj gvati.

Baldaŭ Ximen Qing enkondukis la taŭistan majstron Pan. Kiel do li aspektis?

Jen, vidu nur:

Sur lia kapo sidas taŭista ĉapo de Kvin Montoj inter rozaj nuboj;

Lia korpo estas vestita en mallonga robo el nigra kotona tolo.

Lia talio estas ligita per zono teksita el diverskoloraj silkaj fadenoj;

Sur sia dorso li portas glavon el antikva bronzo kun stria desegno.

Sur liaj du piedoj li portas paron da kanabaj sandaloj kun du aloj;

En sia mano li tenas kvin-astran ventumilon demon-forpelantan.

Liaj brovoj estas oblikvaj, kaj liaj okuloj estas en formo de amando;

Lia buŝo estas kvadrata, kaj li portas plenvangan barbon.

Lia sinteno estas majesta, kaj lia aspekto impona.

Se li ne estas senmortulo vaganta trans la nuboj,

Li devas veni el la Jada Paradizo sur la Insuloj Penglai.

Kiam li eniris tra la angula pordo kaj pasis preter la ekranmuro, kaj ĝuste kiam li alproksimiĝis al la loko de Florvazo, ĉe la bazo de la ŝtona teraso apud la verando, la taŭista majstro faris du paŝojn posten, ŝajne riproĉis iun, kaj ripetis kelkajn okultajn formulojn, antaŭ ol li enpaŝis internen en la momento, kiam la servistoj levis la pordokurtenon flanken, kaj alproksimiĝis al la malsanlito. Tiam okazis, ke:

Li enfokusigis siajn du okulojn sur ŝin,

Uzante la distingnan saĝecon de ilia dia vido.

Li svingis sian glavon en unu mano,

Faris kalkulon sur siaj fingroj dum paŝado laŭ astra figuro,

Kaj murmurante recitis sorĉkantojn,

Kvazaŭ tuj ekkomprene la situacion.

Elirinte el la salono, li alproksimiĝis al la incenstablo, kiu alfrontis al la ekstero, kaj Ximen Qing ekbruligis la incenson.

Post kiam la taŭista majstro Pan forbruligis kelkajn desegnaĵojn de magia figuro, li kriis per laŭta voĉo:

“Dia marŝalo hodiaŭ deĵoranta, kial vi ankoraŭ ne aperas?”

Li do ŝprucigis plenuŝon da sanktigita akvo. Subite ŝajne leviĝis forta kirlovento ekster la ĉambro, kaj meze de la kirlovento aperis dia generalo antaŭ li.

“En tiu ĉi domo de Ximen,” diris la taŭista majstro Pan, “iu virino kun la familinomo Li estas en malsano. Ŝi apelaciis al mia altaro. Mi ordonas al vi venigi la lokan protektan dion kaj la ses domajn spiritojn, por konstati, ĉu troviĝas malbonaj spiritoj en agado, kaj rapide konduku ilin antaŭ min. Tiu ĉi afero toleras nenian prokraston.”

Post tio la taŭista majstro Pan fermis siajn okulojn. Lia mieno ŝanĝiĝis, kaj li rekte sidis en grava maniero. Li metis siajn manojn sur la tablo kaj frapis la tablon per lignopeco kiel juĝisto agis dum juĝo de proceso. Tio daŭris kelkan tempon, antaŭ ol li leviĝis kaj eliris.

Ximen Qing kondukis lin al la somerdomo en la antaŭo kaj demandis lin pri la rezulto.

“Malfeliĉe,” diris la taŭista majstro Pan, “tiu ĉi virino, en la juĝejo de la submondo, estas akuzita de iu, kiu suferis maljustaĵon en ŝiaj manoj en la antaŭa ekzistado. Tio ne estas la sekvo de agado de malbonaj spiritoj, sekve mi povas fari nenion ĉi-rilate.”

“Respektata majstro,” diris Ximen Qing, “ĉu ekzistas io, kion vi povas fari, por

ekzorci la fonton de la malbono?”

“Ĉiu maljustaĵo havas sian faranton, ĉiu ŝuldo havas sian ŝuldanton,” diris la taŭista majstro Pan. “Ĉio estas decidita de la plendanto. Eĉ la juĝistoj de la submondo povas fari nenion.”

Sed, vidante, ke Ximen Qing estas tre ĝentila kaj sincera, li do demandis:

“Kia estas la aĝo de via edzino?”

“Ŝi naskiĝis en la jaro de ŝafo,” respondis Ximen Qing, “kaj ĉi-jare ŝi estas en sia dudek-sepa jaro.”

“Nu bone,” diris la taŭista majstro Pan, “mi do plenumos oferadon antaŭ la altaro al la stelo, kiu regas ŝian sorton, por vidi, kia estas la lanterno, kiu respondas al ŝia sorto.”

“Kiam vi plenumos la oferadon?” demandis Ximen Qing, “kaj kion vi bezonos por tio?”

“Ĉi-nokte,” diris la taŭista majstro Pan, “ĝuste ĉe la noktomezo mi strekos la limojn de la sankta aero per kalko, starigos la lanternan altaron, kovros ĝin per peco da flava silko, kaj metos sur ĝin la lanternon, kiu prezentas la stelon de la dato de ŝia naskiĝo, kaj prezentos oferaĵojn de kvin specoj de greno, jujuboj, kaj supo, sen bezono de vino kaj viando. Mi bezonos nur dudek sep sortajn lampojn, prezentantajn la jarojn de ŝia aĝo, kaj kovros ilin per baldakeno. Nenio alia estos postulata. Vi devos fasti, meti sur vin nigran veston kaj veni ĉi tien por fari riverencojn kuŝante vizaĝaltere sub la altaro ĉe la ceremonio. Dum mi plenumos la oferadon, ĉiuj kokoj kaj hundoj devos esti fortenitaj de la loko, por ke ili ne faru ĝenon.”

Tion aŭdinte, Ximen Qing tuj ordonis, ke ĉio estu pretigita, kaj li mem eniris en sian kabineton, kie li sin banis, observis la postulatan abstinon, kaj metis sur sin purajn vestojn. Li ankaŭ petis Ying Bojue resti kun li. Ili kune prenis vegetaran manĝon kun la taŭista majstro Pan.

Ĉe la noktomezo, kiam la starigo de la lanterna altaro estis finita, la taŭista majstro Pan sidigis sur alta podio. La altaraĵoj estis vicigitaj sub li, laŭ la pozicioj de la Verda Drako de la Oriento, la Blanka Tigro de la Okcidento, la Ruĝa Birdo de la Sudo, kaj la Nigra Testudo de la Nordo. Super la altaro estis pendigitaj tri grandaj baldakenoj, super kiuj estis prezentataj la simboloj de la dek du konstelacioj, aranĝitaj en cirklo. Sub tio ĉi estis vicigitaj la dudek sep sortaj lanternoj.

La rito komenciĝis per deklamo de la petvortoj, dum Ximen Qing, vestita en nigro, kuŝis vizaĝaltere sub la perono. La servistoj ĉiuj estis ordonitaj retiriĝi de la loko, tiel ke tie estis neniuj aliaj ĉeestanta. Tie ĉiuj lampoj kaj kandeloj estis hele flamantaj, kaj la dudek sep lanternoj estis samtempe eklumigitaj. La taŭista majstro Pan, sidante sur la rita trono, lasis siajn harojn falantaj sur la ŝultroj, kaj, svingante sian glavon, murmuris sorĉkantojn. Post tio li, levis sian kapon kaj fiksas la rigardon

supren al la Granda Ĉerpilo¹⁰, ensuĉis la praan spiron, kaj, leviĝinte de la trono, paŝis tra la malpleno, kaj rondiradis ĉirkaŭ la jaspata altaro.

Vere:

Kiam tri incensvergetoj estas ekbruligitaj, la tri regnoj unuiĝas;

Kiam ĉiu severa ordono estas donita, eksonas krako de tondro.

Oni vidis, ke en la serena ĉielo la steloj kaj la luno brilas; la tero mallumiĝas kaj la ĉielo malheliĝas. Subite leviĝis ekblovo de stranga tremiga vento.

Vere:

Se ĝi ne estas la blekoj de tigroj,

Ĝi devas esti la muĝado de drakoj.

Ĝi ŝajnas enpenetri tra la pordoj kaj kurtenoj;

Ĝi certe detruas la florojn kaj faligas la foliojn.

Ĝi pelas la nubojn el inter la montopintoj;

Kaj ĝi resendas la pluvon en la riverojn.

La sovaĝaj anseroj disiĝas de siaj kamaradoj kaj vee krias;

La mevoj kaj ardeoj en siaj aroj serĉas sekurajn altajn arbojn.

La Diino de Luno haste fermas la pordon de sia palaco;

La vent-naskito Liezi, alte en la spaco, kriegas helpon.

Post tri sinsekvaj fortaj ventoblovoj, subite leviĝis malvarma vento, kiu estingis ĉiujn sortajn lanternojn de Florvazo. La taŭista majstro Pan, sidante sur sia rita trono, klare vidis figuron vestitan en blanko, kiu envenis de ekstere, akompanata de du nigre vestitaj sekvantoj, tenante dokumenton en la mano, prezentis ĝin antaŭ la altaron. Kiam la taŭista majstro ekzamenis ĝin, li vidis, ke ĝi estas arest-ordono donita de la juĝejo de la submondo, kiu portas sur si tri oficialajn sigelojn.

Ektimigite de tio, li tuj malsupreniĝis de la rita trono kaj, paŝinte antaŭen, instigis Ximen Qing leviĝi sur siajn piedojn, dirante al li jene:

“Sinjoro, bonvolu leviĝi. Ŝajnas, ke via edzino, kiu ofendis la Ĉielon, havas neniun alian lokon por preĝi. Ŝiaj sortaj lanternoj jam estingiĝis. Kiel do ŝi povos esti savita? Mi timas, ke ŝia fino estas baldaŭa.”

Aŭdinte tion ĉi, Ximen Qing mallevis sian kapon sen diri eĉ unu vorton, kaj liaj okuloj estis plenplenaj de larmoj.

Plorante li ree petegis la majstron, dirante:

“Mia sola espero, respektiginda majstro, estas, ke vi povos fari ion por ŝin savi.”

“Neniu povas eskapi sian destinon. Tio estas neniel evitebla.”

Ĉe tio li esprimis sian deziron foriri.

Ximen Qing ripetade persvadis lin resti, dirante:

“Atendu ĝis la tagiĝo, kaj vi povos ekiri en matena lumo.”

“Ni homoj, kiuj forlasis sian hejmon por fariĝi taŭistaj pastroj,” diris la majstro,

“kutimas migri sur la herboj kaj dormi en la roso, kampi inter la montoj, aŭ nokti en iu ajn templo, al kiu ni okaze alvenas. Tio estas por ni la natura vivmaniero.”

Ne plu insistante, Ximen Qing ordonis siajn servistojn elporti rulon da tolo kaj tri taelojn da arĝento kiel rekompenco por lia plenumo de la rito.

“Via humila taŭista pastro estas la praktikanto de la plej alta principo de la Majesta Ĉielo,” diris la taŭista majstro Pan, “kaj faris juron al la Ĉielo mem, ke mi ne kuraĝos avidi la mondan riĉaĵon. Se mi akceptus ion ajn, mi suferus pro mia kulpo rompi mian juron.”

Li obstine rifuzis, sed, sub la prema insistado de Ximen Qing, li diris al sia juna disĉiplo akcepti nur la rulon da tolo, por fari al si robon, kaj poste li leviĝis kaj diris ĝisrevidon. Ĉe sia foriro li donis sian lastan averton:

“Ĉi-vespere, sinjoro, vi devos observi la tabuon kontraŭ eniro en ŝian ĉambron, por ke vi ne altiru sur vin katastrofon. Estu singarda! Estu singarda!”

Fininte sian parolon, li estis elakompanita ĝis la pordego, kaj li foriris svingante siajn manikojn.

Ximen Qing revenis al la somerdomo por kontrole vidi la malkonstruon de la lanterna altaro. Sciiĝinte, ke ekzistas nenio espero ŝin savi, li estis ekstreme afliktita, kaj kiam li sidiĝis kun Ying Bojue, li ne povis sin deteni de larmoj.

“Fraĉjo,” diris Ying Bojue, “tio estas ŝia destino. Ni neniel povos retreni ŝin kontraŭ la volo de la Ĉielo. Nun kiam la afero jam atingis tian stadion, ĉia peno estos vana. Fraĉjo, vi ne devus vin turmenti per troa malĝojo.”

Poste, aŭdinte la batadon de la kvara hor-duo, Ying Bojue daŭrigis:

“Fraĉjo, vi jam lacas. Vi devus iom ripozi. Mi reiros hejmen kaj morgaŭ revenos.”

“Mi vokos servoknabon akompani vin kun lanterno sur via vojo,” diris Ximen Qing.

Li do ordonis al Lai’an, ke li prenu lanternon kaj akompanu lin hejmen. Post ilia foriro, la pordego estis refermita, kaj li revenis internen.

Li sidis tute sola en sia kabineto, kun kandelo en sia mano, sentante sian koron ŝirata de malĝojo. Ĉio, kion li povis fari, estis senĉese eligi longajn suspirojn, dum li pensis en si:

“La rita majstro avertis min, ke mi ne eniru en ŝian ĉambron, sed kiel mi povus esti tiel malmolkora, lasante ŝin sola en ŝiaj lastaj horoj? Mi nepre iros ŝin vidi, eĉ se tio kostos al mi la vivon. Mi sentas la nepran neceson resti kun ŝi kaj paroli kun ŝi.”

Li do iris en ŝian ĉambron kaj vidis, ke Florvazo kuŝas kun sia vizaĝo turnita al la muro. Aŭdante, ke envenas Ximen Qing, ŝi sin returnis kaj diris al li:

“Mia kara fraĉjo, kial vi ne envenis antaŭe?”

Poste ŝi daŭrigis:

“Kion diris la taŭista majstro pri la lanterna rito?”

“Estu trankvila, mia kara,” respondis Ximen Qing. “La lanternoj indikis nenion maltrankviligan.”

“Mia fraĉjo,” diris Florvazo, “vi min trompas. Momenton antaŭe tiu aĉulo kun du aliaj homoj refoje aperis antaŭ mi kaj ĝenis min dum kelka tempo. Li diris: ‘Vi povas jam inviti ritan majstron veni kaj ekzorci min, sed mia plendo kontraŭ vi jam estis aprobata de la aŭtoritatoj en la submondo. Al vi neniel povos esti permesite eskapi.’ Li tre koleris ĉe sia foriro, kaj certe morgaŭ li revenos por min kapti.”

Kiam Ximen Qing aŭdis tiujn vortojn, du riveroj da larmoj torentis malsupren laŭ liaj vangoj, kaj li eksplodis per laŭta plorego, dirante:

“Mia kara franjo, vi devus ne lasi vian menson en maltrankvilo, nek doni atenton al li. Karega mia, mi ja forte esperis povi teni kompanion kun vi pliajn tagojn, sed kiu atendus, ke vi min forlasos tiel baldaŭ kaj foriros de mi en tia maniero? Mi, Ximen Qing, preferus suferi la fermon de miaj buŝo kaj okuloj en morto, ol elteni tian ventrotranĉan kaj intest-tordan ŝirdoloron en maltranvilego.”

Florvazo metis siajn du brakojn ĉirkaŭ la kolon de Ximen Qing kaj nur plorsingultadis. Post longatempa amara plorego, ŝi jam fariĝis tro raŭka por plu eligi plorsonon.

“Ho, mia fraĉjo,” ŝi diris, “ankaŭ mi esperis, ke ni povus kune dividi nian vivon ĝis nia harar-blankiĝo, sed kiu povus anticipi, ke hodiaŭ mi devos vin forlasi en morto? Profitante la tempon, kiu restas al mi, antaŭ ol miaj okuloj estos fermitaj, mi volus diri al vi kelkajn vortojn. Vi havas grandan domanaron, kaj la ŝarĝo estas tro peza por vi, sola viro, kiu havas nek rektajn patroflankajn parencojn, nek iun fidindan kaj kompetentan, por helpi al vi en la administrado de via granda entrepreno. Kion ajn fari vi estos preta, vi devos anticipe fari zorgan konsideron, kaj nepre ne lasos vin influi de la momenta impulso, nek de via kaprico. Bone traktu la Grandan Sinjorinon kaj la aliajn. Ŝi ne havas bonan sanon, kaj, pli aŭ malpli frue, ŝi povos naski al vi filon, kiu servos kiel la fundamento de la eternigo de via familia linio kaj malebligos la disiĝon de via posedaĵo. Cetere, vi okupas oficialan postenon. Ekde nun, vi ne iru al la kvartalo de plezuro, nek drinku tie. Revenu hejmen pli frue el la oficejo. Viaj hejmaj devoj estas gravaj. La situacio ne estos la sama, kia ĝi estis tiam, kiam mi restis ĉi tie, de tempo al tempo vin admonante. Se mi mortos, kiu povos doni al vi tiajn sincerajn konsilojn?”

Aŭdante tiujn parolojn, Ximen Qing havis la senton, kvazaŭ akra tranĉilo tranĉus liajn koron kaj hepaton, kaj li ploregis, dirante per ŝiranta voĉo:

“Mia franjo, ho mia karega, mi komprenas ĉion, kion vi diras. Ne maltrankvilu pri mi. Mi, Ximen Qing, devis esti senigita je afineco destinita en unu el miaj antaŭaj

enkarniĝoj, tiel ke al mi ne estas permesite ĝui kun vi la geedzan feliĉon ĝis la fino en tiu ĉi vivo. Tio dolorigas mian koron ĝis la morto! Ho, la Ĉielo detruas min!”

“Koncerne Printempan Brilon kaj Printempan Gracion,” ŝi daŭrigis, “mi jam parolis al la Granda Sinjorino pri ili. En la estonteco, post kiam mi mortos, metu Printempan Brilon en la servon al la Granda Sinjorino. Rilate la pli junan servoknabinon, la Dua Sinjorino jam konsentis ŝin akcepti. Al ŝi mankas kontentiga servistino en ŝia loko, sekve Printempa Gracio povos ŝin servi.”

“Mia franjo,” diris Ximen Qing, “vi ne bezonas esti maltrankvila pri ili. Eĉ se vi mortos, kiu kuraĝus forsendi viajn servistinojn? Kaj ankaŭ la nutristino ne estos foririgita. Ili ĉiuj estos restigitaj por gardi vian spirit-tabuleton.”

“Ho, ne, ne! Kio estas tiel grava rilate la spirit-tabuleton?” diris Florvazo. “Post la paso de la kvina septaga funebr-periodo, ĝi povos esti simple forbruligita, kaj tio estos la bona fino de ĝi.”

“Mia franjo, mia plej kara,” diris Ximen Qing, “ne estu maltrankvila pri tiu ĉi afero. Se nur mi, Ximen Qing, restos vivanta, la oferado ĉiam estos farata al via spirit-tabuleto.”

Dum ili elverŝis sian koron unu al la alia, Florvazo instigis lin, dirante:

“Vi devus iri dormi, fraĉjo. Estas tiel malfrue.”

“Mi ne dormos,” diris Ximen Qing. “Mi restos ĉi tie, en via ĉambro, vin akompanante.”

“Mia horo ankoraŭ ne venas. La odoro estas tiel malagraba ĉi tie, ke vi ĝin ne eltenos, se vi plu restos. Cetere, estos ne konvene por la servistinoj min prizorgi, kun vi ĉi tie.”

Ximen Qing havis neniun alian eblecon, ol fari ordonon al la servistinoj atente prizorgi sian mastrinon. Poste li revenis al la loko de Luna Sinjorino en la malantaŭo kaj detale rakontis al ŝi pri la vana rezulto de la lanterna rito.

“Kiam mi ĵus eniris en ŝian ĉambron,” li diris, “mi observis, ke ŝi ankoraŭ povas paroli sufiĉe klare. Se la Ĉielo nur kompatos ŝin, eble ŝi povos sukcese trapasi la krizon kaj resaniĝos. Kiu povus tion antaŭscii?”

“Ŝiaj okuloj estas enkaviĝintaj,” diris Luna sinjorino, “ankaŭ ŝiaj lipoj sekiĝintaj, kaj ŝiaj orelkonkoj kvazaŭ bruldifektitaj. Kiel povas esti esperata ŝia resaniĝo? Tio estas nur demando de tempo. Tiu ĉi malsano ŝia estas tia, kia permesas al ŝi resti klarmensa en sia parolo ĝis la lasta spiro.”

“De kiam ŝi venis en nian hejmon,” diris Ximen Qing, “ŝi neniam faris ofendon al iu ajn el niaj domanoj, maljunaj kaj junaj, de supre malsupren. Cetere, ŝi havas plej akomodigeman karakteron kaj havas neniun malbonan vorton por diri pri iu ajn. Kiel mi povus elteni la perdon de ŝi?”

Dirante tion ĉi, li ne plu povis reteni siajn larmojn kaj ree eksplodis per amara

ploro. Ankaŭ Luna Sinjorino ne povis deteni sin de larmoj.

Ni daŭrigu nian rakonton pri Florvazo. Ŝi alvokis Printempan Brilon kaj la nutristinon kaj diris:

“Helpu al mi turni la korpon kun la vizaĝo al la muro, por ke mi povu havi dormeton.”

Kaj poste ŝi daŭrigis:

“Kia tempo nun jam estas?”

“La koko ankoraŭ ne kriis,” diris la nutristino. “Nun devas esti ankoraŭ en la kvara hor-duo.”

Poste ŝi diris al Printempa Brilo:

“Ni do ŝanĝu la tavolon de sorba herbopapero sub ŝia korpo, helpu al ŝi turni la korpon kun la vizaĝo al la muro, kaj kovru ŝin per litkovrilo, por ke ŝi povu havi dormon.”

Ĉiuj maldormis preskaŭ la tutan nokton. La maljunulino Feng kaj la bonzino Wang la unuaj endormiĝis, dum Printempa Brilo kaj Printempa Gracio sternis sian litaĵon sur la planko antaŭ sia mastrino kaj kuŝiĝis por dormi.

Kiam ili dormis apenaŭ unu horon kaj estis ankoraŭ en stato de profunda dormo, Printempa Brilo songiĝis, ke Florvazo malsupreniĝas de la briklito kaj donas al ŝi ekpuŝon, dirante:

“Vi du bone gardu la domon. Mi foriras.”

Ŝi subite vekigiĝis kun ektimo kaj vidis, ke la lampo sur la tablo ankoraŭ lumas. Kiam ŝi ĵetis rigardon sur la liton, ŝi trovis, ke ŝia mastrino ankoraŭ kuŝas tie kun la vizaĝo al la muro, sed kiam ŝi ekpalsis per sia mano, ŝi sentis nenian spiron el ŝia buŝo. Ŝi ne sciis, kiam ŝi elspiris sian lastan spiron. Ho ve, ho ve! Ŝi jam perdis sian spiron kaj ne plu vivis. Kiel domaĝe, ke la vivo de tiel bela virino jam devis turniĝi nur en efemeran printempan songon!

Vere:

Se la Infera Reĝo decidis, ke iu mortu ĉe la noktomezo,

Kiu kuraĝus prokrasti la horon de la morto ĝis la tagiĝo?

Printempa Brilo haste vekis ĉiujn, kaj ili eklumigis lampojn kaj kolektiĝis por vidi, kio okazis. Sufiĉe certe, ili vidis, ke ŝi jam perdis sian spiron, kaj la malsupro de ŝia korpo sin banas en flako da sango. En paniko ili kuris al la malantaŭo por informi Ximen Qing pri la okazaĵo.

Kiam Ximen Qing aŭdis, ke Florvazo jam mortis, li kaj Luna Sinjorino tuj kuris al la antaŭo tiel rapide, ke per ĉiu paŝo ili kovris dupaŝan distancon. Atinginte tien, li levis la litkovrilon flanken de ŝia korpo kaj vidis, ke ŝia vizaĝkoloro ne ŝanĝiĝis, ŝia korpo ankoraŭ konservas iom da varmo. Ŝi jam forlasis tiun ĉi mondon, kun la korpo vestita de nenio, krom ruĝa satena brustokovrilo.

Ximen Qing, malgraŭ ke ŝia korpo estis makulita de koaguliĝinta sango, brakumis ŝin per siaj brakoj kaj kisadis ŝiajn aromajn vangojn, protestante foje kaj refoje, ree kaj denove:

“Mia perdita franjo! Mia bonkora kaj virta franjo! Vi, franjo, kun via akomodigema karaktero! Kiel vi povis forlasi min en tia maniero? Mi preferus, ke mi, Ximen Qing, mortu anstataŭ vi. Ankaŭ mi vivos ne pli longe en tiu ĉi mondo. Sen vi, pro kio mi vivos plu?”

Li ploreĝis kaj hurle kriadis en malespero, sin salt-ĵetante ĝis preskaŭ tri-futa alteco de sur la tero. Ankaŭ Luna Sinjorino ploris kaj senĉese forviŝis siajn larmojn. Baldaŭ Gracia Li, Jada Turo, Ora Lotuso, Bela Neĝo, kaj la ceteraj membroj de la tuta domanaro, maljunaj kaj junaj, de supre malsupren, inkluzive diversajn servistinojn, ĉiuj ekploris, tiel ke la sono de iliaj lamentoj eĉ skuadis la teron.

Luna Sinjorino demandis al la ĉeestantoj:

“Ni ne scias precize, kiam ŝi mortis dum la nokto. Ŝi havas eĉ neniun veston sur sia korpo.”

“Mi palpis ŝian korpon,” diris Jada Turo, “kaj ŝi estas ankoraŭ iom varma. Probable ŝi forpasis nelonge antaŭe. Ni devas kapti la okazon meti vestojn sur ŝin, dum ŝiaj membroj estas ankoraŭ varmaj. Kion do ni atendas?”

Luna Sinjorino observis, ke Ximen Qing tenas sin klinita sur ŝia korpo kun la vizaĝo sur ŝia vizaĝo, lamentante kaj kriante:

“La Ĉielo detruas min, Ximen Qing! Franjo, dum la tri jaroj, kiam vi vivis en mia domo, vi ne ĝuis eĉ unu bonan tagon. Estas mi, kiu ruinigis vin.”

Aŭdinte tiujn ĉi vortojn, Luna Sinjorino sentis sin iom malpacienca kaj diris:

“Kia ridindulo vi estas! Vi transpasas la limojn. Ploru kelkajn fojojn kaj ĉesu: tio sufiĉus. Ĉu vi havas nenian skrupulon pri plorado en la maniero kuŝi vizaĝ-sur-vizaĝe kun la kadavro? Vi riskas esti infektita de la malbona aero eliĝanta el ŝia buŝo. Se ŝi ne ĝuis unu solan bonan tagon, kiu do el ni, ĉe vi, konus tian tagon? Kiam la homa antaŭdestinita vivdaŭro venas al sia fino, kiu povus eviti iri tiun ĉi vojon?”

Sin turninte al Gracia Li kaj Jada Turo, ŝi daŭrigis:

“Vi du prenu la ŝlosilojn kaj elserĉu en la alia ĉambro la mortvestojn, kiujn ŝi jam antaŭe preparis al si, por ke ni povu kunhelpi meti ilin sur ŝin.”

Ŝi ankaŭ diris al Ora Lotuso:

“Ni du do ordigu ŝiajn kapharojn.”

Kaj Ximen Qing ree diris al Luna Sinjorino:

“Nepre trovu du kompletojn da plej bonaj vestoj, kiujn ŝi aparte amis porti sur si.”

Luna Sinjorino do diris al Gracia Li kaj Jada Turo:

“Penu trovi tiun nove faritan jakon el skarлата satena brokaĵo, kun la salike flava

brokaĵa jupo; tiun tunikon el siringokolora silko kun nuboforma desegno, kiun ŝi portis pli frue ĉi-jare dum nia vizito al la loko de la boparenco Qiao, kun la turkisblua jupo kun larĝa trenajo; kaj tiun nove faritan blankan satenan jakon, kun la jupo el flava silko.”

Ĉe tio, kun Printempa Brilo tenanta lampon, kaj Jada Turo la ŝlosilojn, ili iris en la apudan ĉambron kaj malfermis keston. Post longatempa serĉado, ili trovis la tri kompletojn da vestoj, kaj, krome, ankaŭ striktan purpuran satenan veŝton, blankan silkan jupon kaj skarlatan subjupon, kun paro da blankaj silkaj ŝtrumpoj kaj paro da ĝisgenuaj vindgamaŝoj kun flordesegno. Portante tiujn vestojn, Gracia Li revenis en la apudan ĉambron kaj montris ilin al Luna Sinjorino.

Kaj Luna Sinjorino, kune kun Ora Lotuso, orde aranĝis la hartuberon de Florvazo ĉe la lampa lumo. Ili zorge envolvis ĝin en grandan malhele verdan poŝtukon, kaj uzis kvar orajn harpinglojn, por fiksi la hartuberon en ordo.

Gracia Li do demandis:

“Kaj kiakolorajn ŝuojn ni devus elserĉi, por meti sur ŝin?”

“Franjo,” diris Ora Lotuso, “la paro da ŝuoj, kiun ŝi pleje ŝatis, estas tiu farita el skarлата brokaĵo, kun dikaj plandumoj. Ŝi portis la ŝuojn apenaŭ pli ol du fojojn. Ni do penu trovi tiun paron da ŝuoj, por meti sur ŝiajn piedojn.”

“Sed ne,” diris Luna Sinjorino. “Se ŝi portus tiujn ĉe sia apero antaŭ la juĝejo en la submondo, ŝi estus kondamnita ensalti en fajron. Elserĉu anstataŭe tiun paron da ŝuoj el violkolora silka brokaĵo kun dikaj plandumoj, kiujn ŝi portis la alian tagon, kiam ŝi iris al la loko de sia bofratino ekster la urbopordego. Tiu estus paro pli konvena por ŝia foriro.”

Aŭdinte tion, Gracia Li tuj diris al Printempa Brilo, ke ŝi elserĉu tiujn ŝuojn. Ili ĉiuj kune penis kaj vestis la mortintan sinjorinon Florvazo en bona ordo.

Ximen Qing do kondukis grupon da servoknaboj en la grandan halon por depreni de tie la pentraĵojn kaj kaligrafiaĵojn kaj poste fari la aranĝon krei enfermitan spacon per ekranegoj, en kiun la korpo de Florvazo estis portita sur pordoklapo. Sub ŝia korpo estis metita brokaĵa tuko, kaj ŝia korpo estis kovrita per papera mortotuko. Estis starigitaj tablo por ŝia spirit-tabuleto kaj tablo por incenso, kaj estis eklumigita la lampo ĉiambrulanta. Du servoknaboj estis lokitaj tie por servi ŝian spiriton: unu el ili frapadis *ĉingon*, kaj la alia bruligadis paperajn mon-imitaĵojn. Dai'an estis sendita por venigi la jin-jang-an majstron Xu kiel eble plej rapide, por ke li povu ekzameni la tempon de ŝia morto kaj interpreti la horoskopajn tekstojn.

Tuj post kiam Luna Sinjorino kontrolis la elprenon de la vestoj bezonataj por vesti la kadavron, la pordo de la ĉambro de Florvazo estis ŝlosita. Nur la ĉambro kun la briklito restis malfermita por la uzo de la servistinoj kaj la nutristino.

Kiam la maljunulino Feng vidis, ke ŝia mastrino mortis, ŝi ploregis kun larmoj

abunde fluantaj sur la vangoj. La bonzino Wang, siavice, monotone murmuradis, dum ŝi recitis la *Koran Sutron*, la *Sutron de la Resaniga Budho*, la *Sutron pri Forigo de Rankoroj*, la *Rangama-Sutron*, la *Sutron de Granda Kompato*, petegante, ke la Bodisatva Reĝo Eskortanta la Mortinton bone konduku ŝin sur la vojo al la submondo.

Dume, en la granda halo, Ximen Qing batadis al si la bruston en ekstrema malĝojo, kaj ploregis kaj reploregis, senĉese karesante la kadavron, ĝis la voĉo raukiĝis, kaj korsire kriante, foje kaj refoje:

“Ho mia bona kaj virta franjo, kun via akomodigema karaktero! Ho mia franjo, mia franjo!”

Dum ĉiuj estis tiel multeokupitaj, la koko kriis, kaj Dai’an revenis kun la jin-jang-a majstro Xu, kiu salutis Ximen Qing kun la vortoj:

“Mi povas vidi, ke Via Honoro estas en tre granda malĝojo. En kiu tempo via sinjorino forpasis?”

“La preciza tempo ne estas konata,” diris Ximen Qing. “En la tempo, kiam ŝi kuŝiĝis por dormi, la kvara hor-duo jam estis batita, kaj la homoj en ŝia loko estis tiel lacigitaj, ke ili ĉiuj dormis profundan dormon, sekve neniu precize scias, kiam ŝi forpasis.”

“Ne gravas!” diris la majstro Xu.

Li do diris al la servistoj, ke ili eklumigu la lampojn en la granda halo, kaj li levis la paperan mortotukon flanken por ekzameni la kadavron. Kalkulinte la tempon sur la fingroj, li diris:

“Ĉar nun ni estas en la dua kvinono de la kvina hor-duo, ŝi devis ellasi la lastan vivspiron je la hor-duo *chou* (tempopeco de la 1-a horo ĝis la 3-a atm. —trad).”

Ximen Qing do ordonis, ke oni alportu skriban penikon kaj inkoplaton al la majstro Xu, kaj petis lin interpreti la horoskopajn tekstojn.

La majstro Xu, ĉe la lampa lumo, demandis pri la nomo kaj la Ok Ideografiaĵoj de la mortinta sinjorino kaj poste li skribis:

“La mortinta sinjorino Li, la edzino de Ximen Qing, kiu naskiĝis ĉe la tagmezo de la dek-kvina de la unua monato en la jaro *xin-wei* (la sesa) de la regperiodo Yuanyou, kaj mortis je la hor-duo *chou* de la dek-sepa de la naŭa monato en la jaro *ding-you* (la sepa) de la regperiodo Zhenghe. Tiu ĉi estas la tago *bing-zi* de la monato *wu-xu*, kio indikas konflikton inter la ĉielaj trunkoj kaj la teraj branĉoj. Ŝia spirito estas dek futojn alta. La rektaliaj kaj plej intimaj membroj de ŝia familio devus sin deteni de ploro, sed post kiam ili metos sur sin funebrajn vestojn, la ploro estos sen maloportuneco. En la tago de la enĉerkigo, ĉiu homo naskita en la jaro de drako, tigo, koko aŭ serpento devus resti for de la ceremonio, krom se tiu estas boparenco.”

Ĉe tio, Luna Sinjorino sendis Dai’an por peti la majstron Xu konsulti la

Horoskopon Libron pri la estonta destino de Florvazo.

La majstro do malfermis sian Horoskopon Libron kaj konsultis esoterajn jing-jang-ajn tekstojn. Poste li diris:

“Hodiaŭ estas la tago *bing-zi*, kaj ŝia morto okazis dum la hor-duo *ji-chou*, sekve ŝi estis regata de la zodiaka signo Trezora Vazo supre, kiu respondas al la regiono de Shandong sube. En sia antaŭa vivo, ŝi estis la filo de familio nomata Wang en la prefektujo Bin kaj kulpis pri mortigo de graveda ŝafino. Rezulte de tio, en tiu ĉi vivo, ŝi reenkarigiĝis kiel virino en la jaro de ŝafo. Kvankam ŝi edziniĝis al riĉa kaj distingita viro, tamen ŝi ofte suferis malsanojn kaj ne ĝuis harmonion kun sia edzo en sia horoskopo. Ŝi naskis filon, sed li mortis antaŭmaturan morton, kaj ŝia subpremata kolero kaŭzis al ŝi la sang-elfluon el la malsupra korpo, kiu rezultigis ŝian morton. En la unuaj naŭ tagoj post ŝia morto, ŝia animo forlasos ŝin por reenkarigi kiel la filino de familio nomata Yuan en la prefektujo Kaifeng en la provinco Henan. Ŝi suferos malriĉecon, sed, kiam ŝi estos dudek-jara, ŝi edziniĝos al riĉulo, multe pli aĝa ol ŝi. Ŝi ĝuos prosperon dum ŝiaj pli postaj jaroj, kaj vivos ĝis la aĝo de kvardek du jaroj. Ŝi mortos ankaŭ de kolero.”

Kiam li finis sian prognozon el la Horoskopa Libro, ĉiuj aŭdintaj virinoj suspiris. Ximen Qing do petis la majstron Xu konstati, kiu tago estas favora por la ter-rompo kaj por la enterigo.

“Permesu al mi demandi Vian Honoron,” diris la majstro Xu, “kiel longe vi intencas gardi ŝian korpon en la domo.”

Ximen Qing ekploris kaj diris:

“Ŝi ankoraŭ aspektas kvazaŭ vivanta. Kiel mi povus toleri sendi ŝin for sur ŝian vojon? Mi volus teni ŝin ĉi tie ĝis post la paso de la memorfestoj de la kvina septaga funebr-periodo.”

“En la kvina septaga funebr-periodo estas neniu tago favora por enterigo,” diris la majstro Xu, “sed se vi volus preni la kvaran septagan periodon, mi proponus, ke vi rompu la teron por ŝia tombo ĉe la tagmezo de la oka tago de la deka monato, kiu estas *ding-you*-tago; kaj ke la enterigo okazu je la deka horo antaŭtagmeze de la dek-dua tago, kiu estas *xin-chou*-tago. La horoskopoj de ĉiuj ses membroj de la familio kreos nenian konflikton en tiu tago.”

“Nu bone,” diris Ximen Qing, “la funebra procesio do okazu en la dek-dua tago de la deka monato.”

Ĉe tio la majstro Xu skribis la mort-ateston kaj metis ĝin sur la korpon de la forpasinto, kaj, post tio, li diris al Ximen Qing:

“La enĉerkiga ceremonio do okazos je la oka horo antaŭtameze en la dek-naŭa tago. Via familio devos fari ĉion necesan preparita.”

Apenaŭ Ximen Qing elakompanis la majstron Xu ĝis la pordego, jam plene

tagiĝis. Li sendis Qintong rajdi surazene al la domo de la bofrato Hua ekster la urbopordego, por inviti lian ĉeeston, kaj, post tio, li sendis servistojn iri al la hejmoj de ĉiuj aliaj parencoj de la familio por informi ilin pri la morto de Florvazo. Li ankaŭ sendis iun al la oficejo por peti forpermeson, por ke li povu resti hejme por la funebraj aranĝoj. Li sendis ankaŭ Dai'an al la butiko en Leona Strato por preni dudek rulojn da blanka tolo kaj tridek rulojn da krepo, kaj li aranĝis ankaŭ, ke la tajloro Zhao dungu la servon de la konsiderinda nombro da tajloroj. Ili tuj komencis labori en la antaŭĉambro ĉe la okcidenta flanko de la antaŭa korto, por fari tapetojn, kurtenojn kaj tablotukojn postulatajn por la funebraĵoj, funebrajn vestojn kaj jupojn por ĉiuj sinjorinoj kaj servistinoj, kaj blankajn robojn kaj blankajn kaptukojn por ĉiuj servoknaboj kaj ĉiuj aliaj servistoj.

Li ankaŭ pripensis cent taelojn da arĝento kaj konfidis ilin al Ben la Kvara kun la komisiono iri al la specialaj-butiko ekster la urbopordego por aĉeti tridek rulojn da bonkvalita kanaba tolo kaj ducent rulojn da flava damasko taŭga por la funebraj vestoj de geparencoj. Post tio li daŭrigis la aranĝon dungi ĉarpentistojn por starigo de granda konstruaĵo funebre ornamita en la ĉefa korto.

Kiam Ximen Qing kontemple revokis en la menson la kutimojn, la konduton, kaj la aspekton de Florvazo, subite li ekpensis, ke li forgesis portretigi ŝin. Vokinte Laibao al si, li demandis:

“Kie estas trovebla bona pentristo lerta en pentrado de portretoj? Mi volus venigi iun por fari postmortan portreton por Florvazo. Mi preskaŭ komplete forgesis tiun ĉi aferon.”

“La majstro Han, kiu pentris por ni ekranegojn ornamitajn per pentraĵoj en la pasinteco,” diris Laibao, “iam estis kortega pentristo apartenanta al Xuanhe-Akademio. Li perdis sian pozicion tiean kaj revenis hejmen. Li estas ankaŭ bonega portretisto.”

“Kie li loĝas?” demandis Ximen Qing. “Tuj iru inviti lin veni ĉi tien.”

Laibao kapjesis kaj foriris por plenumi la komisionon.

Ximen Qing maldormis la tutan nokton. Li estis multeokupita dum la tutaj kvin hor-duoj; krome, li suferis grandan afliktiĝon, tiel ke lia humoro fariĝis ekstreme malbona kaj incitiĝema. Li senkaŭze ekkoleris, riproĉis servistinojn kaj eĉ donis piedbatojn al servoknaboj. Ankoraŭ restante maldorma apud la kadavro de Florvazo, de tempo al tempo li ne povis sin deteni de laŭtaj plorsingulto kaj ĝemkrioj. Ankaŭ Dai'an, kiu restis ĉe lia flanko, triste ploris, ĝis li ne povis plu eligi plorsonon, nek eĉ unu vorton. Dum tiu tempo, Luna Sinjorino, kune kun Gracia Li, Jada Turo kaj Ora Lotuso, ĉiuj estis malantaŭ la kurteno, sin okupis pri la distribuo de funebro al la servistinoj el la diversaj ĉambroj kaj la edzinoj de ĉiuj servistoj.

Kiam ili vidis, ke Ximen Qing ploregas ĝis perdo de la voĉo, rifuzas trinkon

kaj manĝon, kaj manifestas nur sian malbonan humoron, Luna Sinjorino diris:

“Nur rigardu la ridindan manieron, en kiu li senfine funebras! Kiu mortis, mortis. Ĉu ŝi povos esti revivigita per lia ploro? Li ne dormis jam du aŭ tri noktojn, kaj eĉ ne kombis al si la hararon, nek lavis al si la vizaĝon. Li sin multe okupis dum la kvin sinsekvaj noktaj hor-duoj, sen gustumi eĉ guton da supo aŭ spicita akvo. Al tio eĉ fera homo ne povus rezisti! Se li nur kombus al si la harojn kaj lavus al si la vizaĝon, li povus havi decan homan aspekton. Li devus iom zorgi pri si mem. Kion do ni faru, se lia sano estus ruinigita?”

“Li do ankoraŭ ne kombis al si la harojn, nek eĉ lavis al si la vizaĝon, ĉu?” diris Jada Turo.

“Se li jam lavis al si la vizaĝon, ne necesus, ke tion ĉi mi diru,” diris Luna Sinjorino, “Sed, kelkan tempon antaŭe, kiam mi sendis servoknabon peti lin reveni al la malantaŭo kaj lavi al si la vizaĝon, li piedbatis lin eksteren. Kiu kuraĝus ree fari la samon?”

“Kaj vi ne vidis, kiel li traktis min,” diris Ora Lotuso. “Mallonge antaŭe, kiam mi afable diris al li kun plej bona intenco: ‘Ŝi jam mortis, sed se vi daŭrigos ploradon en tia maniero, vi povos perdi vian karnon kaj eĉ viajn ostojn. Vi devus havi ion por manĝi en la ĉambro, antaŭ ol daŭrigi la aranĝon. Tio prokrastos neniun aferon.’ Sed li streĉe malfermis siajn ruĝajn okulojn kontraŭ mi kaj diris: ‘Vi hund-fikigita malĉastulino! Kio en tio koncernas vin?’ Sed la fakto ja estas, ke nuntempe, se mi ne estus fikigita de li, kiu alia kuraĝus fiki kun mi? Kian absurdaĵon diris tiu senhontulo! Kaj kia homo kruda kaj neprudenta!”

“Kiam ŝi mortis tiel subite,” diris Luna Sinjorino, “kiel oni povus sin deteni de afliktiĝo? Sed, kiel ajn dolore li afliktiĝis, li devus peni iel reteni la malĝojon en la brusto, anstataŭ lasi ĝin manifestita en tia maniero. Kiam virino estas mortinta, kiel oni povus karesi ŝiajn lipojn per la siaj, sen doni atenton al malbona aero povanta eliĝi el ŝia buŝo, kaj kriegi de afliktiĝo, kun buŝo sur la buŝo? Li eĉ asertis, ke dum la lastaj tri jaroj, ŝi ne ĝuis eĉ unu bonan tagon. Ĉu oni trudis al ŝi la laboron ĉerpi akvon el puto aŭ turni muelŝtonon?”

“Tio ja ne estas ĉio,” diris Jada Turo. “Efektive, li ja pli amis ŝin, ol iun ajn el ni. Sed li ne devus trakti nin tiel diference laŭ klasoj kaj kategorioj.”

Dum ili parolis, subite Chen Jingji envenis, portante naŭ rulojn da akvece blanka maldika silko en la mano, kaj diris:

“Paĉjo ordonis, ke vi sinjorinoj eltranĉu poŝtukojn el tiu ĉi materialo, por uzo de la virinoj el ĉiuj viaj ĉambroj en la funebra okazo, kaj ke, se estos resto, ĝi povos esti uzata por fari jupojn por vi sinjorinoj.”

Luna Sinjorino prenis la silkon kaj poste diris:

“Bofilo, iru inviti vian paĉjon ĉi tien por ion manĝi. Jam proksimiĝas la

tagmezo, kaj li ankoraŭ ne trinkis eĉ unu guton da teo.”

“Mi ne kuraĝas tion fari,” diris Chen Jingji. “Iom da tempo antaŭe, kiam iu el la servoknaboj invitis lin havi ion por manĝi, li forte piedbatis lin preskaŭ ĝis morto. Kial mi devus riski lin kolerigi?”

“Se vi ne iros al li,” diris Luna Sinjorino, “mi sendos iun alian.”

Post iom da tempo, ŝi alvokis Dai’an kaj diris al li:

“Via paĉjo ankoraŭ manĝis nenion. Li nur ploras la tutan tagon. Vi do portu iom da nutraĵo al li, kaj profitu la okazon, ke la klerulo Wen estas ĉi tie kun li, por peti lin dividi la manĝon kun li.”

“Ni jam iris inviti la onklon Ying kaj la onklon Xie,” diris la knabo. “Tuj kiam ili venos, ni alportos iom da nutraĵo al ili. Se la du onkloj persvados lin nur per kelkaj vortoj, mi garantias al vi, ke paĉjo certe manĝos ion.”

“Vi ruza knabaĉo!” ekkriis Luna Sinjorino. “Vi estas ĝuste kiel intesta vermo en lia ventro. Ni, sinjorinoj de ĉiuj ĉambroj, neniel egalaj al vi en intimeco kun li. Kiel vi povas esti tiel certa, ke li konsentos preni manĝon nur se tiuj du venos?”

“Vi sinjorinoj ne komprenas,” diris Dai’an. “Tiuj du sinjoroj estas la plej intimaj amikoj de mia paĉjo. Ĉe preskaŭ ĉiuj bankedoj, grandaj kaj malgrandaj, li neniam ĉeestas sen ili. Se paĉjo konsumas tri tael-dekonojn da frandaĵoj, ili konsumas la saman kvanton, kaj se paĉjo havas la humoron konsumi nur du tael-dekonojn, ili neniam konsumas pli. Kiel ajn forte ĉagrenita paĉjo povas esti, ili bezonas nur diri kelkajn vortojn, kaj la brovoj de paĉjo tuj malsulkiĝas kaj liaj okuloj ridetas.”

Ili daŭrigis la parolon dum kelka tempo, ĝis Qitong sin montris kun Ying Bojue kaj Xie Xida.

Apenaŭ la du alvenintoj eniĝis tra la pordo, ili sin ĵetis sur la plankon antaŭ la spirit-tabuleto de la sinjorino Florvazo kaj ploris longan tempon, ripetante, foje kaj refoje, la vortojn:

“Mia bonkora kaj virta bofranjo...”

Tio vekis ĉe Ora Lotuso kaj Jada Turo sakradon. Ili murmuris inter si:

“Tiuj ĉi glatlangaj kanajloj! Ĉu ili sugestas per tio, ke ĉiu el ni la ceteraj estas nek bonkora, nek virta?”

Kiam ili finis sian ploradon, ili leviĝis sur la piedojn, kaj Ximen Qing reciprokis ilian saluton.

La du ree komencis plori, dirante:

“Kia aflikto vin turmentas, fraĉjo! Ho, kia aflikto!”

Ili estis enkondukitaj en unu el la flankaj ĉambroj, kie ili interŝanĝis salutojn kun la klerulo Wen kaj sidiĝis. Ying Bojue la unua ekparolis, demandante:

“Kiam forpasis nia bofranjo?”

“Ŝi elspiris la lastan spiron je la hor-duo *chou*,” respondis Ximen Qing.

“Kiam mi revenis hejmen, jam estis batita la kvara hor-duo,” diris Ying Bojue. “Kiam mia edzino demandis, kiel la bofratino fartas, mi diris: ‘Ĉio, kion ni povas fari, estas esperi, ke la bonaj agoj, kiujn ŝi antaŭe faris en kaŝeco, utilos al ŝia resaniĝo. La malsano de la bofratino jam estas en sia lasta stadio.’ Poste, apenaŭ mi endormiĝis, mi havis sonĝon, en kiu fraĵo sendis servoknabon inviti min ĉeesti bankedon en via loko celebre al via oficiala promociiĝo kaj instigis min veni kiel eble plej rapide. Ĉe mia alveno, mi vidis, ke vi estas vestita tute en skarlato. Vi elprenis du jadajn harpinglojn el via maniko por montri al mi kaj diris, ke unu el ili jam rompiĝis. Ekzameninte ilin kelktempe, mi diris: ‘Fraĵo, kiel domaĝe! Tiu ĉi rompita estas el jado, dum la alia, kiu restas sendifekta, estas el artefarita kristalo.’ Sed vi insistis, ke ili ambaŭ estas el jado. Kiam mi vekiĝis, mi diris al mi mem, ke tiu ĉi sonĝo aŭguras nenian bonon. Mia edzino rimarkis, ke mi senĉese ŝmacis per la lipoj kaj demandis min, al kiu mi parolas, sed mi diris: ‘Vi ne komprenas. Atendu, kaj mi diros al vi post la tagiĝo.’ Sed kiam mateniĝis, alvenis via servoknabo, vestita en blanka funebra vesto, kio igis min piedfrapadi la plankon en konsterniĝo. Kaj nun, sufiĉe certe, fraĵo, mi vidas, ke vi efektive portas funebbron.”

“Lastanokte ankaŭ mi havis sonĝon, kiu estis ĝuste kiel la via,” diris Ximen Qing. “Mi sonĝis, ke mia boparencino Zhai Qian en la Orienta Ĉefurbo sendis al mi kompletan da ses harpinglojn, el kiuj unu estis rompita. Mi diris, ke estas tro domaĝe, kaj ĝuste kiam mi estis preta diri al mia edzino pri tio ĉe la noktomezo, neatendite, ni estis informitaj, ke Florvazo en la antaŭo ellasis la lastan vivspiron. La Ĉielo devas esti blinda, lasante tiun ĉi katastrofon fali sur min. Mi, Ximen Qing, preferus morti anstataŭ ŝi, ol alfronti tiun ĉi okazaĵon. En la estonteco, kiam ajn mi ekpensos pri ŝi, kiel mi povus min deteni de korŝira doloro? Mi neniam faris malbonon al iu ajn, kial la Ĉielo forrabis de mi miajn plejamatajn? Unue mian infanon, kaj nun, ŝi kuŝas ĉi tie, mortinta. Por kio do mi plu vivas en tiu ĉi mondo? Eĉ se mia mono amasiĝinta atingus la altecon de la Granda Ĉerpilo¹⁰, kian utilon do ĝi havas por mi?”

“Fraĵo,” diris Ying Bojue, “malpravaj estas tiuj ĉi vortoj viaj. Estas vere, ke mia bofratino estas bona edzino via, kaj ke nun, kiam ŝi mortis tiel subite, kiel vi povus vin deteni de kordolora afliktiĝo? Sed la fakto estas, ke vi ne nur estas la posedanto de tiu ĉi konsiderinda riĉaĵo, sed ankaŭ havas oficistan karieron antaŭ vi. Vi estas kiel la kolosa monto Tai¹¹, de kiu dependas la membroj de tiu ĉi tuta familio, junaj kaj maljunaj, de supre malsupren, por sia ekzistado. Se io neatendita okazus al vi, kion ili farus tiam? Ekzemple, tiuokaze tiuj ĉi aliaj sinjorinoj viaj estus forlasitaj sen edzo ilin vivtenanta. Kiel diras la proverbo: *se unu vivas, ĉiuj tri vivas; se unu pereas, ĉiuj tri pereas*. Fraĵo, vi estas sufiĉe inteligenta kaj prudenta, por ke mi senutile diru al vi tion ĉi. Estas ne mirinde, ke la morto de nia bofratino en sia flora juneco estas por vi doloro apenaŭ eltenebla, sed, aliflanke, se vi konservos en vi

ĉiam la memoron pri ŝi, metos sur vin la funebran veston, aranĝos, ke bonzoj kaj taŭlistaj pastroj recitu sanktajn tekstojn por ŝi, organizos imponan funebran procesion, kaj faros al ŝi tre decan enterigon, vi jam plene esprimos al ŝi viajn profundajn sentojn. Tia estas la inda sorto de nia kara bofratino. Kion alian pli bonan do vi povus fari al ŝi? Nu, mia fraĉjo, vi devos ne esti plu tiel ĉagrenita.”

Tiu ĉi sola konversacio kun Ying Bojue havis tian efikon sur Ximen Qing, ke lia menso subite plilarĝiĝis kaj plilumiĝis, kaj la obstrukco en lia menso abrupte malaperis, kaj li ĉesis plori. Baldaŭ, kiam teo estis portita al ili, li komencis trinki teon.

Li do alvokis Dai’an kaj diris al li:

“Iru al la malantaŭo kaj diru al ili, ke ili preparu nutraĵon, por ke mi manĝu kune kun via oĉjo Ying, la klerulo Wen, kaj via oĉjo Xie.”

“Fraĉjo,” demandis Ying Bojue, “vi do ankoraŭ ne manĝis, ĉu?”

“De kiam vi foriris,” diris Ximen Qing, “mi estis multeokupita la tutan nokton. De tiam ĝis nun, mi havis absolute nenan apetiton por io ajn.”

“Vi ne manĝis!” ekkriis Ying Bojue. “Fraĉjo, tio estas granda stulteco de vi! Kiel diras la proverbo: *estas preferinde perdi la kapitalon, ol lasi sin turmenti de malsato*. Ĉu ne estas dirite en la *Klasikaĵo pri Fila Devo*, ‘La homoj estu instruataj pri tio, ke la vivanto ne devus esti vundata pro la mortinto, kaj ke la difekto suferata ne devus konduki al la malutilo al la vitala forto.’ La mortinto estas mortinta, kaj supervivantoj devas daŭrigi sian vivadon. Mia kara fraĉjo, estu prudenta kaj gardu vian sanon!”

Vere:

Kelkaj paroloj malfermas ĝustan vojon por noblulo;

Unu aŭ du vortoj tuj vekas dormanton el lia sonĝo.

Notoj:

1. *La blua birdo: laŭ la legendo, la blua birdo estis mesaĝisto de la Okcidenta Reĝa Patrino (mitologia persono, kutime priskribita kiel bela senmortulino). En tiu ĉi verso la aŭtoro aludas, ke ĝi volas plu servi kiel kuriero inter paro da geamantoj. Legu la versojn de la Tang-dinastia poeto Li Shangyin: La insulo Penglai ne estas malproksima de ĉi tie; / Mi deziras nur, ke la blua birdo la kuriero ofte faru al vi viziton!*

2. *Legu la versojn el Han-dinastiaj Sep antikvaj poemoj de anonimulo: Ŝi iris ŝirkolekti aromajn herbojn sur la monto / Kaj, sub la monto, okaze renkontis sian iaman edzon.*

3. *Pelo de la fiŝo en la reton (de iu alia): kutimdiro signifanta “penadi por aliula intereso kun nenia profito al si mem”.*

4. Fingromontri la moruson kaj insulti la soforon: kutima esprimo signifanta “insulti en nereкта maniero”.

5. Esti kiel ĉevalo penanta kapti raton: kutimiro signifanta “agi kun granda konfuzo”.

6. Tamburi kaj marŝi antaŭen unuflanke kaj svingi la flagon por signali retiriĝon aliflanke: kutima esprimo signifanta “sin prepari al du eventualoj”.

7. Granda arĝenta ingoto: unu granda arĝenta ingoto pezis kvindek taelojn.

8. Svingi sonoriletojn kaj bati tamburojn: kutimiro signifanta “tamburi por sciigi ion al la publiko” aŭ “fari publikan elmontron”.

9. Trovi la montojn tro altaj kaj la akvojn tro malaltaj: kutima esprimo aludanta ion malfeliĉan, precipe morton.

10. La Granda Ĉerpilo: la ĉina nomo de la Granda Ursino (Ursa major).

11. La monto Tai: la sankta monto Tai en la provinco Shandong.



elĉinigis **Wang Chongfang** (Ĉinio)

La tuta libro de la romano estas baldaŭ eldonota de MAS (Monda Asembleo Socia) en kvin apartaj volumoj.

Feng Jicai (1942-)



aŭtoro, Feng Jicai

Grasulo kaj Malgrasulo

En ĉi tiu urbo, Grasulo kaj Malgrasulo estis amikoj. La korpo de Grasulo, kiu mirige dikis, kvaroble egalas al tiu de Malgrasulo, kiu surprizige magris.

Tiam, Grasulo estis bonŝanca. La altranguloj devis esti grasuloj, pentristoj senescepte pentris portretojn de grasuloj, kaj eĉ virinoj elektis grasulon kiel sian edzon. Oni diris, ke grasaj homoj povas prezenti la veran virecon, ĉar ili havas kolosan korpon kaj fortan energion.

Sekve ekaperis la tendenco: ju pli dikkorpa, des pli bona. Grasulo, la plej dika homo en la urbo, rikoltis ekstreman priatenton. Oni venis al li por informiĝi kiel grasiĝi; liaj fotoj, rimarkoj, anekdotoj vete publikiĝis. Interalie, li malkaŝis du pecojn da sperto de sia pligrasiĝo: pli da dormado kaj pli da manĝado, kaj senmovemo pli bonas ol aktivemo. Tiujn vortojn ĉiuj urbanoj elbuŝigis kiam ili parolis, kaj rigardis kiel moton. Se oni sekvis tiujn konsilojn, efiko riveligiĝis vere! Pro tio, grasuloj pli kaj pli multiĝis, kaj eĉ iuj, kiuj ne povis grasiĝi por momento, afektis sian grasiĝon per blovitaj vangoj kaj pufigita ventro.

Iufoje, Grasulo estis ĝenata de grupo da ĵurnalistoj kaj tiuj devigis lin eldiri la sekreton de grasiĝo. Li laŭvole diris, "Necesas surhavi lozan veston kaj malstreĉitan zonan." Ĝuste pro tiuj vortoj, la lozaj vestaĵoj tuj elvendiĝis kaj diversaj specoj de zonoj stagnis en vendado. Tiumomente la famon de Grasulo superis tiu de reĝisoroj, aktoroj, pilkosteloj, inventistoj, magiistoj kaj homoj kun speciala kapablo.

Iutage, Grasulo gaje iris viziti sian malnovan amikon Malgrasulo. Vidante lin boneca, li, per sia graskarna fingro, montras al la riboj de Malgrasulo, dirante, "Nun ĉiuj urbanoj sekvas mian ekzemplon. Kial vi, kiel mia bona amiko, ne fari la samon? Ĉu estas homo pli malgrasa ol vi en la mondo?"

Malgrasulo, kun apenaŭ videbla rideto, diris memfide, "Via bonŝanco estas portempa. Ĝis kiam via influo forpasos, jen mia vico venos. Atendu kaj vidu."

Post unu jaro, vere okazis ŝanĝo. Cirkulis diraĵo oni ne sciis de kie: grasuloj ofte emas spiregi, ŝviti kaj movmalfacila; tro da akumulita graso kondukas al angiaj malsanoj; kaj cent malutiloj paras kun nur unu utilo. Kiam malpliigi la kuriozeco kaj intereso de oni pri unu aĵo, ĝia malaĵo montris sian magipovon. Kiel blovo de

vento, tiu diraĵo flugis tra la tuta urbo. Tuj sekve aperis en ĵurnalo la tutpaĝa artikolo Estas Bone Fariĝi Malgrasuloj. Kun tre logika rezonado, ĝi pravige laŭdis malgrasecon kaj mallaŭdis grasecon, kaj komentis: malgrasuloj estas movfacilaj, malpezaj, okupante malgrandan spaco; iliaj koroj eltenas malgrandan premon, tiel ke estas malfacile por ili suferi angiajn malsanojn; statistike, el longvivaj homoj, 98 procentoj estas malgrasuloj, 1 procento nek grasaj nek malgrasaj homoj, kaj nur 1 procento grasuloj, tial estas okaza fenomeno, ke grasuloj longe vivas.

Ekde tiam, oni komencis doni atenton al malgrasiĝo. Finfine Malgrasulo, kiu ĉiam dronis en onia forgeso, estis eltrovita kvazaŭ kiel rara trezoro.

La sperto de malgrasiĝo estis ĝuste mala kontraŭ tiu de grasiĝo, kies recepto jenas: limigo de manĝaĵoj, vegetara dieto, malmulte da sukero, nedrinkado de biero, matena boksado, postmanĝa promenado, sportekzercado... Pro tio, tiuj, kiuj verkis artikolojn por laŭdi grasulojn, komencis konvertiĝi al laŭdantoj de malgrasuloj. Ili skribis amason da eseoj kun multaj citaĵoj por pruvi kiel valora, fidinda kaj prava estas la sperto de malgrasiĝo. Ili ŝutis sur malgrasulojn tiajn flataĵojn kiaj “la plej bona korpopezo”, “la korpopezo plej konforma al la demando de la epoko” kaj “tipaj figuroj”. La sciigoj pri grasuloj malaperis tute el ĵurnaloj. Malgrasulo, kiel vento, laŭdite, soris al la ĉielo. Kaj neĝere flirtis liaj fotoj, anekdotoj, spertoj, interesaj novaĵoj, rimarkoj, intervjuoj kaj raportaĵoj.

Iutage, Malgrasulo renkontiĝis kun Grasulo surstrate. Tiu, kiu sentis sin forlasita, malgaja kaj malvigla, kortuŝite diris al Malgrasulo, “Viaj vortoj estas pravaj. Se mi sekvus vian konsilon tiutempe kaj min malgrasigus! Nun estas malfacile por mi igi min maldika.”

Ĉe tiuj vortoj, Malgrasulo, svingante sian fingron similan al seka branĉeto, admonis, “Ne! Vi devas teni vin tia. Kiu scias, je kiu tempo oni adoras grasecon!”

elĉinigis **Liu Mingbai** (Ĉinio)



esperantigita de **Paula Adúrız** (Hispanio)

Guy de Maupassant (1850-1893)



Adventuroj de Walter Schnaffs

Ekde kiam Walter Schnaffs eniris en Francujon kun la agresantaj trupoj, li konsideris sin mem kiel la plej malfeliĉan homon. Pro graseco li marŝis kun malfacileco, senĉese anhelante kaj des pli pro sia paro da dikgrasaj plataj piedoj, li sentis netolereblan doloron dum irado. Kaj li estis pacama bonvolulo, li absolute ne estis

aŭtoro, Guy de Maupassant

noblanima aŭ sangavida persono. Li estis patro de kvar infanoj, kiujn li profunde amis. Lia edzino estis juna virino kun blondaj haroj, kaj ĉiun vesperon li afliktite sopiris al ŝi, kiu donis al li tenerecon, prizorgemon kaj kisojn. Li ŝatis enlitiĝi frue kaj ellitiĝi malfrue, gustumi malrapide bongustajn manĝaĵojn kaj trinki glason da biero en la etaj vivvendejoj. Krome, li pensis, ke ĉiuj belaj objektoj en la mondo ne ekzistas kun malapero de la vivo; tial li gardis en la koro instinktan, samtempe racian kaj ekstreman malamon al la kanonoj, fusiloj, revolveroj kaj sabroj, precipe al bajonetoj, ĉar li sin sentis, ke li ne povis manipuli kun fleksebleco ĉi tiujn armilojn, kiuj bezonis rapidajn movojn por defendi sian grasan ventron.

Nokte, kiam li kuŝis sur la tero, envolvita en sia mantelo, ĉe la flanko de ronkantaj kamaradoj, li longe sopiris al siaj familianoj restantaj tiuflanke kaj pensis pri la danĝeroj embuskantaj sur la vojo: “Se mi estos mortigita, kio okazos al miaj infanoj? Kiu do ilin vivtenos kaj edukos?” Nun ili estas tre malriĉaj, malgraŭ ke mi donis al ili kelke da arĝentaj moneroj, kiujn mi prunteprenis ĉe mia ekiro.” Ĉiufoje, kiam li pensis pri tio, Walter Schnaffs ploris kelkfoje.

En komenco de batalo li sin sentis malforta je gamboj. Se li ne pensis, ke, se li falus, la aliaj armeanoj estus trepasontaj sur lia korpo, li jam estus falinta sur la teron. La siblado de flugantaj kugloj jam starigis al li la haŭtharojn.

Dum pluraj monatoj li vivis tiel en la teruro kaj turmentiĝo.

Lia korpuso antaŭenmarŝis al la Normandio. Iun tagon li estis sendita fari skoltadon kun malgranda taĉmento por nur priserĉis parton de la regiono kaj reiri tuj poste. Ĉio ŝajnis kvietaj en la kamparo, tie troviĝis nenia signo de rezistado.

Tamen, kiam la prusoj malsupreniris en la valeton, en kiu punktiĝis profundaj kavoj, salvo de pafado haltigis ilin. Ĉirkaŭ 20 inter ili jam estis faligita. Trupo de franc-tiraljonoj subite elsaltis de arbareto granda kiel mano, sin antaŭenjetis per rapidaj kaj grandaj paŝoj, kaj fiksas la bajoneton al la pafil tubo.

Walter Schnaffs senmove staris tie en la komenco, kaj li sentis tian timegon, ke li eĉ ne pensis pri forkuro. Poste li estis kaptita de forta deziro forkuri. Sed li tuj pensis, ke kompare kun malgrasaj kaj malgrandaj francoj, kiuj petolsaltante venis kiel trupo da kaproj, li kuris kiel testudo. Tiam li rimarkis, ke ses paŝojn antaŭ li troviĝas larĝa fosego plena de dornarbetaĵoj kaj kovrita de sekiĝintaj folioj, kaj li ensaltis kuniginte du piedojn, senkonsidere pri ĝia profundeco, kvazaŭ ensaltante de ponto en riveron.

Kiel sago, li trapasis dikan tavolon da lianoj kaj dornarabetoj. Liaj vizaĝo kaj manoj gratvundiĝis, kaj li peze sidiĝis sur ŝtonon de la fosega fundo.

Tuj levante la kapon li rigardis supren la ĉielon tra truo kiun li faris. Sed ĉi tiu truo eblis malkaŝi lin. Kaj li singardeme rampis kvarpiede kiel eble plej rapide tra interplektitaj branĉoj al la fundo de la fosego por esti malproksime de la batalkampo. Baldaŭ poste li haltis kaj residiĝis, kuntiriĝante kiel kapro meze de la altaj velkĝintaj herboj.

Dum kelka tempo, li ankoraŭ aŭdis eksplodajn bruojn, kriojn kaj ĝemojn. Poste la krioj de la batalo malfortiĝis kaj ĉesis. Ĉio ree fariĝis silenta kaj kvieta.

Subite io ŝanceliĝis ĉe lia flanko. Li saltleviĝis de timo. Tio estis nenio alia ol birdeto, kiu fluge falis sur la branĉon kaj tiel skuis velkintajn foliojn. Ĝuste pro tio, lia koro forte batis, preskaŭ dum unu horo.

La nokto falis kaj la mallumo envolvis ravinon. La soldato profunde enpensiĝis. Kion li devis fari? Kia li estis fariĝonta? Ĉu li iris kuratingi sian armeon?... Sed kiel? Kien li iris? Se li estis kuratingonta sian armeon, li estis revivonta la teruran vivon de afliktoj, timego kaj suferoj depost la komenco de la milito! Ne! Li sentis, ke li ne plu havas tian kuraĝon! Li ne plu havis sufiĉe da forto por elteni la suferojn dum marŝado kaj alfronti la danĝerojn, kiuj povis okazi ĉiam kaj ĉie.

Sed kion fari? Li ne povis ĉiam resti en la ravino kaj sin kaŝis ĝis la fino de milito. Ne, certe. Se li ne bezonus manĝi, ĉi tiu perspektivo ne tro terurus lin; sed li bezonis manĝi kaj manĝi ĉiutage.

Li sin mem sentis sola, kun armiloj, kun uniformo, sur la teritorio de malamiko, for de tiuj, kiuj povis defendi lin. Ektremo trakuris lian korpon.

Subite li pensis: “Se mi estus kaptito!” Kaj en lia koro estiĝis deziro, tre forta deziro, nevenkebla deziro: esti kaptito de francoj. Kiel kaptito, li estos savita, bone nutrita, loĝigita, ŝirmita kontraŭ kugloj kaj sabroj, sen ajna maltrankvilo, en bone gardata prizono. Kiel bela revo! Li tuj prenis firman decidon:

— Mi mem iras kapitulaci por fariĝi kaptito.

Stariĝinte, li decidis efektiviĝi tiun ĉi projekton sen perdi eĉ unu minuton. Sed li subite fariĝis senmova, atakita de malagrablaj ideoj kaj nova timo.

Kien li iris esti kaptito? Kiel? Al kia direkto li iris? En tiu ĉi momento timindaj bildoj, la bildoj de morto svarmis en lian kapon..

Kun pinta kasko, li rabie kuradis sur la kampoj sole, riskante grandajn danĝerojn.

Se li renkontos kamparanojn? Tiuj, vidante pruson sendefenda, mortigos lin kiel senhejman hundon! Ili lin buĉos per forkegoj, pioĉoj, falĉiloj kaj ŝpatoj! Ili faros el li viandan pulpon per frenezeco de kolerigitaj venkitoj.

Se li renkontos francajn gerilanojn? Ili estas frenezuloj, kiuj observas nek leĝojn nek disciplinon. Por sin amuzi ĉirkaŭ unu horon, ili pririgardos lian kapon aŭ primokos lin, kaj fine lin pafmortigos. Tia ideo sentigis lin, ke lia korpo jam sin apogas al muro, vizaĝe al dek du pafiltuboj, ĉi tiuj dek du nigraj kaj rondaj truetoj ŝajnis lin rigardi.

Se li renkontos la francan trupon? Tiuj avangardaj trupanoj prenos lin por skolto, aŭdaca kaj ruzema, kiu sola spionas, kaj pafos al li. Li malesperis kaj residiĝis. Li falis en seneliran situacio.

La nokto estis profunda, ĉi tiu estis silenta kaj nigra nokto. Li ne moviĝis plu. Se nur aŭdante ian ajn malpezajn kaj nekonatajn bruojn, li eksaltis de ektimago. La brueto de leporo, kies vosto ektuŝis la enirejon de kaverno, preskaŭ lin timigis por forkuro. La ululado de strigoj tremigis lin, tiel ke subita timo trakuris lian korpon, kvazaŭ kaŭzante doloron de vundo. Li gvatis per larĝe malfermitaj okuloj en la mallumo. Li imagis ĉiumomente, ke li aŭdis onin marŝi ĉirkaŭ li.

Post longa nokto kaj damninda teruro, li finfine ekvidis tra la branĉoj surkape, ke la ĉielo jam klariĝis. Li eksentis grandegan trankviliĝon; liaj membroj malstreĉiĝis; lia koro kvietiĝis; kaj liaj okuloj fermiĝis, tiel ke li endormiĝis.

Kiam li vekigis, la suno proksimiĝis al la zenito de la ĉielo. Certe jam estis tagmezo. Sur la kampo regis kvieteco, tristeco kaj tomba silento. Kaj li sentis teruran malsaton.

Li oscedis. Li salivumis je ekpenso pri kolbasoj, la bonaj kolbasoj, kiuj soldatoj manĝis. Li sentis malkomfortecon en la stomako.

Li stariĝis kaj iris kelkajn paŝojn. Li sentis, ke liaj gamboj estis malfortaj, kaj li residiĝis por mediti. Dum du aŭ tri horoj li ankoraŭ pezis la por kaj la kontraŭ kaj ĉiumomente ŝanĝis sian decidon, li for-refoje pripensis de pozitivaj kaj negativaj kialoj, tia idea batalo sentigis al li doloron.

Li finfine elpensis racian kaj praktikan solvon: Li atendos ĝis kiam kamparano, sen armiloj nek danĝeraj agrikulturiloj, sole pasos tie, li alkuris antaŭ lin, klarigante al li, ke li volos kapitulaci kaj submetiĝi al lia dispono.

Li do demetis sian kaskon, ĉar ĝia pinto povis malkaŝi lin. Li etendis sian kapon el la kaŝejo kun granda singardemo.

Nenia estaĵo montriĝis sur la horizonto. Maldekstre, li ekvidis grandan citadelon kun turoj ĉe ambaŭ flanko, trans suproj de arboj ĉe avenuo.

Li atendis ĝis vespero, sed li nur vidis korvojn rondflugi kaj aŭdis murmuradon de sia malsata stomako. Li sentis grandan aflikton.

La nokto denove falis sur lin.

Kuŝante sur la fundo de la fosaĵo, li sentis grandan maltrankvilon kaj teruran malsaton, tiel ke li ne povis bone dormi, kaj ofte atakate de premsonĝoj.

La aŭroro leviĝis denove super lia kapo. Li rekomencis observon. Sed la kamparo restis neniŭ, kiel la hieraŭo. Kaj nova timo, la timo de morti de malsato, venis en la kapo de Walter Schnaffs! Ŝajnis, ke li vidis sin mem fermi la okulojn kaj kuŝi sur la dorso en la fundo de truo. Poste bestoj, diversaj bestetoj proksimiĝus al lia kadavro kaj komencus manĝi lin, samtempe estus atakinte lin ĉie de lia korpo, ili enŝovus sub liaj vestoj por mordi lian ĝlacie malvarman haŭton. Granda korvo bekus per longa kaj maldika beko liajn okulojn.

Tiam, li fariĝis freneza, kvazaŭ li tuj svenus de malforto kaj ne povus plu marŝi. Kaj spite al ĉio kaj riskante ĉion, li pretis rapidi al la vilaĝo, sed ekvidante tri kampulojn kun longtenilaj forkoj surŝultre iri labori sur la kampoj, li ree eniĝis en la kaŝejon.

Ĉe noktigo, kiam regis obskuro sur la ebenaĵo, li malrapide elrampis el la fosego, kaj kun kurbigita dorso kaj batanta koro, iris al malproksima kastelo. Li preferis eniri en la kastelon ol en la vilaĝon, kiu ŝajnis al li timinda kaverno, kie loĝis multaj tigroj.

Tra la fenestroj de ĝia teretaĝo videbliĝis lamplumo kaj unu el ili estis eĉ malfermita. De tiu ĉi fenestro ellasiĝis fortaodoro, kiu subite penetris, tra la nazo, ĝis la ventron de Walter Schnaffs, konvulsigante kaj spiregante lin. Li estis nesinregeme tirita de ĝi, kaj naskis aŭdacon de batalemo.

Senpripense li subite aperis antaŭ la fenestrobreto, ankoraŭ kun kasko sur la kapo.

Ok servistoj vespermanĝis ĉirkaŭ granda tablo. Sed servistino subite malfermis la buŝon, faligis la glason en mano sur la teron, kaj fiksrigardis en stuporo.

Oni rimarkis malamikon!

Dio! La prusoj atakas la kastelon!...

En la komenco tio ĉi estis unu krio, ok homoj eligis per ok malsamaj tonoj, unu timindan krimon, poste kaskado da bruo de forkuro. Poste bruo de tumulta forkurado. Ĉiuj interpuŝiĝis kaj interkonfuziĝis, ili kuris per ĉiuj siaj fortoj al la pordon de tiu ekstremaĵo. La seĝoj renversiĝis, la viroj renversis la virinojn kaj piedpaŝis de sur iliaj korpoj. En fulmodaŭra momento la homoj tute forkuris en la ĉambro estis neniŭ, postlasis plenan tablon da manĝaĵoj. Rigardante la manĝaĵojn en la vizaĝo, Walter Schnaffs restis ŝtoniĝinta pro teruro, ĉiam staris antaŭ la fenestrobreto.

Hezitante iom, li transgimpis enen kaj sin ĵetis al la pladoj sur la tablo. Kvankam pro akra malsato li tremis tra la korpo, kiel februlo, timo detenis lin de plua ago. Ĉiuj pordoj estis fermitaj, kaj sur la supra planko aŭdiĝis rapidemaj paŝoj. La maltrankvila pruso atenteme aŭskultis al tiu bruo. Poste li aŭdis pezajn sonojn, kvazaŭ iu saltus el la dua etaĝo kaj lia korpo frapus la molan teron ĉe la piedo de muro.

Baldaŭ poste ĉiuj movoj, ĉiuj tumultoj ĉesis, kaj la kastelo fariĝis silenta kiel tombo.

Walter Schnaffs sidiĝinte antaŭ telero netuŝita, ekmanĝis. Li manĝis per grandaj buŝplenoj, kvazaŭ timante ke iu interrompus lin antaŭ ol li manĝas sufiĉe. Li ĵetis per ambaŭ manoj pecegojn da manĝaĵo en sian faŭkan buŝon similan al enfalujo. La pecegoj da nutraĵo pufiĝis la gorĝon, kiu grandiĝis preskaŭ ĝis kreviĝo, kaj li ne devis ne halti por momento. Li iris trinki cidron el la ĵaro por purlavi sian ezofagon, kvazaŭ oni dragus la blokitan kloakon.

Li formanĝis la aĵojn en ĉiuj teleretoj, teleroj kaj boteloj; li estis drinkinta kaj manĝinta ĝis plena kontentiĝo, havis konfuzitan kapon, havis tre ruĝan vizaĝkoloron, singultis iam kaj iam, la korpo ĉiam tremis pro singulto, la cerbo estis konfuza kaj la buŝo estis grasa. Li disbutonis sian uniformon por spirado, li jam ne povis moviĝi eĉ unu paŝon. Lia okuloj fermiĝis, lia cerbo estis komata; li klinis pezan frunton kruce metante siajn brakojn sur la tablon, kaj li perdis iom post iom konscion. La pecegoj da nutraĵo pasis tra lia gorĝo, kiu pufis, kaj falis unu post alia en lian stomakon. Kelkfoje li sentis, ke la gorĝo ŝajnas kreviĝonta tubo pro plenplena ŝtopaĵo.

La malkreskanta luno super arbpintoj en la ĝardeno disverŝis malklaran lumon sur la teron. Tiam estis la malvarma horo tuj antaŭ tagiĝo.

La ombro glitis en la densan arbaron. Iafoje lunlumo heligis la ŝtalan pinton de lia kasko en obskuro.

La kastelo trankvile staris alte kun malluma konturo. Nur du fenestroj ankoraŭ lumis en la teretaĝo.

Subite tondra voĉo kriis:

— Antaŭen! Mil diabloj! Sin antaŭenĵetu! Junuloj!

Post momenteto homfluo entrudis la domon, kaj detruis pordojn, ŝturojn, fenestrovitrojn kaj ĉiujn aliajn aĵojn. Tuje kvindek soldatoj plene armitaj ensaltis en la kuirejon, kie Walter Schnaffs profunde dormis, kaj kvindek ŝargitaj fusiloj celiĝis al lia brusto. Ili lin renversis kaj rulpuŝis teren, kaptis kaj ligis lin de la kapo ĝis la piedoj.

Li spiregis en timego, kaj ne komprenis, kio okazas. Li estis batita kaj pelita per kolboj de fusiloj, tiel ke li dronis en granda paniko.

Grasa oficiro, kiu portis uniformon ornamita per ora pasamento, post mallonga tempo, metis piedon sur lian ventron, kaj laŭtvoĉe kriis:

—Vi estas kaptita, kapitulacu!

La pruso nur aŭdis ĉi tiun vorton “kapitulaci”, li ĝeme diris: “Jes, jes, jes”.

Venkintoj levis kaj alligis lin al seĝo. Ili ĉiuj pririgardis lin kun granda scivolemo, anhelante kvazaŭ balenoj. Kelkaj el ili sidiĝis, neelteneble pro troaj emocio kaj laceco.

Sed Walter Schnaffs ekridis, nun li ridis, certa, ke li finfine fariĝis kaptito!

Alia oficiro envenis kaj diris:

— Mia kolonelo, la malamikoj ĉiuj forfuĝis. Pluraj el ili ŝajne estas vunditaj. Ni jam fariĝis la mastroj de tiu ĉi loko.

La grasa oficiro, kiu viŝis ŝviton de sur la frunto, laŭtvoĉe kriis: “Ni venkis!”

Kaj li skribis sur agendeto por komerco eltirita de sia poŝo: “Post arda batalo, prusoj estas devigitaj retiriĝi, forportante iliajn mortintojn kaj vunditojn. Laŭ kalkulo, kvindek homoj estas ekstermitaj, kaj pluraj kaptitaj.”

La juna oficiro ree diris:

— Kiel agi mi devas, mia kolonelo?

La kolonelo respondis:

— Ni tuj retretu por eviti ilian kontraŭatakon per artilerio kaj super forto.

Kaj li ordonis ekmarŝi.

La trupanoj denove kolektiĝis en mallumo ĉe la piedo de la muro de la kastelo, kaj ekmoviĝis. Walter Schnaffs, firme ligita, estis ĉirkaŭita de ses soldatoj kun revolvero en la mano.

Skoltoj estis senditaj por esplori la vojon. La trupoj antaŭenmarŝis kun singardemo, kaj ripozis surloke de tempo al tempo.

Ĉe la tagiĝo, la trupoj atingis la subprefekturbon de la Roche Oysel, ĉar ĉi tiu batalo estis plenumita de la Nacia Gardo.

La urbanoj atendis kun maltrankvilo kaj malpacienceco. Kiam ili ekvidis la kaskon de la kaptito, laŭtaj krioj eksplodis. La virinoj alte levis la manojn, maljunulinoj ekploris, maljunulo ĵetis sian promenbastonon al la pruso, sed ĝi vundis la nazon de unu el liaj eskortantaj soldatoj.

Tiel estis, ke la kastelo Champignet repreniĝis post la okupado de la malamiko nur ses horojn.

La kolonelo Ratier, drapkomercisto, kiu gvidis la atakon de la Nacia Gardo de Rochel-Oysel kaj akiris la venkon, estis honorita per ordeno.



Elfrancigis **Leming Lin** (Ĉinio)

Cai Nan

La urbo sen birdoj

En nia urbo ne videblas birdoj delonge. Ilin fortimigas la arbaro de fabrikanj kamentuboj, vicoj da altaj etaĝdomoj vualitaj per densa fumo, kaj multnombraj veturiloj kaj homsvarmoj. Sen sufiĉe granda spaco kaj sufiĉe bona aero, kial birdoj nestus kaj ĉirkaŭflugus ĉi tie?

Tamen la literatura diletanto Blumaro sopiras al apero de birdoj ĉiutage. Li laboras malokupite en malokupita laborejo, kaj li disponas pri multe da libera tempo por legi kaj mediti libere. Apogante siajn vangojn per ambaŭ manoj, li fikse rigardis malproksimen: sunlumo, nuboj kaj nebuleca ĉielo, sed neniufluganta birdo en lia vido. Li pensas, ke pro abundeco homoj ne estas priatentataj, kaj pro malabundeco birdoj akiras sopiron de homoj. Kiam li povas fariĝi birdo kaj flugi el ĉi tiu kaĝsimila domo?

Tia penso akumuliĝis kaj pligrandiĝis kiel balono de sopiro, kiu elkreskis el la brusto de Blumaro. Li jam sentis, ke necesas por li provi flugadon. Eble flugado ne nur estas la naturo de birdoj, ankaŭ homoj povas flugi? Nur pro tio, ke ili al kutimiĝas al irado, sidado kaj dormado, ili forgesas flugadon. Se pere de mia prova flugado la fluga instinkto de homoj ekspluatiĝos kaj ili fariĝos liberaj birdoj, ĉu tio ne estas mia kontribuo al la homa mondo aŭ almenaŭ al ĉi tiu urbo?

Post kelkaj tagoj da pripensado, li konsideris, ke li devas ekagi. Tiun matenon li surmetis lozajn veston kaj pantalonon, kaj elirinte de la dormejo, supreniris al la tegmento de la administranta domo. Sur la tegmento, li, post kelkfoja rondkurado, haltiĝis, etendis la brakojn, svingis la kruojn, larĝigis la bruston kaj faris kelkajn eksaltojn. Alvizaĝe al la ĉielo, li plenforte kriis: mi volas flugi...

La sono de kriado leĝere falis el la ĉielo sur la homojn en la korto, kiuj alvenis por labori. Pro tio ĉiuj ĉeestantoj levis la kapon. Lia rigardo balais la ĉielon kaj la domojn de la tuta urbo, kaj poste karambolis kun la rigardoj de la ĉeestantoj. Li trovis, ke iliaj rigardoj estas ĝoje surprizitaj, sopiremaj, laŭdaj kaj eĉ kuraĝigaj.

Senhezite li alvenis al la mezo de la tegmento. Post ekscita elano, li korposvinge eksaltis kun siaj brakoj etenditaj. Li vere ekflugis el la tegmento.

Lia flugado estis leĝera kaj malrapida, kaj liaj lozaj vesto kaj pantolono flirtis kaj dancis en la vento. Komence li flugis supren, poste horizontale kaj fine glisis malsupren. Lia korpo komencis rotacii. Li vidis, ke homoj en la korto disen kuris, kaj kelkaj el ili streĉis dikan tolon uzitan por kovri varojn. Li estis falanta kun sia dorso al tiu tolo. Sekve, bum! li perdis konscion.

Lia unuafoja flugado malsukcesis, el kio li fariĝis ĝibulo. En la tago, kiam li estis elhospitaliĝonta, la kuracisto, post demetado de gazo kovranta sur lia ĝibo, trovis, ke du simetriaj karnaj ŝvelaĵoj elkreskis sur lia ĝibo. Kun miro, la kuracisto ekpinĉis la karnajn ŝvelaĵojn per poroperacia pinĉilo. Ekster lia atendo, la karnaj ŝvelaĵoj, ĉe ektaŭso de la pinĉilo, eĉ moviĝis kaj kreskadis, kaj baldaŭ fariĝis paro da enormaj flugiloj. Kun surprizita ekkrio, la kuracisto, forĵetinte la pinĉilon, kuris el la malsanĉambro, kvazaŭ renkontinte fantomon.

Blumaro ĝojplene ekkriegis. Svinginte la flugilojn, li eliris el la ĉambro, trairis la longan koridoron de la hospitalo, iris tra la mirplenaj rigardoj kaj alvenis al la brua strato. Kun profunda enspiro, li svingis la flugilojn kaj vere li ekflugis je elano. Li flugis kaj flugis, super domoj, tra fumaj nebuloj kaj nuboj. Li vidis belan sunon kaj bluan ĉielon super nuboj, kaj helikopteron fulme flugi super lia kapo... Kie estas birdoj? Li pensis. Mi fariĝas birdo ĝuste pro tio, ke ne troviĝas birdoj en la urbo. Mi devas vivi kun birdoj! Tiel pensante, li fale ĉirkaŭflugis en la arbaron ekster la urbo. Tie troviĝis vasta kaj densa soforarbaro ĉe la norda bordo de rivero. Diversspecaj birdoj kolektiĝis ĉi tie inter soforfloroj. Kiam li alvenis, ili diskutis pri translokiĝado, ĉar fremdlanda investanto, kiu ekŝatis ĉi tiun lokon, volis ruinigi la arbaron por konstruigi amuzejon, tiel ke birdoj devis serĉi alian loĝejon. La alveno de Blumaro plirapidigis ilian translokiĝon. Pro timo al ĉi tiu fremda birdo, je longa kriado de la ĉefa birdo, leviĝis subita ciklono en la arbaro kaj densa arego da birdoj tajde forflugis, tiel ke sennombraj soforfloroj falis sur la teron je dika kaj ĥaosa tavolo.

Li volus kriegi al la birdoj, "Ne fuĝu, ne fuĝu! Ankaŭ mi estas birdo!", sed li ne povis eligi parolon el la gorĝo, kie murmuris nur raŭka kaj orelnalplaĉa pepado. Li kontraŭvole paralizis sur centjare maljuna soforarbo, kun siaj flugiloj pendantaj senforte inter branĉoj.

Paf! Lia flugilo estis pafita. Kun ekkrio, li malespere falis sur la teron kovritan per floroj.

Du ĉasistoj alkuris. Ili volus ĉasi aliajn birdojn, sed la alveno de Blumaro neatendite savis la birdojn. La birdoj forflugis, dum li fariĝis la predo de la ĉasistoj. Ili kunportis lin al nia urbo, kaj forvendis lin al la nove konstruita parko. La bredisto metis lin en la specialan kaĝon.

De tiam nia urbo sen birdoj havigis al si unu birdon, unu homan birdon.

elĉinigi **Nan Mu** (Ĉinio)

Fratoj Grimm



Tri ŝpinistinoj

Estis iam maldiligenta knabino, kiu ne volis ŝpini, kaj la patrino povis diri ion ajn, ŝi ne povis devigi ŝin pri tio. Fine la patrino fariĝis iam tiel kolera kaj senpacienca, ke ŝi batis ŝin, pro kio ŝi laŭte ekploris. Ĝuste en tiu momento estis preterveturigata la reĝino, kaj kiam ŝi aŭdis la ploradon, ŝi haltigis la kaleŝon, paŝis en la domon kaj demandis la patrinon, kial ŝi batas la filinon tiel, ke oni povas aŭdi la kriadon ekstere sur la strato. Jen la patrino hontis malkaŝi la

aŭtoroj: fratoj Grimm

maldiligentecon de sia filino kaj diris: „Mi ne povas deturnigi ŝin de la ŝpinado, ŝi volas ĉiam kaj seninterrompe ŝpini, kaj mi estas tiel malriĉa, ke mi ne povas alporti tiom da lino.“

Jen la reĝino respondis: „Mi aŭskultas nenion pli volonte ol la ŝpinadon kaj neniam estas pli plezurigita ol tiam, kiam la radoj ronrone klaketadas; donu vian filinon al mi en la kastelon, mi havas sufiĉe da lino, jen ŝi ŝpinu tiom multe, kiom plaĉas al ŝi.“



La patrino estis elkore kontenta, kaj la reĝino kunprenis la knabinon. Kiam ili atingis la kastelon, ŝi kondukis ŝin supren en tri ĉambretojn, kiuj de malsupre ĝis supre estis plenigitaj de la plej bela lino.

„Nun ŝpinu al mi tiun linon!“, ŝi diris, „kaj se vi kapablos ŝpini la tutan linon, vi ricevu mian plej aĝan filon kiel edzon. Kaj kvankam vi estas malriĉa, mi ne atentos tion, via nelacigebla diligento estas sufiĉe da doto.“

La knabino ektimis interne, ĉar ŝi ne povis ŝpini la tutan linon, eĉ se ŝi fariĝus tricentjara kaj ĉiutage ŝpinus sidante de mateno ĝis vespero ĉe la rado. Kiam ŝi poste estis sola, ŝi komencis plori kaj sidis tiel dum tri tagoj sen movi manon. Je la tria tago venis la reĝino al ŝi, kaj kiam ŝi vidis, ke ankoraŭ nenio estas ŝpinita, ŝi miris; sed la knabino senkulpigis sin per tio, ke ŝi ne povis komenci ŝpini pro granda aflikteco pri la forigo el sia patrino domo. La reĝino akceptis tion, sed ŝi diris forirante: „Morgaŭ vi devos komenci labori.“

Kiam la knabino denove estis sola, ŝi ne sciis kiel konsili kaj helpi al si, kaj ŝi iris pro sia aflikteco al la fenestro. Jen ŝi vidis, kiel proksimiĝis tri inaĉoj. El ili la unua havis larĝan platan piedon, la dua havis tiom grandan malsupran lipon, ke ĝi pendis malsupren trans la mentonon. Kaj la tria havis larĝan dikfingron. Ili haltis antaŭ la fenestro, rigardis supren kaj demandis la knabinon, kio mankas al ŝi. Ŝi lamentis pri sia mizero, kaj pro tio ili ofertis sian helpon kaj diris: „Se vi invitos nin al la nupto, se vi ne hontos pro ni kaj nomos nin viaj kuzinoj kaj ankaŭ sidigos nin al via tablo, tiukaze ni pretos forŝpini la linon, kaj tio dum mallonga tempo.“

„Elkore volonte“, ŝi respondis, „envenu do kaj tuj komencu la laboron.“

Ŝi enlasis la tri strangajn inojn kaj estigis en la unua ĉambreto malplenan lokon, kie ili sidiĝis kaj komencis ŝpini. Unu el ili tiris la fadenon kaj tretadis la radon, la alia lekis la fadenon, la tria turnigis ĝin kaj batis per fingro sur la tablon. Kaj tiom ofte, kiom ŝi batis, falis sur la plankon ŝpinitaĵo, eĉ de la plej fajna speco. Antaŭ la reĝino ŝi kaŝis la tri ŝpinistinojn kaj montris al la reĝino, tiom ofte, kiom tiu vizitis ŝin, la kvanton de la ŝpinita lino. Tiel, ke la reĝino ne povis laŭdi ŝin sufiĉe. Kiam la lino de la unua ĉambreto estis ŝpinita, ili ŝpinis tiun en la dua, fine en la tria, kaj ankaŭ tiu baldaŭ estis malplenigita. Tiam la tri inoj adiaŭis sin kaj diris al la knabino: „Ne forgesu, kion vi promesis al ni. Ĝi estos via feliĉo.“

Kiam la knabino montris al la reĝino la malplenaĵajn ĉambretojn kaj la grandan amason de ŝpinita lino, ŝi aranĝis la nupton kaj la fianĉo ĝojis, ke li ricevis tian lertan kaj diligentan edzinon, kaj li tre laŭdis ŝin.

Mi havas tri kuzinojn“ diris la knabino, „kaj ĉar ili bonfartigis min tiom multe, mi ne volus volonte forgesi ilin dum mia feliĉo; permesu al mi inviti ilin al la nupto, kaj ke ili sidu kun mi ĉe la tablo.“

La reĝino kaj la fianĉino diris: „Kial ni ne permesu tion?“

Kiam la festo poste komenciĝis, enpaŝis la tri virgaj inoj en strangaj tradiciaj vestoj, kaj la fianĉino diris: „Estu bonvenigataj, karaj kuzinoj.“

„Aĥ“, diris la fianĉo, „kiel tio okazis, ke vi akiris tiajn abomenajn amikinojn?“ Post tio li iris al tiu kun la granda plata piedo kaj demandis: „De kio vi havas tian larĝan piedon?“

„De la tretado“, ŝi respondis, „de la tretado.“

Jen iris la fianĉo al la dua kaj demandis ŝin: „De kio vi havas tiun malsupren pendantan lipon?“

„De la lekado“, ŝi respondis, „de la lekado.“

Jen li demandis la trian: „De kio vi havas la larĝan dikfron?“

„De la fadeturnado“, ŝi respondis, „de la fadeturnado.“

Jen la reĝofilo ektimis kaj diris: „Mia bela fianĉino ne tuŝu de nun kaj neniam denove ŝpinradon.“

Per tio ŝi estis liberigita de la aĉa linoŝpinado.

Originalo: Die drei Spinnerinnen

Fonto: Jakobo kaj Vilhelmo Grimm: Infan-kaj domfabeloj, Eldono lastmana, eldonejo Reclam, „Die drei Spinnerinnen“

Joĉjo kaj Gretinjo

Ĉe granda arbaro vivis malriĉa lignohakisto kun sia edzino kaj siaj du infanoj; la bubo estis nomata Joĉjo kaj la knabino Gretinjo. La lignohakisto ne havis sufiĉe da manĝo kaj malmulton por dividi, kaj foje, kiam la prezoj en la lando tre altiĝis, li ankaŭ ne plu povis havigi la ĉiutagan panon. Kiam li cerbumis vespere en la lito pri tio kaj turnadis sin pro ĉagreno de unu flanko al la alia, li ekĝemis kaj diris al sia edzino: „Kio fariĝu el ni? Kiel ni nutru niajn kompatindajn infanojn, se eĉ por ni mem ni ne havas ion plu?“

„Mi havas ideon, edzo“, respondis la edzino, „morgaŭ matene ni kondukos la infanojn en la arbaron tien, kie ĝi estas plej densa. Tie ni ekbruligos por ili bivakfajron kaj donos al ĉiu ankoraŭ peceton da pano, poste ni iros al nia laboro kaj lasos ilin solaj. Ili ne trovos la vojon hejmen kaj ni liberigos nin tiel de ili.“

„Ne, edzino“, diris la viro, „tion mi ne faros; kiel mia koro povus permesi lasi miajn infanojn solaj en la arbaro! La sovaĝaj bestoj baldaŭ alkurus kaj disŝirus ilin.“

„Ho, ŝtipkapulo“, ŝi diris, „tiukaze ni ĉiuj devos malsatmorti, vi jam povas raboti la tabulojn por la ĉerkoj.“ Kaj ŝi ne lasis lin en paco, ĝis kiam li konsentis.

„Sed la kompatindajn infanojn mi tamen bedaŭras“, diris la viro. Ankaŭ ambaŭ infanoj pro malsato ne povis dormi kaj aŭskultis, kion la duonpatrino diris al la patro. Gretinjo ploris maldolĉajn larmojn kaj diris al Joĉjo: „Nun nia fino venos baldaŭ.“

„Silentu, Gretinjo, ne ĉagreniĝu, mi ja helpos al ni.“

Kaj kiam la plenaĝuloj jam endormiĝis, li leviĝis, sin vestis, malfermis la suban pordoduonon kaj elŝteliĝis. La luno radiis tute hele kaj la blankaj silikaj ŝtonetoj, kiuj kuŝis antaŭ la domo brilis kiel taleroj. Joĉjo kliniĝis kaj metis tiom da ili en sian jakopoŝon, kiom li trovis spacon en ĝi. Poste li reiris kaj diris al Gretinjo: „Konsoliĝu, kara fratino, dormu trankvile, Dio ne forlasos nin.“ Poste li denove enlitiĝis.

Kiam la mateno komenciĝis, antaŭ ol la suno leviĝis, venis jam la edzino kaj vekis la du infanojn: „Leviĝu, maldiligentuloj, ni iros en la arbaron por alporti lignon.“

Poste ŝi donis al ĉiu el ili panpeceton kaj diris: „Jen iom da pano por tagmezo, sed ne manĝu ĝin jam antaŭe, plian manĝon vi ne ricevos.“

Gretinjo metis la panon sub la antaŭtukon, ĉar Joĉjo havis la ŝtonetojn en la poŝo. Poste ili ĉiuj survojiĝis kaj ekiris en la arbaron. Kiam ili iris dum iom da tempo, haltis Joĉjo kaj rigardis malantaŭen al la domo. Kaj tion li ripetis denove kaj denove. La patro rimarkis: „Joĉjo, kial vi rigardas tien kaj postrestas? Atentu, ke vi ne forgesu viajn piedojn!“

„Aĥ, patro“, diris Joĉjo, „mi rigardas al mia blanka kateto, ĝi sidas sur la tegmento kaj volas diri adiaŭ al mi.“

La duonpatrino diris: „Stultulo, tio ne estas via kateto, tio estas la matena suno, kiu lumigas la kamentubon.“

Sed Joĉjo ne rigardis al la kateto, sed ĉiufoje ĵetis blankan ŝtoneton el sia jakopoŝo sur la vojon. Kiam ili atingis la mezon de la arbaro, parolis la patro: „Nun kolektu lignerojn, infanoj miaj, mi volas ekbruligi fajron, por ke vi ne frostotremu.“

Joĉjo kaj Gretinjo kunkolektis lignerojn kaj amasigis ilin montete. La lignon oni ekbruligis, kaj kiam la flamoj jam brulis tre alte, diris la duonpatrino: „Nun kuŝigu vin al la fajro, infanoj, kaj ripozu, ni iros inter la arbojn kaj hakos lignon. Kiam ni estos pretaj, ni revenos kaj kunprenos vin.“

Joĉjo kaj Gretinjo sidis ĉe la fajro, kaj kiam fariĝis tagmezo, ĉiu el ili manĝis sian peceton da pano. Kaj ĉar ili aŭdis la batojn de la hakilo, ili supozis, ke ilia patro estas proksime. Sed tio ne estis la hakilo, sed branĉo, kiun li ligis al seka svelta arbo, kaj kiun la vento ĵetadis tien kaj tien. Kaj kiam ili sidis dum longa tempo, iliaj okuloj fermis sin pro laceco kaj ili firme endormiĝis. Kiam ili fine vekigis, la nokto estis jam tute malhela. Gretinjo komencis plori kaj diris: „Kiel ni nun eliru de la arbaro?“

Sed Joĉjo konsolis ŝin: „Atendu nur iom da tempo, ĝis kiam la luno eklumos. Tiam ni ja trovos la vojon.“

Kiam leviĝis la plena luno, Joĉjo manprenis la fratinton kaj iris laŭvice de la silikaj ŝtonetoj, kiuj brilis kiel ĵus stampitaj taleroj kaj montris al ili la vojon. Ili iris dum la tuta nokto kaj venis je la mateno denove al la domo de la patro. Ili frapis la pordon, kaj kiam la duonpatrino malfermriglis la pordon kaj vidis, ke estas Joĉjo kaj Gretinjo, ŝi diris: „Malicaj infanoj, kial vi dormis tiom longan tempon en la arbaro? Ni supozis, ke vi tute ne volas reveni.“

Sed la patro ĝojis, ĉar kuntiriĝis lia koro, ĉar li postlasis ilin tiel solaj.

Iom da tempo post tio revenis denove la mizero en la domon, kaj la infanoj aŭskultis, kiel la duonpatrino diris nokte en la lito al la patro: „Ĉio estas denove formanĝita. Ni havas ankoraŭ duonon de pano, kaj poste la kanto finiĝos. La infanoj

devos foriĝi, ni kondukos ilin pli profunden en la arbaron, por ke ili ne retrovu la vojon. Alie ne estos savo por ni.“

Tio tre ŝarĝis la koron de la patro kaj li pensis: „Estus pli bone, se vi dividus vian lastan mordadon kun la infanoj.“

Sed la edzino tute ne atentis tion, kion li diris. Ŝi insultis kaj riproĉis lin. Kiu levis la piedon, devas ekpaŝi. Kaj ĉar li cedis je la unua fojo, li devis cedi ankaŭ la duan fojon.

La infanoj ankoraŭ ne dormis kaj aŭskultis la interparoladon. Kiam la plenkreskintoj dormis, Joĉjo denove ellitiĝis, volis eliri kaj kolekti blankajn ŝtonetojn, kiel dum la unua fojo; sed la edzino fermriglis la pordon, kaj Joĉjo ne povis eliri. Sed li konsolis lian fratinton kaj diris: „Ne ploru, Gretinjo, kaj dormu trankvile, la kara Dio ja helpos al ni.“

Je la frua mateno aperis la edzino kaj vekis la infanojn. Ili ambaŭ ricevis panpeceton, sed la pecetoj estis ankoraŭ pli malgrandaj ol je la unua fojo. Sur la vojo en arbaron Joĉjo diserigis ĝin enpoŝe, ofte haltis kaj jetis ĉiufoje paneron teren.

„Joĉjo, kial vi haltadas kaj rigardas malantaŭen?“ demandis la patro. „Iru survoje!“

„Mi rigardas al mia kolombeto, kiu sidas sur la tegmento kaj volas diri adiaŭ al mi“, respondis Joĉjo.

„Ŝtipkapulo“, diris la duonpatrino, „tio ne estas via kolombeto, sed la matena suno, kiu lumigas la kamentubon.“

Joĉjo jetis iom post iom ĉiujn siajn panerojn sur la vojon.

La duonpatrino kondukis la infanojn ankoraŭ pli profunden en la arbaron, kie ili estis ankoraŭ neniam. Oni denove ekbrulis grandan bivakfajron kaj la duonpatrino diris: „Restu sidantaj tie, infanoj, kaj se vi estos lacaj, dormu iom. Ni iros inter la arbojn kaj hakos lignon. Kaj vespere, kiam ni finos la laboron, ni revenos kaj kunprenos vin.“

Kiam estis tagmezo, Gretinjo dividis sian panpecon kun Joĉjo, kiu diserigis sian sur la vojon. Poste ili ekdormis kaj la vespero pasis; sed neniu venis al la kompatindaj infanoj. Ili vekigis nur en la senluma nokto kaj Joĉjo konsolis sian fratinton per la vortoj: „Atendu, Gretinjo, ĝis kiam leviĝos la luno, tiam ni vidos la panerojn, kiujn mi faligis, ili montros al ni la vojon hejmen.“

Kiam aperis la luno, ili ekiris, sed ili ne trovis panerojn, ĉar miloj de birdoj, kiuj flugadas en la arbaro kaj sur la kampoj, forbekis ilin. Joĉjo diris al Gretinjo: „Ni ja trovos la vojon.“

Sed ili ne trovis ĝin. Ili iris dum la tuta nokto kaj tutan tagon de mateno ĝis vespero, sed ili ne sukcesis eliri de la arbaro. Ili fariĝis tre malsataj, ĉar ili manĝis nenion krom kelkaj beroj, kiujn ili trovis sur la tero. Kaj ĉar ili estis tiel lacaj, ke la piedoj ne plu volis porti ilin, ili kuŝigis sin sub arbo kaj ekdormis.

Jam pasis la tria mateno de tiam, kiam ili forlasis la domon de la patro. Ili denove ekiris antaŭen, sed la sorto kondukis ilin pli kaj pli profunden en la arbaron, ili bezonis baldaŭnan helpon por ne devi morti. Je tagmezo ili vidis belan neĝe blankan birdeton sidantan sur branĉo. Ĝi kantis tiel bele, ke ili haltis kaj aŭskultis ĝin. Kaj kiam ĝi finis la kanton, ĝi eksvingis la flugilojn kaj flugis antaŭ la infanoj, ili sekvis ĝin, ĝis ili atingis dometon, sur kies tegmento la birdeto sidigis sin, kaj kiam ili tute proksimiĝis, ili vidis, ke la domo estas konstruita el pano kaj kovrata de kukoj; la fenestroj estis eĉ el hela sukero.

„Ni uzu do la okazon“, diris Joĉjo, „kaj manĝu kun benita apetito. Mi manĝos pecon de la tegmento, Gretinjo, vi manĝu de la fenestro, ĝi gustas dolĉe.“

Joĉjo atendis manon alten kaj derompis peceton de la tegmento, por provi, ĉu ĝi gustas, kaj Gretinjo staris apud la rondaj fenestretoj kaj rongis la vitron. Subite vokis delikata voĉo el la loĝo-ĉambro:

„Jen krak', kraket', ronĝeto,

La infanoj respondis:

„La vent', la vent',

la ĉiela splend'“.

kiu manĝas de mia dometo?“

Kaj ili daŭrigis manĝi sen lasi ĝeni sin. Joĉjo, al kiu bongustis la tegmento, deŝiris grandan pecon de ĝi, kaj Gretinjo elpuŝis tute rondan fenestrovitron, ŝi sidigis kaj ĝuis la dolĉaĵon. Jen subite malfermiĝis la pordo kaj malrapide ŝtele eliris pramaljunulino, kiu apogis sin per lambastono. Joĉjo kaj Gretinjo ektimis tiom, ke ili lasis fali tion, kion ili tenis permane. La maljunulino skuadis la kapon kaj diris: „Ha, karaj infanoj, kiu kondukis vin ĉi tien? Envenu do kaj restu ĉe mi, ne okazos io malbona al vi.“

Ŝi prenis ilin ambaŭ je la manoj kaj kondukis ilin en la domon. Tie ŝi surtabligis bonan manĝon, lakton kaj patkukon kun sukero, pomojn kaj nuksojn. Poste ŝi kovris du belajn litetojn per blankaj litajoj. Joĉjo kaj Gretinjo kuŝigis sin sur ilin kaj pensis, ke ili troviĝas en la ĉielo.

La maljunulino nur ŝajnis sin tiel afabla, sed ŝi estis sorĉistino malica, kiu embuskadas infanojn, kaj ŝi konstruis la pandometon nur tial, por tiel allogi la infanojn. Se ŝi kaptis iun infanon, ŝi mortigis ĝin, kuiris kaj manĝis ĝin, kaj tio estis ŝiaj festtagoj. Sorĉistinoj havas ruĝajn okulojn kaj ne povas rigardi grandan distancon, sed ili havas fajnan flarsenton kiel la bestoj kaj sentas, kiam proksimiĝas homoj. Kiam Joĉjo kaj Gretinjo proksimiĝis al ŝi, ŝi ridis malice kaj parolis mokeme: „Tiujn mi havas en miaj ungoj, tiuj ne povos fuĝi!“

Frumatene, antaŭ ol vekigi la infanojn, ŝi jam ekstaris, kaj kiam ŝi vidis ilin ambaŭ tiel ĉarme dormi plene ruĝvangaĵaj, ŝi murmuris al si mem: „Ili estos bongustaj mordaĵoj.“

Jen ŝi kaptis Joĉjon per siaj ostecaj manoj kaj forportis lin en staleton kaj fermis la kradopordon. Li povis krii kiom ajn laŭte, ne helpis al li. Poste ŝi iris al Gretinjo, vekskuis ŝin kaj kriis: „Ellitiĝu, maldiligentulino, alportu akvon kaj kuiru al via frato bonaĵon, li sidas ekstere en la staleto kaj grasiĝu. Kiam li estos grasa, mi manĝos lin.“

Gretinjo ekploris maldolĉajn larmojn; sed vane, ŝi devis fari tion, kion postulis la malica sorĉistino.

Por la kompatinda Joĉjo oni nun kuiradis tre bonan manĝon, sed Gretinjo ricevis ĉiam nur kankroŝelojn. Ĉiumatene la maljunulino ŝteliris al la staletoj kaj kriis: „Joĉjo, etendu la fingrojn eksteren, por ke mi palpu, ĉu vi estos baldaŭ grasa.“

Sed Joĉjo etendis osteton eksteren al ŝi, kaj la maljunulino, kiu havis malklaran vidadon, ne povis vidi tion kaj opiniis, ke ĝi estas fingro de Joĉjo, kaj ŝi miris, ke li ne fariĝas grasa. Kiam kvar semajnoj pasis kaj Joĉjo plu estis magra, ŝi fariĝis malpacienca kaj ne volis plu atendi.

„Hehe, Gretinjo“, ŝi kriis al la knabino: „Rapidu alportu akvon! Egale, ĉu Joĉjo estas grasa ĉu magra, morgaŭ mi buĉos Joĉjon kaj kurojn lin.“

„Ah“, la kompatinda fratino ĝemegis, kiam ŝi devis alporti akvon, la larmoj fluis trans ŝiaj vangoj malsupren!

„Kara Dio, helpu al ni“, ŝi vokis laŭte, „kial ne manĝis nin la sovaĝaj bestoj en la arbaro? Tiukaze ni estus mortintaj kune.“

„Ŝparu al viajn ĝemojn“, diris la maljunulino. „Tio ja tute ne helpas al vi.“

Sekvatage frumatene Gretinjo devis ellitiĝi kaj pendigi la kaldronon plenan de akvo kaj ekbruligi fajron.

„Antaŭe ni baku panon“, diris la maljunulino, „mi jam hejtis la bakfornon kaj knedis la paston.“



Ŝi puŝis la kompatindan Gretinjon eksteren al la bakforno, el kiu jam elfulmis flamoj.

„Enrampu“, diris la sorĉistino, „kaj rigardu tie, ĉu estas sufiĉe da fajro por ke ni povu ŝovi la panon internen.“

Kaj se Gretinjo estus farinta tion, ŝi estus ferminta la bakfornon kaj Gretinjo estus rostita en ĝi. Kaj poste ŝi volis manĝi ankaŭ ŝin. Sed

Gretinjo rimarkis, kion ŝi intencas kaj diris: „Mi ne scias kiel fari tion, kiel mi enrampu tie?“

„Stulta ansero“, diris la maljunulino, „la truo estas sufiĉe granda, jen, rigardu, mi povus mem enrampi.“

Ŝi proksimiĝis ŝtelire kaj metis la kapon en la bakfornon. En tiu momento Gretinjo tiel forte puŝis ŝin, ke ŝi tute eniris, ŝi fermis la feran pordon kaj fermiglis ĝin. Hu! Jen la sorĉistino komencis hurli, tute terure, sed Gretinjo forkuris, kaj la sendia sorĉistino devis mizere forbruli.

Gretinjo kuris tuj al Joĉjo, malfermis la staleton kaj ekkriis: „Joĉjo, ni estas savitaj, la maljuna sorĉistino estas morta.“

Tial Joĉjo elsaltis, tiel, kiel birdo el kaĝo, se oni malfermis ties kaĝopordeton. Kiom ili ĝojis! Ili brakumis sin reciproke, saltadis kaj kisis unu la alian! Kaj ĉar ili ne plu devis timi, ili iris en la domon de la sorĉistino. Tie staris en ĉiuj anguloj kestoj kun perloj kaj valoraj ŝtonoj.

„Ili estas eĉ pli belaj ol silikaj ŝtonetoj“, diris Joĉjo, kaj metis en siajn poŝojn tiom da ili, kiom trovis lokon en ĝi. Kaj Gretinjo diris: „Ankaŭ mi volas hejmporti ion.“

Kaj ŝi plenigis sian antaŭtukon.

„Sed nun ni foriru“, diris Joĉjo, „por eliri de la sorĉistina arbaro.“

Kiam ili jam iris kelkajn horojn, ili atingis riveregon.

„Ni ne povas transiri“, diris Joĉjo. „Mi ne vidas lignan transirejon kaj neniu ponton.“

„Ĉi tie ankaŭ ne estas pramŝipeto“, respondis Gretinjo, „sed jen naĝas blanka anaso, mi petos ŝin, ke ĝi helpu al ni transiĝi. Ŝi vokis:

„Anaseto, anaseto,

Jen Joĉjo kaj Gretinjo,

Nek transirej' nek ponto,

portu nin sur l' blanka dorso.“

La anaseto efektive alnaĝis, kaj Joĉjo sidiĝis sur ĝin kaj petis, ke la fratino sidiĝu apud li.

„Ne“, respondis Gretinjo, „la ŝarĝo fariĝus tro granda por la anaseto, ŝi transportu nin unu post la alia.“

Tion faris la bona besteto, kaj kiam ili transveturis bonŝance kaj iris jam iom da tempo, fariĝis la arbaro pli kaj pli konata al ili, kaj fine ili ekvidis de malproksime la patran domon. Ili ekkuris, ĵetiĝis en la loĝoĉambron kaj brakumis sian patron. La viro ne havis ĝojigan horon, de kiam li lasis la infanojn en la arbaro, kaj la duonpatrino jam mortis. Gretinjo malplenigis per skuado sian antaŭtukon, tiel, ke la perloj kaj juveloj saltadis en la loĝoĉambro. Kaj Joĉjo elĵetis manpleno post manpleno el la poŝo. Jen la mizero finiĝis kaj ili ĝoje vivis kune. Finiĝis mia fabelo, jen kuras muso. Tiu, kiu kaptos ĝin, rajtos fari grandan peltoĉapon el ĝi.

Originalo: Hänsel und Gretel

Fonto: Jakobo kaj Vilhelmo Grimm: Infan-kaj domfabeloj, Eldono lastmana, eldonejo Reclam, „Hänsel und Gretel“



tradukis Dorothea kaj Hans-Georg Kaiser (Germanio)

lingve kontrolis Vladimir Türk

Iljet Aliĉka (Albanio)



aŭtoro, Iljet Aliĉka

Vilaĝa historio

Memkompreneble, instruisto en montara vilaĝo, kiam li havas ĉambron apud preĝejo kaj tomboj, kiam li estas sola kaj kiam ekstere pluvas kaj blovegas vento – povas senti sin iom necerte. Sed iafaĵe tiu ĉi timo montriĝas serioza, kiam oni

aŭdas frapadon sur la pordon, ĉar povas esti nur vento, sed ankaŭ – diablo scias, kio. Eble iuj fantomoj? La kampuloj diradas, ke ili – malhelpataj de neniu – senceremonie forlasas la tombojn, kiam eknoktas super la vilaĝo.

Iam en tia nokto la frapado sur la pordon ŝajnis al mi pli forta ol kutime.

– Kiu? – mi vokis laŭte, sed ĝuste por sufoki timon ol por ekscii, kiu povus esti. Ŝajnis al mi, ke mi aŭdis tusetadon. Ekregis silento, kaj post momento venis raŭka homa voĉo: „Estat me, Mork, jinstruisto Andreju, mi estat Mork”.

En la vilaĝo estis multaj, kiuj nomiĝis Mark.

Mi malfermis la pordon. Estis Mark el la bordo de la torento.

Malsekega, malpura, kun du dentoj, en ĉifono, senhejma – mallonge dirite – tiom da mizerego. Mi rememoris, ke li loĝas en budo malproksime de la vilaĝo, sur la bordo de la torento, sola kiel fingro. Kaj eble la aliaj ne volis esti kun li? Oni diradis, ke li estas suspektinda politike. Simple la nigra ŝafo.

– Eniru, Mark – mi invitis lin.

Tremegante en la tuta korpo, li eniris la loĝejon, sed antaŭ ol sidiĝi, li forskuis akvon kiel hundo. Kun mallevita kapo, englutante vortojn kaj lispante, li alparolis min:

– Instruisto Andreju, me estat kon ve.

Kaj post momento:

– Me estat kon ve, je Djo.

– Kun kiu „vi”? – mi demandis surprizita.

– Nu, kjel do, kon ve, el lo Regestar kaj Partijo – li respondis miregante pro mia naiveco.

– Ah, jes – mi murmuris.

Aŭ li opiniadis min – nur Dio scias kion, aŭ li imagis, ke ĉiu ŝtata dungito kapablas solvi la homajn problemojn.

– Mi ne kredas, Mark, ke vi venis nur por diri tion al mi?

– Nu, jes, me hontat, ke me venit tjom molfrue, me dirot lo verun – me ne volit, ke jile vidu, ke me venit, cor poste jile babilat, ke Mork nur kurat kon plendoj. Sed ve estat alija. Ve estat el Tirona. Ve finit lernejujn, ne tjel, kjel me – li suspiris. – Me venit, por ke ve skribu por me leterun al lo regestar, jile donu al me ijan angulun. Me ne lernit skribi. Mja bud tuj disfalot, ankore ijumete, kaj ĝe falegot sur men. Sed plej malbona estat lo turent, kju fluat en lo riveretun. Kjam pluvat, tju ĉe turentet kurat ĝuste tra lo mez de mja bud. Lo tabuloj putrit.

Mark ridetis, kvazaŭ rakontante ion hontigan.

– Nun, kjam pluvegat sencese, cu ve scijat, kjo okazit? Me dormit kaj lo turentet malsekigit al me lo nazacun, kaj me trador me ne vidis, cu iju mem kisat oŭ lekat.

Li ekridis kore, tusante kaj ŝanceliĝante je ambaŭ flankoj.

– Sed kial vi ne parolis kun tiuj el la konsilio? Se mi scias, vi vivas plej malbone en la tuta vilaĝo.

– Uĥ, jinstruisto Andreju, ve jo scijat, ke neniju men aŭskultat. Kon ve me bobilat sincere, me volut lodzi en tjuj kuperativaj kobanoj, kje estat multe da homoj, nujbaroj, jinfonoj... kje me povut molfermi lo buŝun al iju...

– Klare, nu, klare – mi interrompis – eksidu Mark kaj iom varmiĝu ĉe la forno, ĝis mi skribos la leteron.

– Hmm, nur me petat ven, ve scijat ple bone, kjel skribi, kaj ne forgesu bobili al tjuj alte, anke pri lo turent kaj...

– Kompreneble, Mark. Sed jam ne malhelpu, ĉar mi bone scias, kion skribi.

Mi ankoraŭ ne skribis eĉ du frazojn, kiam li ekstaris denove kaj volis memoriĝi ion. Mi ne povis kolekti pensojn.

– Mark – mi petis – ĉu vi lasos min skribi aŭ ne? Ne timu, mi ne forgesos la torenton.

– Jes, jes, me scijat, me scijat – li volis min trankviligi. – Dzuste tjucele me venit al ve – kaj denove li eksidis ĉe la forno. Li ne kuraĝis interrompi, sed mi sentis, ke li suferas, ĉar li ne povas memoriĝi min pri la torento aŭ pri io.

Mi ĵus finis, kiam Mark aldonis duonvoĉe, sen leviĝi de sia loko:

– Kaj ankore ijon: me petat, ne skribu en lo leter, ke lo turentet malsekigit al me lo nazacun, kjam me dormit, car jile ridot pri me.

– Ne, kompreneble, mi ne skribos – mi trankviligis lin.

Kiam mi finis, mi respiris pli facile kaj ekstaris por preni koverton. Mark observis ĉiun movon. Li leviĝis tre malrapide kaj elbalbutis:

– Dankun, grondan dankun, ante ol ve en lo kuvertun metot lo leterun, tralegu ĝen foje, me petat.

– Kompreneble – mi respondis kaj komencis laŭtlegi kun emocio. Mi ja volis, ke mia skribaĵo ekplaĉu al Mark. Ju pli longe mi estis leganta, Mark streĉiĝis kiel kordo kaj aŭskultis kun pia atento. Subite li ekremegis. Oni ne scias, ĉu pro malvarmo aŭ kortuŝo. Mi ankoraŭ ne legis ĝis la fino, kiam liaj malsekaj ŝultroj impete skuigiĝis kaj mi orekaptis ploregon. Li elpoŝigis ŝiritan ĉifonon kaj viŝis la nazon kaj larmojn.

– Kio okazas, Mark? – mi demandis milde.

– Neniĵo, vere neniĵo, sed ve skribit ĉion tĵel bele – li provis rideti, kvazaŭ vere nenio estus okazinta. – Me petat, legu dzis lo fin.

– Mi ja legas, sed kio okazas – mi eksentis min ofendita.

– Car kĵam ve legit tĵel pri mĵa viv, me bedaŭrit.

– Kiun vi bedaŭris?

– Men.

– Aha – mi ne sciis, kion diri. – Nu, bone, Mark, prenu la leteron kaj morgaŭ sendu ĝin al la urbo.

– Ne, ne. mi petat, legu ĝen.

Li ŝajnis pli kvietta, do mi daŭrigis legadon, kontenta almenaŭ pri tio, ke mia skribaĵo plaĉis al li.

Sed kiam li nur aŭdis la sekvan frazon, denove li ekploris.

– Kion vi faras, Mark? Ja ĉion, kion mi skribis ĉi tie, vi rakontis, do vi scias bone.

– Me scijat, me scijat, certe me scijat, sed aliĵe tĵo signifat, kĵam one legat lo vivun... kĵel en libroj.

– Oh, Mark, estu viro – kaj mi frapetis lian dorson, de kiu leviĝis vaporo kiel el fumotubo.

Denove li viŝis la vizaĝon per ĉifono. Liaj okuloj brilis, li ektusetis kaj demandis:

– Hmm, me ne scijat, me ne scijat, eble jes. – Li rigardis min esperoplene.

Post momento li ekstaris, premis al mi la manon forte, ankoraŭfoje dankis „por lo bela labor, kĵun ve farit” kaj paŝis dignoplena al la pordo. Sed li ankoraŭ ne transiris la soĵlon, kiam li turniĝis, kvazaŭ denove li volus diri ion al mi. Sur lia vizaĝo aperis turmento.

– Jinstruisto Andreĵu, pardunu men, sed me petat, cu ve povut ankorefoje tralegi al me tĵun ce leterun? – kaj ne atendente mian respondon, li tuj elpoŝiĝis la leteron. En liaj okuloj brilis espero.

– Konsentite – mi cedis – sed kun unu kondiĉo, ke vi jam ne ploras!

– Jes, jes – li plivigliĝis. – Me nur tĵel, por ke ankorefoje me oŭskultu, kĵel ve skribit tĵion.

Mi komencis legi sen precipa atento.

Sed neniu diris, ke Mark tenos sian promeson. Li ekploregis pli laŭte ol unuafoje. Mi ne sciis, kion fari.

La ploreganta Mark, englutante vortojn, intencis diri ion al mi:

– Oĵ, nur me... legu, legu, me petat.

„Eble pli bone, ke li ploras” – mi ekpensis kaj plu legis. Mark volis kaŝi siajn larmojn, deturnante la kapon. Mi finis legi kaj sidiĝis sur la seĝon en silento, atendente ĝis li kvietigos sin.

Dum momento li fariĝis tre serioza, subite li saltetis, kvazaŭ li estus brogvundita, kaj lamante kiel emerita soldato li elkuris en la pluvon. Li surprizis min.

– Bonan nokton, Mark – mi kriis tra la mallumo.

Mi aŭdis nur plaŭdadadon de liaj piedoj en la flakoj. „Eble li foriris por ĉiam” – mi ekpensis, sed li revenis kvin minutojn poste.

Forte li frapis sur la pordon.

– Mark, ne turmentu min vane – mi kriis el la ĉambro. – Mi jam ne legos vian leteron! Nun revenu, kuŝiĝu por dormi, ĉar estas malfrue.

– Sed me ne venit, k ve legu al me lo leterun, jinstruisto Andreju – li respondis per krio – me venit kon alijo.

Laŭvoĉe li ne ŝajnis malgaja. Mi malfermis la pordon. Lia vesto estis malsekega ĝis la lasta fadeneto.

– Cu ve scijat, kjal me revenit? Me dirit al me, ke me foririt sen bona vurt kaj olportit nenijon. Ve farit laburun, kaj me nenijon. Kijon ve volat, ke me olportu: kastanujn, salitajn tomatujn, eble ajlun...?

– Ne, ne, Mark, ne estas necese – mi interrompis – nenion mi faris, mi skribis nur tion, kion vi diris, mi volas nenion.

– Ne, ne, ĵjon me olportot, nur diru, kijon ve dezirat – insistis Mark.

Li ne volis lasi min en kvieto.

– Nu, bone, iom da ajloj – mi respondis. Li ekĝojis.

– Mork olportot por ve! – kaj denove li eksaltis. – Bonan nuktnun, jinstruisto Andreju, kaj me petat lo pardunun pro cijo, kijon me farit ple frue.

– Ne pardoninde, bonan nokton, Mark. Jam nenion mi memoras.

Kaj denove li malaperis en torenta pluvo.

Estis la dekunua nokte, kiam li venis. Nun mi jam rekonis lian frapadon.

„Dum la tuta nokto li ne lasos min en kvieto” – mi ekpensis.

– Kio okazas, Mark, kial vi venis? – mi kriis el la lito.

– Me venit, cor me olportit lo ajlun por ve – li vokis pli laŭte, kvazaŭ li volus certigi min, ke li ne venis, por ke mi tralegu al li tiun leteron.

– Ho, mi tre dankas vin, Mark – mi suspiris dormeme. – Estis por mi granda honoro, neniam mi forgesos tion.

Mi malfermis la pordon. Kotŝmirita de la piedoj ĝis la kapo, Mark ŝajnis feliĉa kiel neniam.

– Ĉu vi ne povis, Mark, alporti tion por mi alifoje, kaj vi iris du horojn nur pro la ajlo?

Sed li – kiel ĝentila lernanto – elpoŝigis du-tri ajlokapetojn kaj rigardante min ruze li demandis:

– Cu ve scijat, kijon me ankore kunprenit? – kaj li enŝovis la manon sub la veston ĉebruste.

– Hmm – mi ŝajnis, ke mi cerbumas – eble rakion.

– Ve divenit! – Mark saltetis. – Ve divenit!

Kaj fiere li elprenis el la poŝo la botelon de muŝveneno, plenan je rakio.

– Dankon, Mark, mi tre dankas vin, vere mi deziris trinki gluteton da rakio – kaj mi ekstaris por komprenigi lin, ke li devos jam iri.

– Nur provu, nur provu foje – petegis Mark. Kaj liaj okuloj ridis ĝoje. Mi klinis la botelon.

– Tre bona, Mark, bonega, mi trinkis neniam tian rakion.

Efektive, mi trinkis neniam tian aĉan rakion. Iu kvazaŭ maldensigis ĝin per akvo el la torento.

– Dankon, Mark, mi tre dankas – kaj mi leviĝis por akompani lin ĝis la pordo. Sed okazis tio, kion mi timis. Li turniĝis kaj dirante nenion li rigardis min petege. Mi sciis, kion li volas.

– Ne, Mark, eĉ ne estas parolinde – mi ne cedis. – Mi jam ne legos. Forgesu tion.

– Bone, bone – li tuj konsentis. – Me ĵo dirat nenijon, kaj se ve tralegut, mi jam ne plurut. Se ne, do ne, hmm, me ne venit ce tĵen, ke ve legu por me ce leteron, me nur venit, por olporti rakijun por ve. Cu ne? – li demandis prefere sin ol min.

– Ĝuste tion mi volis diri, Mark – kaj mi akompanis lin ĝis la pordo.

Ŝajne li jam perdis sian esperon, ke mi relegos la leteron, li premis al mi la manon kaj perdiĝis en la pluvo.

Denove aŭdiĝis plaŭdado de liaj piedoj. „En la vivo-flakoj” – mi ekpensis.

Neniam plu mi renkontis Markon. Nek mi vidis lin en nova vilaĝa domo. Hazarde mi aŭdis, kiel ridante kampuloj rakontis, ke ili vidis lin diversloke, kiam li petegis tralegi por li ian leteron.

Do, li ne sendis ĝin al la registaro.

Okazis tiel, ke post kelkaj jaroj mi venis denove al tiu montara vilaĝo. Oni diris al mi, ke Mark mortis sola en sia budo. Li estis trovita nur kelkajn tagojn poste.

– Akvo torentis sur lin – rakontis al mi la kampulo, kiu lin trovis. – Sed en la mano li tenis... – ... leteron – kaj mi skuiĝis.

– Ne, ne leteron – li respondis mirigite – ne leteron, ŝajne libron... jes, jes, la malnovan abocolibron. Oni enterigis lin je la kosto de nia kooperativo – li finis.

Hontigita per mokoĵ de la tuta vilaĝo, Mark decidis lerni skribadon kaj legadon, por mem relegi sian vivon tiel ofte, kiomfoje li nur dezirus.

Antaŭ la forveturo mi iris sur la vilaĝan tombejon. La tombo de Mark estis soleca, troviĝis malproksime de la aliaj.

Pluvis. De malnova ligustro akvo torentetis sur lian tombon. *



elalbanigis **Bardhyl Selimi** (Albanio)

Gan Bao

Dong Yong

Iam en la dinastio Han (202 a.K.–220) estis viro, kiu nomiĝis Dong Yong kaj loĝis en la gubernio Qiansheng. Kiam li estis infano, lia patrino mortis, kaj de tiam li vivis kun sia patro. Junaĝe, li diligente laboris surkampe, kaj krome, por ke la patro ne estu sola, puŝis ĉarumon sur kiu sidis lia patro. Nelonge poste lia patro ankaŭ mortis. Li ne havis monon por la enterigo de la patro, do li volis vendi sin mem al aliulo kiel sklavon por la pago de funebraĵoj. Sed la mastro konis lian filecon kaj donacis al li dek mil kuprerojn.

Post la trijara funebro Dong Yong iris al la mastro por esti lia sklavo. Survoje li renkontis knabinon, kiu diris al li: “Mi voluntas esti via edzino.” Tiel Dong Yong kaj la knabino kune iris al la mastro. Tiu diris al Dong Yong: “Por kio vi revenas? Mi ja donacis al vi la monon.” Dong Yong diris: “Dank’ al via favoro, mi plenumis mian funebbron pri mia patro. Mi estas mizerulo, tamen mi devas fari plejblon por vin servi, repagante al vi kion vi faris al mi.” La mastro demandis: “Kion tiu virino povas fari?” Dong Yong respondis: “Ŝi povas ŝpini kaj teksti.” La mastro diris: “Se tiel, do via edzino teksos por mi cent rulojn da fajna silko.” Tiel la edzino de Dong Yong teksis en la domo de la mastro kaj plenumis la taskon ene de dek tagoj. Ŝi eliris el la domo kaj diris al Dong Yong: “Mi estas teksistino sur la ĉielo. Pro via fileco la Ĉiela Imperiestro ordonis ke mi helpu vin repagi la ŝuldon.” Dirinte, ŝi suprenflugis oni ne sciis kien en la ĉielo.

**Gan Bao, historiisto de la Jin-dinastio (226-420).*

Fidela hundo de Yang Sheng

Yang Sheng vivis en la prefektujo Guangling dum la regado de la reĝo Taihe (366-371). Li tenis hundon kaj tre amis ĝin. Ili ambaŭ ĉiam kune agis. Iutage, ebriiĝinta, Sheng iris sur pado meze de marĉa herbejo, kaj surloke ekdormis senmove. Hazarde iu forbruligis herbojn por ricevi plugeblan teron, kiam, en vintra sezono, la vento blovis furioze. La hundo brulegis de urĝo ĉirkaŭe voki sian mastron, sed tiu senkonsciiĝis pro ebrio. Proksime estis akvokavo. La hundo kuris en ĝin kaj tuj revenis kun malsekega korpo. Ĝi forte svingis sin por ŝpruci la surkorpan akvon sur la mastron kaj la herbojn ĉirkaŭ li. Tiel ĝi faris plurfoje, ke la mastro kaj la ĉirkaŭaj herboj malsekiĝis. Kiam la fajro atingis la lokon, kie kuŝis la ebriiĝinto, ĝi estingiĝis. Poste, Sheng vekigiĝis, kaj ĉion komprenis.

Alifoje Sheng vojis nokte kaj neatente falis en puton forlasitan. La hundo bojadis ĝis tagiĝo. Estis pasanto, kiu miris pri tio ke la hundo bojas al la puto. Li iris enrigardi kaj vidis ke Sheng estas ene. Sheng diris: “Sinjoro, se vi savos min el la puto, vi estos bone rekompencita.” La homo diris: “Mi savos vin, se vi rekompencos min per la hundo.” Sheng klarigis: “La hundo iam savis min, mi ne povas doni ĝin al vi; donaci ĉion alian mi ne domaĝas.” La homo eĥis: “Se tiel, vi do restu tie.” La hundo etendis la kapon en la puton por fari signon al Sheng, kiu tuj komprenis ĝin kaj diris al la pasanto: “Bone, mi donacos al vi la hundon.” Sheng estis savita. La hundo ligite foriris kun la savinto. Sed kvin tagojn poste la besto revenis al Sheng ennokte.



elĉinigis **Minosun** (Ĉinio)



esperantigita de **Paula Adúríz** (Hispanio)

Chiung Yao (1938-)



aŭtorino, Chiung Yao

En profunda korto (10)

Post lavado al siaj vizaĝo kaj buŝo, starante antaŭ la spegulo, Fang zorgeme ekzamenis sin. Tranokta laceco lasis nemulte da spuroj sur ŝia vizaĝo, sed nur nekomprenemo kaj perplekseco en ŝiaj okulfundoj iom pli iĝis. Suspirinte, ŝi brosis siajn longajn harojn per harbroso, dum ŝi nevole rememoris, kion Tingting diris, “Se vi malligas viajn harojn, ne surhavas okulvitrojn kaj portas purpuran bluzon, vi certe aspektas tre bele.”

Nun ŝi jam malligis la harojn sen okulvitroj, ĉu ŝi vere aspektas bele? Ŝi zorgeme okulmezuris sin en la spegulo. Ne, ne, mi ne estas tiel bela kiel Ailin. Ŝi efektive estas belulino. Tamen... kial mi komparu min kun Ailin pri beleco? Ŝi rigardis en la spegulon. Vi estas freneza. Kion vi fantazias en via cerbo? Ĉi tiea medio ne konvenas al vi, ĉu vi ne vidas tion? Vi aspektas marasme kaj pale. Vi devus edziniĝi al Yali en Usono kaj naski aron da viglaj infanoj, sed ne devu resti ĉi tie en stuporo kun gapanta paro da grandaj okuloj! Vi frenezas! Vi vere havas malklaran kapon. Ekde tiu posttagmezo de majo, vi jam perdis vian animon, kiu jam estas forlogita de la ruino de Hanyan Bieno. De tiu posttagmezo vi faris nenion pravan. En Hanyan Bieno troviĝas perversa magio, kiu vere perdigis vian animon.

Ŝi murmure diris al si mem, dum la harbroso centfoje glatigis ŝiajn harojn. Ŝi ne aprobis, ke li, kontraŭ ŝia volo, petis unutage forpermeson por ŝi, sed ŝi gratulis sin pro la unutage senokupiteco. Ĵetinte la broson sur la tualettablon, ŝi lerte volvis siajn harojn en hartuberon malantaŭ la kapo per kelke da longaj harpingloj kaj eksurhavis okulvitrojn. Tiu aspekto estis pli bona, kiu donis al ŝi senton de sekureco. Iu frapetis je la pordo, kaj ŝi respondis per “eniru”. La pordo malfermiĝis. Kun granda bukedo da flavaj rozoj, Yazhu eniris kaj ridete rigardis al Fang. Ekmire tiu demandis, “Kion vi volas fari, Yazhu?”

“La sinjoro petis al mi aĉeti ĝin survoje al legombazaro. Li ordonis, ke mi metu ĝin en la ĉambro de fraŭlino Fang,” diris Yazhu, sur kies ronda vizaĝo troviĝis nenia kaŝemo. Alirinte al la bretaro, ŝi prenis la florzaron, verŝis akvon en ĝin kaj enŝovis rozojn unu post alia.



“Mi faru tion.” Fang prenis la rozojn, bonorde tondis la tigojn per tondilo kaj malrapide ŝovis ilin en la vazon. Antaŭe ŝi estis lertulo en aranĝado de floroj kaj pri tiu arto havis grandan interesigon. Tamen, hodiaŭ, ŝi sin montris distriĝema, iom malatenta kaj mirplena. Flavaj rozoj! Flavaj rozoj! La unuan tagon, kiam ŝi ekloĝis ĉi tien, troviĝis florzaro da flavaj rozoj en ŝia ĉambro. Nun flavaj rozoj denove! Kvankam li estas blinda, li tamen ne havas blindan menson. Kion li volas fari per tio? Yazhu ne tuj foriris. Starante flanke, ŝi ridete rigardis ŝin aranĝi la florojn. Al Fang ŝi ĉiam kovis adoremom. Laŭ ŝia opinio, ekde kiam Fang eniris Domon Bai, la familio ekhavis hejmecon etoson, viklecon kaj vivecon, tial ŝi multe ŝatis fraŭlinon Fang pli ol sian propran mastrinon. “Ĉu vi estis laca lastnokte, fraŭlino Fang?” ŝi serĉis vortojn por demandi.

“Ho,” Fang iom ruĝiĝis, “devas esti, ke iu flegas la pacienton, vi scias.”

“Jes,” Yazhu eĥis. “Estas vere bone, fraŭlino Fang, de post kiam vi venis ĉi tien. Ĉio ŝanĝiĝis.”

“Kiel vi diris tiel?” demandis Fang nekomprene.

“Ankaŭ Tingting dikiĝas, la sinjoro babilemas kaj ridetemas, kaj la sinjorino ne tiel kverelas nek insultas ĉiutage,” dirante, Yazhu sin direktis al la pordo. “Mi iru al la kuirejo. Maljuna You diris, ke hodiaŭ vespere gasto estas invitita al vespermanĝo.” “Gasto?” Fang ekmiris. “Sinjoro Bai estas malsana, kaj la sinjorino foriris al Taizhong. Kial oni invitas gaston?”

“Ankaŭ mi ne scias. La sinjoro volis, ke maljuna You venigu lin per telegramo. Hodiaŭ frumatene, maljuna You iris sendi telegramon.”

“Ho?” Fang sin montris dubema. Hodiaŭ frumatene okazis tiom da aferoj. Mi esperas, ke maljuna You ne vidis min kuŝanta sur la seĝo. Sendi telegramon? Kia gasto estas tiel grava? Ĉu li estas amiko de Bai en negocado? Post kiam Yazhu malsupreniris, ŝi jam bone aranĝis la florojn kaj lavis al si la manojn. Ĵetinte rigardon tra la fenestro, ŝi vidis la aŭtunan sunon lumi brile. Ŝi eliris el la ĉambro, volante iom promeni en la ĝardeno. Preterirante la ĉambropordon de Bai, ŝi ĵetis ekrigardon tra la malfermita pordo. Ŝajne li endormiĝis. La fenestrokurteno jam distiriĝis flanken kaj la bela sunlumo disverŝiĝis en la tuta ĉambro. Ŝi ŝtele eniris, volante kuntiri la kurtenon aŭ fermi la fenestron, ĉar la homo postfebra ne povis elteni alblovajn. Kiam ŝi iris ĉe la fenestron, li diris trankvile en la lito, “Fraŭlino Fang?”

Surprizite, ŝi turnis sian kapon kaj diris retiriĝeme, “Mi pensis... pensis, ke vi dormas.”

“Mi jam dormis sufiĉe dum nokto,” li diris, “Ĉu vi volontus sidi ĉe la litrandon dum momento?” Fang aspektis heziteme. “Timi min? Jes?” li mallaŭte diris, “Mi ne timas, fraŭlino Fang, kial vi ofte evitas min?”

“Mi ne,” diris Fang malforte.

“Do, fermu la pordon kaj sidiĝu ĉi tien. Se vi volontus doni al mi helpon, mi dankegos vin.” Fang ne moviĝis. “Kiel, fraŭlino Fang?” Post paŭzeto, li daŭrigis, “Mi scias, ke vi certe abomenas ĝenantan blindulon, ĉu ne?”

“Ho, ne,” respondis Fang. Irinte al la pordo, ŝi fermis ĝin kaj returnis al la litrando. “Bone, sinjoro.”

“Ĉu vi volontus legi ion al mi?”

“Legi ion?” Fang perpleksiĝis.

“Jes. Post kiam miaj okuloj perturbiĝis, mi ne povas legi librojn. Mi pensas, ke mia animo jam sekigiĝis. Se vi volontus legi ion al mi, tio signifas, ke vi faras bonan aferon.”

“Kion vi esperas, ke mi legu por vi?”

Fosinte sub la kapkuseno, li elprenis faskon da ŝlosiloj kaj donis ĝin al ŝi. Je ŝia konsterniĝo, li diris kviete, “Per la plej malgranda ŝlosilo el ili, malfermu la tirkeston ĉe la malsupra parto de la littableto. En ĝi troviĝas ligna skatolo. Bonvole alportu ĝin al mi.”

Ŝi perplekse rigardis lin. Kion li volas fari? Vere ŝi estis konfuzita. Ŝi esperis, ke lia menso ne vage flugu. Per la ŝlosilo, ŝi malfermis la tirkeston, en kiu kuŝis ruĝligna skatolo fajne ĉizita. Kun ĝi en la mano, ŝi ekmiris, ĉar sur la tuta surfaco de la skatolo plenis ĉizitaj rozoj, kiuj ĉiuj estis vivece skulptitaj. Metinte la skatolon sur la liton, ŝi diris, “Nu? Sinjoro Bai!”

“Ĝin malfermu!” Li spiris iom urĝeme.

Kun ioma retririĝemo, ŝi ĵetis ekrigardon al li kaj restis longe senmova. Povante ne plu atendi, li urĝis, “Malfermu ĝin!”

Kiam ŝi apertis la skatolon, ŝiaj okuloj trafis blindigan brilon. La skatolo estis apartigita en du fakoj, en unu el kiuj troviĝis senescepte virinaj ornamaĵoj kiaj broĉoj, braceletoj, kolieroj kaj fingroringoj... ĉiuspecaj kun alta valoro kaj supera kvalito, kaj en la alia el kiuj kuŝis kajero kun kovrilo el ruĝa veluro, volvita per rubando el nigra sateno.

Li mallaŭte diris, “Elprenu la kajeron kaj fermu la skatolon... Ho, fraŭlino Fang, ĉu vi jam aŭdis, kion mi diris? Kial vi ne moviĝu?”

“Ho, mi... jes.” Ŝi elprenis la kajeron kaj tuj fermis la skatolon.

“Remetu la skatolon en la tirkeston. Ĝi estas la unusola aĵo, kiu elsaviĝis el tiu brulego. Ĉu vi jam faris tion, fraŭlino Fang?”

“Je...es.”

“Nu, vi sidiĝu.”

Ŝi sidiĝis.

“Malfermu la kajeron. Ek, legu por mi.”

Ŝi ĵetis profundan rigardon al li, kaj malrapide malfermis la kajeron je la unua paĝo. Ŝi eksentis kunpremiĝon de la koro kaj steletoj saltadis antaŭ ŝiaj okuloj. Lastnokta malmulta dormado kaŭzis tian distriĝemon kaj vertiĝon. Ŝi faris profundan enspiron, koncentris sian atenton kaj rigardis la skribaĵojn sur la unua paĝo: Forlasitaj manuskriptoj de amata edzino Zhang Hanyan.

“Kio okazas al vi, fraŭlino Fang?”

“Ho, mi iom lacas. Mi ne bone dormis lastnokte, mi pensas,” ŝi nevole diris, volante eviti la nunan taskon.

“Tamen, ĉu vi volontus legi kelkajn alineojn por mi?” li insistis.

Senhelpe ŝi eligis suspiron. “Bone, se vi insistas pri tio.”

Mallevinte la kapon, ŝi turnis la unuan paĝon kaj komencis legi la tekston. La paĝoj de teksto, kiu konsistis el delikataj kaj malgrandaj vortoj nete skribitaj sur la kremkolora leterpapiro kun fona desegno de rozfloroj, estis zorgeme kaj delikate binditaj. Komence troviĝis tre kortuŝa poemeto kaj ŝi softvoĉe legis:

“Tiutage renkontiĝe inter floroj,

Mi ĉuis vin, kia vol’ en via kor’?”

Vi mallaŭte flustris ĉe orelo mia,

‘Mi vin volas! Mi vin volas kun fervor!’

Ankaŭ mi sekrete al vi softe kveris,

‘Mi vin amas! Mi vin amas per favor!’

Tamen kiu tago estas jen ĉi tago?

Kial kun mi ne parolas vi, sinjor'?
Mi vere ne scias pri deziro via,
Nek vi pri sekreto mia en memor'.
Nur kukol' lamente krias en arbaro,
'Ve, pli bone vi disiĝu, disen for!''

Malpeze levinte sian kapon, ŝi ĵetis ekrigardon al li. Li kuŝis surdorse tie kun interplektitaj manoj sub sia kapo. Li gapis per paro da siaj nevidpovaj pupiloj larĝe malfermitaj, kaj prezentis sian vizaĝesprimon seriozan, profundan kaj absorbitan. La doloro en la fundo de ŝia koro pliiĝis kaj pliiĝis... ĝis ĝi fariĝis forta premo subpremanta ŝiajn nervojn. La tasko de legado estis al ŝi kruela kaj suferiga. Du gutoj da larmoj rulfalis de sur ŝiaj vangoj, kaj ŝi kaŝe forviŝis ilin. Dum ŝi legis plu, ŝi eligis tremantan voĉon:

“Mi ankoraŭ rememoras pri tiu tago kaj tiu varmega posttagmezo. Starante sur la placo kie oni sunumis tefoliojn, kun kapo, manoj kaj piedoj volvitaj per indiga tolo, mi vidis la tefoliojn flosadi antaŭ miaj okuloj. Tiam kion mi pripensis? En mia cerbo ekzistis nek sonĝo nek poemo nek prirevita princo. Mi sentis malplenon kaj solecon. Mi similis al sun-sekigita tefolio, jam perdinte jun-verdan koloron. Tamen, ĝuste en tiu posttagmezo, ardigita de la suno, mia vivo tute ŝanĝiĝis...”

Ŝi subite sentis, ke ŝi ne povis daŭrigi legadon, almenaŭ ne volontis legi plu. Ŝi ĉesiĝis kaj, levinte sian kapon, stupore rigardis lin. Tiu ekmoviĝis kaj turnis sian vizaĝon al ŝi.

“Kio okazas?” li demandis.

Abrupte ŝi stariĝis. Ĵetinte la kajeron sur la liton, ŝi ekscitite diris per tremanta voĉo, “Pardonon, sinjoro Bai, mi ne povas plu legi por vi. Mi estas tre laca kaj volas ripozi momenton.” Ĉe tio, malgraŭ liaj reago kaj opinio, ŝi direktis sin al la pordo kaj, malferminte la pordon, rapide eliris. Apogante sin kontraŭ la pordo fermita, ŝi staris longan tempon kun fermitaj okuloj. Ŝia koro ŝajnis bolanta akvo senĉese ruliĝanta. Post longa tempo, ŝi malfermis la okulojn kaj surprizite vidis maljunan You stari senparole antaŭ ŝi kaj fikse rigardi ŝin.

“Oho!” ŝi panike ekkriis. “Kion vi faras ĉi tie, maljuna You? Vi timigas min.”

Maljuna You iom klinis sian korpon, esprimante neordinaran estimon.

“Pardonon,” li diris, kun paperpeco en la mano, “Jen estas telegramo. Mi volas doni ĝin al la sinjoro.”

“Ho,” ŝi haste iris flanken, dirante, “Ĉu vi legos ĝin al li?”

“Jes,” li diris, senteme rigardante ŝin. “Aŭ fraŭlino Fang eniru kaj legu ĝin al li.”

“Ho, ne.” Ŝi celis al la ŝtuparo. “Vi eniru,” dirante, ŝi rapide malsupreniris. Ŝi ne ŝatis la rigardon de maljuna You, la rigardon, kiu igis ŝin tre sinĝena. Li estis tre akra-senta persono. Kiel li opinias pri ŝi?

Posttagmeze, ŝi decidis iri al la lernejo. Ŝi trovis, ke sen ĉeesto de Tingting, Domo Bai plenigas ŝin per senforma premforto kaj streĉas ŝian ĉiun nervon, kiel streĉitan kordon, kiu rompiĝemas se plia forto aldoniĝas. En la lernejo, post kiam ŝi instruis nur du klashorojn, alvenis la telefonvoko el Domo Bai. Ŝi levis la aŭdilon, kaj la parolanto ĉe alia fino estis eĉ Bai Peiwen. “Ĉu estas fraŭlino Fang?” demandis li, iom urĝeme.

“Jes.”

“Ho,” li eligis faciligitan spiron. “Mi pensas, ke vi...”

“Kiel?”

“Ho, lasu do.” En lia voĉo ree pleniĝis vicleco. Kio do vekis tiel grandan eksciton en lia voĉo? “Nur pli frue vi revenu, ĉu bone?”

“Mi reiros kun Tingting. Ĉu vi... havas aferon?”

“Ho, ne. Neniom.”

Demetinte la aŭdilon, ŝi eksentis konfuzitecon, ĥaason kaj maltrankvilecon en la koro. Kion Bai artifikas? El lia parolo, ŝajne li maltrankvilas pri ŝia foriro el la hejmo aŭ ŝia forlaso sen adiaŭo. Tamen, eĉ se ŝi forlasus sen adiaŭo, ĉu tio estas grava afero por li? Sidante malantaŭ la skribtablo, ŝi gapis al la ekzercaj kajoroj kaj ne povis daŭrigi korektadon. Tiuj vortoj antaŭ ŝiaj okuloj flosis... naĝis... flosis... naĝis, kaj fine fariĝis tiu poemeto:

*“Tiutage renkontiĝe inter floroj,
Mi ĉuis vin, kia vol’ en via kor’?
Vi mallaŭte flustris ĉe orelo mia,
‘Mi vin volas! Mi vin volas kun fervor!’
...”*

Kiel alkröiĝema kaj bela sentimento! Tamen ankaŭ venos la tago de “Ve, pli bone vi disiĝu, disen for!” Ah, kion oni povas kredi dum la vivo? Kaj kion oni povas prilauĝi? Kun tiaj korinklinemo kaj sopiremo, Bai ne estas senama homo! Se Zhang Hanyan sciiĝus pri tio subtere, ĉu ŝi volontus daŭrigi la amrilaton kun li? Pensante, ŝi prenis plumon, kaj instigate de subita kaprico, imitis la tonon de Zhang Hanyan kaj aldonis strofon al tiu poemeto:

*“Multaj pasintaĵoj jame forgesitas,
Kaj forpasis kun vent’ dankemo kaj rankor’.
En du mondoj nin kunigas korinklino,
Pro disiĝ’ dekjara kreskas kor-dolor’.
Ĉu la renkontiĝo eblus sur ĉielo?
Mallaŭtvoĉe kuku-kriis la kukol’,
‘Tuj revenu, tuj revenu, tuj de for!’”*

Finskribinte, ŝi eksentis zumadon en siaj oreloj kaj rapidan frapadon de la koro,

kaj ŝia vizaĝo terure febre brulis. Stariĝinte, ŝi verŝis glason da akvo kaj trinkis malrapide, sed ŝia korbatado ankoraŭ ne povis trankviligi. Metinte la poemeton inter la paĝoj de la libro, ŝi lante paŝis antaŭ la fenestron kaj ĵetis sian rigardon al malproksimo. Sur la deklivo ekster la lerneja tereno kuŝis pecoj kaj pecoj da junverdaj te-plantejoj, ŝajne en la sezono de kolektado de tefolioj. Post lernohoroj, prenante Tingting-on je la mano, ŝi reiris al Domo Bai, tre silentema sur la tuta vojo. Kun speciala kaj maltrankvila sento, ŝi eĉ timis vidi la du ruĝajn pordklapojn de Domo Bai. Ŝi ne sciis, kial ŝi spiras tiom urĝeme kaj kial ŝia koro batas tiom rapide. Ĉu io okazos? Ŝi kunpremis siajn lipojn, kaj eĉ ŝvitis ŝia mano, kiu prenis Tingting-on.

Enirinte Domon Bai, ŝi vidis maljunan You lavi la polv-kovritan Chevrolet-aŭton en la korto. Kiam li ekvidis ilin, rideto ekaĝis ĉe liaj lip-anguloj kaj liaj akraj okuloj brilis ameme. “Tingting, rapide supreniru. Via onklo Gao jam alvenis. Li estas en la ĉambro de via paĉjo!” li diris.

“Onklo Gao?” jubilis Tingting. Forlasinte la manon de Fang, ŝi sturmis en la salonon, kriante, “Onklo Gao! Onklo Gao! Onklo Gao!”

Fang eksentis froston ĉe la fundo de la koro. Onklo Gao? La ĉielo! Kio li estas? Dio scias! Li ne estu.... Ŝi ŝtoniĝis konfuzita kun membroj moliĝantaj kiel kotono. Ŝi trovis, ke ŝi ne povas movi sian menson, eĉ tute ne kapablas pensi! La dentradoj en ŝia cerbo jam stopiĝis. Mekanike enirinte la salonon, ŝi stupore staris. Aŭdiĝis bruaj ridoj kaj paroloj el supra etaĝo. Kun la rido kaj akutvoĉa kriado de Tingting miksiĝis vira, serena kaj fervora voĉo, “Tingting, vi etulino! Vi aspektas pli kaj pli bele! Pli kaj pli aminde! Venu! Vi nepre konduku min intervidiĝi kun via instruistino Fang! Ĉu ŝi estas malsupre de la etaĝo?”

Fang surpriziĝis. La unua ideo fulmis tra ŝia menso: mi foriru, tuj foriru! Tamen ŝi jam ne havis tempon por foriri. Apenaŭ ŝi sin turnis, kiam aŭdiĝis paŝbruo malsupreniranta la ŝtuparon, kune kun ĝoja kriado de Tingting, “Instristino Fang, jen estas mia onklo Gao!”

Jes, ŝi ne povas forkuri kaj ŝi devas fronti la realon. Malrapide turninte sian kapon, ŝi rigide rigardis vid-al-vide al la viro, kiu havis altan staturon, brunan haŭton kaj paron da brilaj kaj esprimplenaj okuloj. Alirinte, ŝi malrapide etendis sian manon. “Saluton, sinjoro Gao,” ŝi diris sensente, “Agrable konatiĝi kun vi.”

“Ho,” la viro ekrigidiĝis, rekte rigardante al ŝi, eĉ ignorante ŝian etenditan manon. Iliaj okuloj renkontiĝis kaj neniu el ili ekparolis longan tempon. Fine, kvazaŭ vekigiĝinte el la dormo, li trudis rideton al la vizaĝo. Li ekprenis ŝian manon kaj skue prenis ĝin, ĝoje dirante, “Ankaŭ mi ĝojas konatiĝi kun vi, fraŭlino Fang.” Ĉe tio, li turnis sian kapon al Tingting, kiu staris apude, “Ĉu vi devu supreniri por akompani vian paĉjon, Tingting? Li ankoraŭ ne povas ellitiĝi pro malsano. Krome, mi metis

donacon ĉe vian paĉjon por vi kaj petu ĝin de li.”

“Bone!” jubile kriis Tingting kaj unuspire impetis al la supra etaĝo.

Sinjoro Gao aliris pli proksimen al Fang, kaŝinte la rideton sur la vizaĝo. Liaj okuloj senpalpebrume restis sur la vizaĝo de Fang. Kun akra, penetrema kaj kritikema rigardo, li malrapide skuis sian kapon. “Mi neniel kredas tion,” li diris.

“Li sendis telegramon por venigi vin, ĉu ne?” ŝi flegme demandis. “Mi devus diveni, ke li venigos vin. Li ne estas tiel ventkapa kiel mi imagas.”

“Li bezonas paron da okuloj.”

“Do pro tio li venigas vin! Fakte li nun ne bezonas okulojn, kaj nur bezonas la antaŭ-dek-unu-jarajn okulojn.”

Li gapis al ŝi mirplene kaj poste, okule mezuris ŝin de la kapo ĝis la piedoj, kvazaŭ penetrante per sia rigardon en ŝiajn ostojn. Post tio, li faris profundan enspiron, “Vi ŝanĝiĝis! Vi vere ŝanĝiĝis!”

“Kiel la spirito el la alia mondo, ĉu mi povus ne ŝanĝiĝi?” ŝi replikis ankoraŭ flegma.

Li daŭre okule mezuris ŝin. “Tamen tio ne taŭgas al vi.”

“Kio?”

“Per la okulvitroj, la hartubero, la vestaĵo... vi ne povas kamufligi vin. Kiel ajn vi ŝanĝas vian aspekton, tiuj, kiuj renkontas vin, tuj rekonas vin. Demetu viajn okulvitrojn, Hanyan!” Hanyan? Hanyan? Hanyan? Se tiu nomo estas ĝuste vokata, ĉiuj kamuflaĵoj elvaporiĝas. Hanyan—la nomo jam dronas en forgeso dek jarojn, la nomo estas enterigita dek jarojn, la nomo formortis antaŭ dek jaroj! Sed nun, ĉu ŝi jam reviviĝas? Reviviĝi? Reviviĝi? Ŝi aŭdis sonojn el sur la ŝtuparo, kaj levinte sian kapon, ŝi vidis, ke Tingting, prenante Bai-on je la mano, malrapide malsupreniras laŭ la ŝtuparo. Lia vizaĝo estis pala kaj marasma, sed lia mieno streĉita kaj ĝojplena. Kaptante la balustradon de la ŝtuparo, li demandis kun tremanta voĉo, “Ĉu vi jam rekonas ŝin, Lide? Ĉu tio estas ŝi?”

Ho, ne, ne, Gao Lide, vi ne povas eldiri la veron! Se vi eldirus, ĉio estus finita! Ho, ne, ne, Gao Lide, vi ne povas eldiri! Zhang Hanyan jam mortis! Ŝi mortis jam antaŭ dek jaroj! Levinte siajn okulojn, ŝi peteme rigardis Gao-on, kaj deturnis sian plendeman rigardon al Bai. El la seka gorĝo eliĝis ŝia trista voĉo, “Ne! Bai Peiwen! Tio ne estas ŝi! Jam antaŭ dek jaroj, Zhang Hanyan estis mortigita de vi!” Ĉe tio, ekmallumiĝis antaŭ ŝiaj okuloj. Ne povante firme stari sur la ondanta tero, ŝi falis kun vizaĝo al la tero kaj perdis sian konscion. (*daŭrigota*)

elĉinigis Vejdo (Ĉinio)

Mikaelo Bronŝtejn (Rusio)



poeto, Mikaelo Bronŝtejn

La lasta tago de aŭgusto

De la finsomera beno,
La kaŭzo por meditado
Pri l' sorto kaj senreveno
De mia somer', pasinta
En varma amika rondo,

Kaj krono kun gust' absinta
Anstataŭ multflora kron' do
La kapon ornamas, kvazaŭ
Entute finiĝas ĉio...
Ĉu estas malbonokazo
Por droni en nostalgio?
Ho ne, ĉar konsolas min tre
La mildo de lastaj floroj.
Mu scias: varmigis vintre
Min pri l' somer' rememoroj.

Alfluis la tria ondo
de miaj ĝardenaj floroj,
por la finsomera mio
pokalo da lasta ĝu'.
En la multkolora mondo
spegulas la rememoroj
pri la okazinta ĉio,
sed viv' mia fluas plu.

En pompo de l'hortenzio,
en simpla de l'kalendulo
en noblo de la dalio
sentebblas jam la aŭtun'.
Flugemas pli l'fantazi' ol
gruaro en for' nebula,

kaj floroj ekscitas pli ol
la homaj eventoj nun.

La viv' ne aspektas triste,
la tagoj paradas feste,
la riĉa rikolt' bonguste
bobelos en juna vin'.
Jes, bonas ekzisti disde
fiagoj, sed alta prez' de
l'indiferenteco juste
turmentas ja ankaŭ min.

Boleto, la eta mistero,
kaŝanta sin en konifero,
post mia ĉasado dumhora
ja estas trovaĵo valora.

Por la modestulo brunkapa
ne licas aper' okulfrapa,
ĉu tial do la vortareto
ĝin nomas "la nobla boleto"?

Kaj ĉu ne samtiel ni trovas
talenton, se foje formovas
kurtenon de mildo honesta
kun miro, en homo modesta?

En mia mistero arbara
jen fungoj, laŭdire, mangĉeblaj,
sed por kuirad' ordinara
sen dub' ili estas marĝenaj.

Mi ilin observas admire,
fascinan belecon revidas,
sed en la stomakon, verdire,
mi ilin enmeti evitas...

Samtiel ja kelkaj konatoj
meritas admiron kaj ravon
pro l' ĉarmo de la paroladoj,
havantaj neniun enhavon.

Toleras mi tiun medion
kun pompaj paroloj publikaj,
sed, eĉ admirante ĉi tion,
mi ilin ne nomas amikoj.✘

Rita Mkrtĉjan (Armenio)



poetino, Rita Mkrtĉjan

Ni estis tre proksime

Ni estis tre proksime – en la reto,
 La konatulo, nomo, nur vizaĝ',
 Pri amikec' – propono, peto,
 Komentoj kurtaj kun humur' kaj saĝ'.

Lakona parolad', ne babilado,
 La vortoj – el profunda sin',
 Honestaj, laŭdaj, dankemaj
 Pri kara al la koro poezi'.

Ĝis nun la vortoj sonas en oreloj,
 De nomo, de vizaĝo, siluet',
 Nur kurtaj frazoj, varmaj kaj sinceraj
 Kaj en dezerto eĉ aperos la poet'.

Mi tre ŝatas aŭtunon

Somero "pakas la valizojn",
 Senforta varmo de aŭgusta suno,
 Somero estas nia "eta vivo",
 Sed mi atendas aŭtunon!

Ĉielo blua, ter' floranta,
 La mar' karesa, la ripoz', sunbruno,
 Feliĉaj kaj liberaj tagoj,
 Sed mi atendas aŭtunon!

Esperoj dum la tuta jaro,
Someraĵoj, dancoj kune,
Pardonu min, somero gaja,
Sed mi pli ŝatas aŭtunon!

La vento, tondro, uraganoj,
Diluvo - kiel Dia puno,
Sopiro, senreviĝo, larmoj,
Sed mi tre ŝatas aŭtunon!



Tiberio Madonna (Italio)



poeto, Tiberio Madonna

Promeno tra la jaro

Mi estis kredinta
ke mi povos konservi
en miaj poŝoj
la blankan neĝon de januaro
ĝis la somero
por fari bukedon
de la blankaj neĝeroj

kaj montri
donaci tiujn al junio
kiu neniam vidis ilin.
Sed jam en februaro
dum mi
preskaŭ frostiĝinta
marŝadis admirante
la neĝon en miaj manoj,
abrupta tusofrapo
dispelis surteren la floketojn
kiuj ruliĝis
sur la pavimo
de mia animo
ĝis la freneza suno
de marto
kompletigis la laboron
ilin dissolvante
kaj ilin igante
akvo.
La larmoj
kiujn mi pluvigis
pro la perdo
de mia blanka trezoro
konfuziĝis
kun la pluvo de aprilo

kun la grizo de l' nuboj
kiu trakovris mian ĉielon.
Sed mia amiko
majo
sukcesis
forgesi al mi
la perditan blankon
per siaj koloroj
la koloroj de siaj floroj
la floroj de siaj ĝardenoj.
Kaj tiuj koloroj briladis
helaj, intensaj
per la lumo de la suno
kiun mi kredis povi preni.
Kaj mi proksimiĝis
al la suno
kaj la suno proksimiĝis
al mi
pli kaj pli multe
dum alvenis la somero
ĝis en julio
kiam mi
etendis la brakojn
por preni ĝin
miajn fingrojn ĝi ekbruligis
kaj mi devis
retropaŝi
kaj mi devis
kontentiĝi.
Sur la plaĝo
de aŭgusto
mi senzorge ludadis
kun sablero
sub la ĉielo
sub la suno
plu ridanta,
sed subirante
en septembro

ĝi salutis min
kaj estingiĝis.
Kaj mi vagis
en l' obskuro
kaj mi serĉis
novan lumon.
En oktobro
en la bosko
obskura
plu mi marŝis
ĝis mi trovis
novan lumon
novan fajron
per kiu ŝajnis
ke ĉio brulas
ĉio en la bosko
fajras.
Ŝajnis.
Sed tiu flama ruĝo
nur estis
frida fajro
falsa brulo:
la ruĝaj folioj
mortantaj
falas sekaj
sur la veprojn
sur l' aleojn
sur min.
En novembro
mi fridiĝis
pli kaj pli
kaj pensadis,
meditadis
kiel mi povis
perdi tiom da plezuroj
en l' obskuroj
de la boskoj,
kiuj eĉ ne montris plu

la ruĝon de l' folioj
 jam bruniĝintaj.
 Mi pensadis,
 meditadis
 ĝis fine
 en decembro,
 surprizite
 reĝojante
 kiel infano,
 la tiama infano,
 mi retrovis
 ho!
 malnovan ĝojon!
 mi retrovis
 la blankecon
 de la neĝo!



Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



poetino, Maria Nazaré Laroca

Olea lampo

"Tiel same via lumo lumu." (Mateo: 5:16)

Mi ne estas: nur provizoras.
 Ĉi tie kaj nun mi ekzistas:
 punkteto de lum' malfortika,
 kiu por eterne vivadas.

Plugante revajn eraojn,
 per plugil' el dolor', mi
 ne lernis de am' ankoraŭ
 mian lumon ekflamigi.

Mi ŝatus esti vidinta patrinvizaĝan rideton

"Ne faru versojn pri eventoj" –
 instruas poet' Drummond.
 Sed al li mi malobeas
 pro senvalora naiveco!

En la mondon mi venis maje,
 en la pasinta jarcento;
 feste en ĝoja mateno
 ĉar estis dum feritago.

"Afinecoj, naskiĝtagoj, personaj okazajoj ne valoras."

- plendas poeto Drummond...

Sed mi obstine daŭrigas,
omaĝe al patrintago:
junulino, laboristo,
kun verdaj okuloj tristaj,
pere de Dia favoro,
malgrandan knabinon naskis,
kaj ŝi ne kreskis ĝis nun.

Simpleco

La poeto paŝtas sungutojn
en ĉi vintra mateno,
kaj pelas ribelemajn ideojn
sentojn serĉantajn.

Tiam lin surprizas Dio
per la nobleco de etetaj
floretoj blankaj,
kiuj ornamas la polvon
indiferentan de l' forlasita trotuaro.

Interludo

Blov' el silent',
nummuziko;
anim' ĝojplena
kvietiĝas.

Hastema

Ja, mi hastas pli ol tempo.
Kia stultaj'! - oni diros.
Sed mi volas esti river',
kiu kuraĝe pluiras,

feliĉa, ĉirkaŭfluante
trompajn ŝtonojn de la vojo.

Kaj dum la vana kurado,
la horloĝo min transpasas...
Tiam ostaĝ' de laceco
por irigi min, freneza,
mi provas verki poemon,
sed ankoraŭ mi fiaskas.

Loĝejo

Mi loĝas en eta korpo,
kiu havas taŭĝan pezon,
kaj konvenan mezuron
por enŝipiĝi en tempo,
kaj skulpti mian spacon
en ĉi tiu mondo.

Maŝin', pri kiu mi zorgas
cele al ties ĝusta rolo;
lamp', kiun mi lumigas ĝue
por naski la fortunon.

Mi havas etan korpon
el akv' kaj sal', el sang' kaj sun';
liturgia vest', frukt' tera,
kiu senŝeliĝos iam
por la teruteron sterki,
kaj liberigi min al Vivo.

Bedo de Ĉinesko

Vejdo (Ĉinio)



Edzo fariĝis kapro

(fablo)

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

La edzin'

vera megero

ŝian edzon vergbatis

kaj sakris kun fiero

de malsincero.

Kiam li

enhejme restis,

ŝi ligis lin je pied'

ŝnure, kaj lin molestis

ordone gestis.

Je ŝia

ŝnura ektiro

li devis obei ŝin

jen per tuja aliro

agis laŭ l' diro.

Ne povis

li elteni ŝin.

Al li venis ideo,
sin turnis al sorĉistin'
ja por ilumin'.

La edzo
laŭ ŝia instru'
ŝnuris kapron je l' kolo
kaj li sin kaŝis sen bru'
dum ŝi dormis plu.

Post vekig'
l' edzino time
trovis kapron ligitan
per ŝnur' nemalproksime
sin movi mime.

Panike
por bona rimed'
konsultis sorĉistinon
ŝi jen ĉe ties pied',
kun kompleta kred'.

Tiu nun
diris admone:
"Pro viaj malbonfaroj
Di' punas vin ordone,
igas bastone

la edzon
kapro timida.
Se vi pente riparos
vin per ago rapida
hej, kaj decida,

mi helpos
vere savi lin
tuj el la kapra formo—
la malfeliĉa destin',
mi ne ĝenos vin."

L'edzino
ploris amare,

tenante l' kapron êe sin',
ĵurante lin bonfare
trakti pli kare.

Sep tagojn
daŭris la rito
de fastad' kaj oferad'
revoki per invito
lin sen hezito.

De tiam
l'edzino ne plu
malbone traktis l'edzon
kaj vivis kun li kun ĝu'
kaj bona kunglu'.

Lily (Ĉinio)

Doloro pro Seksatenciteco

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

ennokte
je juna aĝo
revene el lernejo
kun naiva kuraĝo
al la vilaĝo

malkaŝe
fortika viro
baris al mi la vojon
preta per mana tiro
por vesta ŝiro

panike
en granda ŝoko
senforte en lia sin'
mi kolapsis sen voko
kiel neĝfloko

malklare
en mia kapo

alnaĝas panjaj vortoj
“por sukcesa eskapo
per piedfrapo!”

mi vigle
baraktis pene
el firma brakumado
piedfrapis fortplene
ho ve, azene!

senforte
mi cedis vole
al volupta kisado
mi sentis min korp-mole
senhelpe sole

dumvive
unuafoje
mi sub vira perforto
kuŝis tere ĉevoje
kiel malĝoje!

krima man’
senvestigis min
tutnuda sen ajn ĉifon’
mi falis kvaz’ en ravin’
cede al destin’

diboĉe
li ludis fuŝe
mian korpon laŭvole
kisadis min pluvduŝe
forte perbuŝe

damninde
li suĉis mamon
mian tire kaj puŝe
mi sentis kaj balzamon
kaj brulan flamon

kia pik’
korpon trakuris

mi kuŝis obeeme
ĉu ĝi min aŭ torturis
aŭ min plezuris

alsuben
li palpis glite
al mia hara kavo
fulmo venis subite
fremde vizite

korpkline
per sia lango
li lekis mian truon
ambaŭ sur trema tango
de sent-lavango

konscie
mi sentis vere
malsekiĝi subaĵon
tikl' estiĝis pretere
kaj netolere

ankaŭ li
ne eltenis plu
sin rektigis abrupte
el de voluptema sku'
por sekvanta ĝu'

rapide
li jam deŝiris
siajn vestojn entute
neiun vorton diris
anhele spiris

kiel ja
figuro bela
li aspektas sangvine
kun konturo fabela
sed vol' kruela

rigidis
jam lia kolbas'

fortika, longa, fera
jen preta por predo-ĉas'
sen ajn embaras'

min kovris
li korpe glue
kaj murmuris karese
ĉeorele unue
kaj frotis due

jen glate
kac' jam sukcese
en min glitis senbare
profundiĝis senĉese
kaj neregrese

atako
de pika dolor'
trakuris tutan korpon
tamen la mava sinjor'
daŭris en labor'

laŭtvoĉe
mi kriis spite
kaj fortege baraktis
sub lia prem' ĝisŝvite
brule irite

tuj poste
ekstazo rava
min konkeris sensone
ĉesis la movo sava
por cedo sklava

li boris
ĉiam rapide
kun aŭdebla ronrono
kaj puŝ-tire senbride
vere perfide

kiel agl'
li laŭte kriĉis

kun kap' falanta sur mi
jam forton li dediĉis
klare feliĉis

mi sentis
varmegan fluon
erupciigi enen
alporti ravan ĝuon
en mian truon

ni ambaŭ
kuŝis langvore
senparole enpense
ĉu indas ti' favore
aŭ malhonore

stariĝis
li kun kontento
sin vestis kaj sin zonis
post lascivaj atento
kaj diligento

ignore
li tuj foriris
kvazaŭe en koŝmaro
mi mizere deliris
peze suspiris

herbŝosoj
karexis mian
vizaĝon kosoleme
ĉielo! ĉu en plorban'
aŭ por viv-elan'

**Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksfirma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).*

Yi Qiao (ĉino en Germanio)



poeto, Yi Qiao

Somnambulado en la koŝmaro

La militoj daŭras sufokante,
pleboj tumultegon tro suferas.
Siegite ni rifuĝas vante,
pro infesta plag' ni jam mizeras.

Sur ŝirmejon falas frida neĝo,
vestoj kaj manĝaĵoj al ni mankas.
Petas ĉiopovon ni per preĝo,
pro minuta paco ni jam dankas.

Somnambule ni jen dolorplenas,
fronte al l' obskuro de morozo.
Katastrofo ege nin ĉagrenas,
ĉu haveblas el Ĉiel' almozo?

Kugla pluv' kirlantas kun hororo,
en konfuzo svarmas mort-angoro.

Revsopiro al mondpac

Vid-al-vide ame ni rigardas,
kaj forviŝas larmojn reciproke.
Niaj koroj kun elano ardas,
amikiĝas verve ni surloke.

Tra ĉielo flagras helstelaro,
kun eterna graco plenbonvola.

Muĝas jen profunda vasta maro,
plene de impeto korkonsola.

Ni turmentojn ĉiajn ĵus suferas,
kunhavante samideon fide.
Por finvenko ni jen sinoferas,
ĝue l' saman amon kundecide.

Al tutmonda paco mi sopiras,
kaj sincere al vi bondeziras.

Printempaj voĉoj

— dediĉate al Patricia Janečková*
Flustras tra kamparo milde l' vento,
kaj printempaj voĉoj dolĉe sonas.
La ĉielo splendas kun prudento,
am' vekigĝas kaj esper' burĝonas.

Nova vivo al sunlum' aspiras,
freŝas printemp-spir' kun bonodoro.
Restu ĉe ni, kara, mi aspiras,
verv' printempa as en ĉiu koro.

Kun glorldumo via koro rebatas,
vi aperas en la sonĝo bela.
Reviviĝu, sekve ĉio glatas,
kantu do en ĉiu tago hela!

Primaver' eterna vin jen gvidas,
kred' junece ĉiam pur-rigidas.

* *Mi dediĉas tiun ĉi soneton al Patricia Janečková (ĉeĥdevena slovaka sopranistino, 1998-2023), kiu gardas sian gloran junecon eterne ĉe Dio.*

Pensoj en mezaŭtuno

Hela l' luno pendas en ĉielo,
lum' arĝenta flosas ĉi-vespere.
Sidas mi en korto en lunhelo,
kaj sopiras al vi tutsincere.

Jam delonge ni disiĝas fore.
mi solecas ĉiam kun ĉagreno.
Vi aperas en la songĝ' adore,
kaj ridetas al mi kun mornspleno.

Jen susuras freŝa aŭtunvento,
rememoro flagras tuj denove.
Plene de la nostalgia sento,
realigus revon mi nepove.

Supren plenan lunon mi rigardas,
l' amikecon ame mi bongardas.



Zang Kejia (1905-2004)



poeto, Zang Kejia

Kio estas la popolo?

Kio estas la popolo?
 Ĉu la popolo estas standardo?
 Laŭbezone, vi levas ĝin alte,
 senbezone, vi volvas ĝin rule.

Kio estas la popolo?
 Ĉu la popolo estas felta ĉapelo ĉifona?

Laŭbezone, vi portas ĝin sur la kapo,
 senbezone, vi tretas ĝin sub la plando.

Kio estas la popolo?
 Ĉu la popolo estas marioneto?
 Vi tiras ĝin, manipulante,
 ke ĝi moviĝu aŭ ne, ke ĝi parolu aŭ ne.

kio estas la popolo?
 Ĉu la popolo estas abstrakta termino?
 Vi uzas ĝin,
 kiel ornamon de “deklaro”, “proklamo”,
 kiel lancon kontraŭ malamiko
 kaj kiel ŝildon por si mem.

Kio estas la popolo?
 Kio estas la popolo?
 Ne necesas ke mi diru al vi,
 ĉar ili respondis
 jam per agoj.

(1945)

Vilaĝa nokto

Apenaŭ la suno subiras,
 plenaĝulo fermas infanon sub la vatita litkovrilo
 per terura rakonto,
 (tiu singarde fantazias
 la svagan ombron de eksteraj arboj
 kaj la senlime helan lunon),
 ankoraŭfoje malfortigas la lampomeĉon,
 kaj, kun la palpebroj neelporteble pezaj,
 ligante la koron kun la oreloj,
 viglatente aŭskultas la bojon de hundo.

(1923)

La tri generacioj

La filo
 banas sin en koto;
 la patro
 ŝvitas sur grundo;
 la avo
 kuŝas en tertombo.

(1942)

elĉinigis **Minosun** (Ĉinio)



esperantigita de **Paula Adúríz** (Hispanio)

Rovere Emanŭele (Italio)



Kvin kanttekstoj

tradukinto, Rovere Emanŭele

Ĉu vi solas ĉi nokton

Muziko / vortoj: R. Turk / L.Handman

Ĉu vi solas ĉi nokton kaj sopiras al mi
kaj suferas pro nia disiĝ’?
Ĉu memoras vi kiam, en somera suntago,
mi vin kisis kaj vokis vin “amo”?

Eble ŝajnas malplena nun via loĝej’,
vi imagas min vidi en la enirej’.
Se vi volas, ke mi nun revenu al vi,
diru, kara, ĉu vi solas ĉi nokton?

Mi scivolas, ĉu vi solas ĉi nokton.
Laŭ onidiro, la vivo estas scenejo en kiu ĉiuj
devas plenumi iun rolon kaj nia rolo estis,
ke mi enamiĝu al vi kaj, ke vi estu mia amo.

En la “Akto unu” okazis nia renkontiĝo:
mi amis vin je la unua rigardo
kaj vi ludis vian rolon perfekte,
sen perdi eĉ unu eldiraĵon.

Poste venis la “Akto dua”: mi ne scias kiel,

amo mia, vi komencis ŝanĝiĝi kaj agi strange,
 tamen vi ĉiam diris, ke vi amas min,
 dum la realo montris, ke vi mensogas.
 Kiel ajn, mi preferus daŭrigi
 eltenante viajn mensogojn anstataŭ vivi sen vi.

Nun la scenejo estas nuda... restas ĉi tie mi sola,
 dum nur malpleno ĉirkaŭas min kaj, se vi ne revenos al mi,
 oni povas faligi la kurtenon.
 Se vi volas, ke mi nun revenu al vi, diru, kara, ĉu vi solas ĉi
 nokton?

Marina

Muziko / vortoj: R. Granata

Mi enamiĝis arde al Marina,
 knabino vere bela, ege ina,
 sed ŝi rifuzis miajn amferojn:
 kion mi faru por konkeri ŝin?
 Renkontis mi ŝin sola iun tagon,
 haltigis preskaŭ mia kor' la pulson.
 Apenaŭ mi deklaris mian senton:
 ŝi ĉirkaŭbrakis kaj tuj kisis min.

Marina, Marina, Marina, mi volas edziĝi al vi.
 Marina, Marina, Marina, mi volas edziĝi al vi.
 Karulino mia, mi petas "min ne lasu, tiel vi min ruinigus,
 ho ne, ne, ne, ne, ne".
 Karulino mia, mi petas "min ne lasu, tiel vi min ruinigus,
 ho ne, ne, ne, ne, ne,
 Marina, ne, ne, ne! Marina, ne, ne, ne ..."

Mia preĝo

Muziko / vortoj: Boulanger / J. Kennedy

Post la fin' de l' krepusk', ne pepas plu birdetoj.
 Ĉe l'komenc' de la nokt', jen vi en mia kor',

kaj ĝin vi plenigas dum mi por vi preĝas.

Mi preĝas kaj sentas vin kun mi, je la fin' de la tag',
en paradiza rev'.

Mia preĝo: ekstazo de l' ĉiel', dum la mond' estas for
kaj kun mi via kor'.

L'animoj niaj spiras kune ĉi nokte
kaj vi flustras la dolĉajn vortojn, kiuj ĝojigas min.

Mia preĝo kaj via la respond' daŭros same fidelaj,
ĝis la fin' de la vivo ni neniam disiĝos,
ene de mia preĝo. Mia preĝo!

La tango de la rozoj

Muziko / vortoj: A. Bottero/F. Schreier

Tie, en la ĝarden' de rozoj,
naskiĝis granda amo,
okazis kisoj, aŭdacaj tuŝoj
kaj la frenezo de la pasi'.

“Amu min” ŝi flustras arde
kaj la deziro tremigas ŝin,
dum ŝvebas, en mallum',
de rozoj la parfum'.

Amu min, kisu min kun pasio,
prenu min kaj stringu min kun ardo.
Pluku min, similas mia vivo floran,
ĝi frue floras, frue velkas: jen amo mia por vi.

Poste, venis malĝoja tago,
finiĝis tiu amo
samkiel rozo de frost' mortinta,
kies parfumo ne ŝvebas plu.

En ĝardeno sen plu rozoj,
ŝi konsumiĝas en malesper',
plorante pro ĉagren', dum ĉas la refren'.

Amu min, kisu min kun pasio,
prenu min kaj stringu min kun ardo.
Pluku min, similas mia vivo floron,
ĝi frue floras, frue velkas: jen amo mia por vi.

La domo de naskiĝanta suno

Muziko / vortoj: Anonima

Ekzistas dom' en Novorlean'
nomata "l'Naskiĝanta Sun'".
Estis tie de junuloj mil la ruin',
eĉ por mi, sen honto, sen pun'.

Tajloro estis panjo,
ŝi kudris por mi novan ĝinzon
kaj estis kartludisto paĉjo,
tie, en Novorleano.

Jam nur bezonas la kartludist'
kofron kun ludkartoj, vestaĵoj
kaj fariĝas feliĉa por li la ekzist'
nur se abundas drinkaĵoj.

Patrinoj, do, admonu
la filojn viajn nun,
ke l'vivon ili ne bruligu
en la Dom' de l'Naskiĝanta Sun'.

Mi sidas jam en trajno,
min vokas Novorleano,
al la esper' pri luda gajno
min ligas la kateno.

Jes, estas dom' en Novorlean'
nomata "l'Naskiĝanta Sun'".
Estis tie de junuloj mil la ruin',
eĉ por mi, sen honto sen pun'.
Eĉ por mi, sen honto, sen puno.

Wang Wei (693-701 aŭ 761)



poeto, Wang Wei

Dek ok poemoj

Kiam s-ro Wang Wei apenaŭ atingis la adoltiĝan aĝon, li jam ĝuis famon de beletristo. Li bone konis muzikon kaj estis lerta en ludo de bivo. Wang Wei komunikigis inter nobeloj kaj aristokratoj, kaj la princo Qi precipe alte taksis lin.

Siatempe Zhang Jiugao, kandidato por la metropola ekzameno, ĝuis grandan famon. Luj ofte vizitis al la domo de la princino Taiping kaj prezentis verkojn de Zhang Jiugao rekomendi. La princino do skribis leteron al la ĉef-ekzamenanto de la metropola ekzameno ke li donu la ĉampionecon al Zhang Jiugao.

Komence ankaŭ Wang Wei volis partopreni la ekzamenon. Li raportis la koncernan informon al la princo Qi kaj petis lian helpon.

La princo diris: "Kontraŭ la potenco kaj nobla Princino, vi neniel povus rivali, tamen mi volonte helpu al vi. Unue vi elektu kaj kopiu dekon da elstaraj poemoj el viaj malnovaj verkoj; kaj preparu vin por bivludo pri sentimentala ario."

Laŭ ordono de la princo Qi, Wang Wei alvenis efektive post kvin tagoj.

Princo Qi diris al Wang Wei: "Se vi kiel ordinara klerulo petis aŭdiencon de la princino, ŝi certe rifuzos. Ĉu vi konsentus agi laŭ mia aranĝo?"

Wang Wei respondis: "Jes, volonte!"

Princo Qi do igis ke Wang Wei alivestigi sin per luksaj vestaĵoj, kaj kune kun li vizitis al la domo de la princino portante bivon.

Princo Qi diris al la princino Taiping: "Profitante la ŝancon ke vi venas el la palaco nun mi vizitas vian domon. Mi kunportas ne nur bonan vinon sed ankaŭ belan muzikon."

La princino Taiping do ordonis aranĝi festenon kaj prezenton de dancado.

Wang Wei aspektis kaj bela kaj blanka.

Kapretornante la princino ekvidis lin kaj ekdemandis al Princo Qi: "Kiu estas tiu junulo?"

Princo Qi respondis ke tiu estas bonkonanto de muziko, kaj ordonis lin ludi solon de bivo.

Wang Wei ludis la bivon tiel triste ke ĉiuj aŭskultantoj sentis kortuŝiĝon.

Princino demandis: "Kiel nomiĝas tiu muzikpeco?"

Wang Wei respondis: "Yulunpao."

Princino sentas ĝin stranga.

Kaj princo Qi rekomendis dirante ke tiu klerulo ne nur majstras pri muziko, sed ankaŭ estas senrivala en poezio kaj verkado.

Princino sentas ankoraŭ pli grandan admiron kaj demandis al Wang Wei: "Ĉu vi havas verkaĵojn?"

Kaj Wang Wei tuj prenis el sia sino la pretajn verkaĵojn kaj humile prezentis al la princino.

Leginte tiuj poemojn, la princino kun granda miro diris: "Ho, tiuj poemoj estas ofte legataj de junuloj kiaj mia filo kaj Zhang Jiugao. Ni ĉiam prenis ilin verkoj de antikvaj poetoj, kaj neniam atendis ke tio estas el via plumo."

La princino ordonis ke Wang Wei ŝanĝu sian veston kaj sidiĝu al la honora ĉefseĝo.

Wang Wei kun bela aspekto, senĝena konduto kaj parolo plena de perfekta arteco, vekis admiron ĉe la ĉeestantoj altranguloj.

Kaj princo Qi diris atentige: "Se Wang Wei aperos ĉijare kiel la ĉampiono en la metropola ekzameno, tio estos gloro de la tuta imperio."

La princino demandis, "Kial ne lasu lin partopreni en la ekzameno konkuri?"

Princo Qi respondis: "Li ne volentas partopreni sen rekomendo por la ĉampioneco. Kaj mi aŭdis ke vi jam faris tian rekomendon por Zhang Jiugao."

La princino ekridis, dirante: "Fakte mi ne emis interveni en tia afero de junuloj. Tamen oni petis min, kaj mi vole-nevole devis fari."

Sin turnante al Wang Wei, la princino diris: "Vi estas vere merita. Mi nepre faru ion por vi."

Wang Wei humile dankis al la princino. La princino alvenigis la ĉefekzamenanton al ŝia domo kaj pere de sia servistino transdoni sian opinion pri la ĉampioneco.

Wang Wei do partoprenis la metropolan ekzamenon kaj gajnis la ĉampionecon. Poste Wang Wei funkciis kiel ĉefo de institucio pri muziko, sed estis punata per deoficigo pro la kulpo instrui al dancistinoj la dancon *Flava Leono*. Tian dancon oni ludis ĉiam unuope.

En lastaj jaroj de Tianbao-erao (742-756), la ribelaj trupoj de An Lushan faligis la ĉefurbon Chang'an. Wang Wei, Zheng Qian, Zhang Tong k.a. kapitulacis kaj funkciis kiel korteganoj de An Lushan. Poste, Zhang Ji forpelis la ribelan An Lushan, reokupis la ĉefurbon Chang'an, kaj arestis tiujn kapitulacintajn korteganojn, malliberigis ilin en la malnova domo de Yang Guozhong en Xuanyang-strateto. Cui Yuan invitis Wang Wei pentri sur muron. Siatempe Cui Yuan estis rigardata kiel grava altrangulo. Zheng Qian, Zhang Tong k.a. esperis ke li savu ilin reliberigitaj.

Wang Wei tre lertis en pentrado kaj li pentris kiel kun helpo de feoj. Sekve Zheng Qian kaj ceteraj ricevis favoran traktadon. Eĉ punate per ekzilo ili havis pli bonan celokon.

Nun la domo en Chongyi-strateto, Chang'an, kiun aĉetis la premiero Dou, ja estis la malnova loĝejo de s-ro Cui Yuan. Kaj la pentraĵoj far Wang Wei nun ankoraŭ vidiĝas sur muro.

Kiam la ministro ankoraŭ vivis, Wang Wei funkciis kiel cenzoro.

Kiam An Lushan okupis la ĉefurbon Chang'an, li nomumis Wang Wei kortegano en la pupa reĝimo. Post kiam An Lushan estis subigita, s-ro Fanjin funkciis kiel la vickomandanto en la norda ĉefurbo Taiyuan. Li petis la permeson ke li kompensu la krimon de Wang Wei per sia lordrango.

Tiel al Wang Wei estis senigita la mortpuno, kaj li iom post iom promociiĝis ĝis vic-ministro.

Wang Wei aĉetis Lantian domon kaj agrojn kaj vivis en profunda studo pri budaismaj sutroj.

— *el la Ampleksa Antologio de Taiping, volumo 179*

Ĉe Adiaŭo al Amiko

"Kien vi iros?" mi dediĉas vinon
ĉe disiĝ' descendinte de ĉevalo.
Respondis vi, ke pro la elreviĝo
vi ermitiĝos al suda montvalo.
Adiaŭ! Ho, mi ne demandu plue!
Senfine blankos nur la nub-ualo.

Preter Persikfloroj

Fiŝboato flosas laŭ printempa monto.
Tra brakum' de persikfloroj la veturo.
Aprecante arbajn ruĝojn li alvenas
riverfinon, Jen: nenia homa spuro.

Tra mont-aperturo pita kaj obskura,
ekvidiĝis ebenaĵoj infinitaj.
Fore rigardate--arboj nubkisantaj,
kaj proksime: mil bambuoj dislokitaj.
La fiŝisto ekprezentis sian nomon
al lokanoj, kiuj, en vest' prafasona,
kune loĝis sur tiu persika ruo,
ĝuis sian ermitvivon paca, bona.
Sub luno, pinoj, kuŝas kvietaj domoj.
Sunleviĝe bruas kokoj, bojoj rure.
Aŭdinte venon de ekstermonta gasto,
ili kun scivol' invitis lin konkure.
Tage, stratoj bonvenigas for fal-florojn,
kaj vespere la akvovilaĝ' ĉe strando.
Pro milito ili fuĝis el hommondo,
poste do longdaŭre vivis en felando.
Kiu eldvenus mondon en la valo ?
Laŭsupoze : tie krom nuboj — nenio !
Ne konsciis la fiŝist' la lokon rara,
ĉar lin ekturmentis forta nostalgio .
Fore de l' mirgroto, poste la fiŝisto
renavigis al la loko arkadia,
kvankam kun memfid'li tamen neatendis
ke l' pejzaĝoj tie iĝis tut alia.
Siatempe li memoras bone l'vojon.
La celloko estis post kelka meandro.
Nun jam ĉie fluas persikflora akvo,
sed por ĉiam malaperis la mirlando !

Oldaĝe

Oldaĝe inklinas mi nur al kvieto,
kaj krome eksciti min povas nenio.
Revene mi do al malnova arbaro,
ĉar mankas al mi vivatut' en socio.

La pinaj ventblovoj malligas rubandon,
montluno prilumas al mi liutludon.
Se oni demandas pri karierismo,

bonvole aŭskultu fiŝkantan aludon.

La Vilao ĉe Zhongnan-monto

Mezaĝe ŝatas Vojon mi adore,
kaj loĝas olda ĉe la Suda Monto.
Ofte ekskursis sola bonhumore,
pejzaĝon ĝuis kun zenisma sponto.
Mi iris ĝis la font' de la rivero,
side aprezis pri nuba profilo.
Renkonte arbhakiston en vespero,
forĝesis revenon pro ĝojbabilo.

Zhongnan-monto

Proksimas Taiyi-monto al ĉielo,
ĝis mar' kun montoj lige en federo.
Returnen: blankas nubvualoj ŝirme,
Enen: nebul' bluas ĝis malapero.
Varias tie spacoj de la steloj.
ŝanĝiĝas nuba-suna la vetero.
Por serĉi tranoktejon en vilaĝo,
mi petas arbhakiston trans rivero.

S-ino Xi

Ne forgesi malnovan favoron
pro la nova dorlota sieĝo.
Kun okuloj larmaj al la floroj
ŝi diris nenion al Chu-reĝo.

Cerva Palisaro

Vidiĝas neniu en monto.
Nur aŭdeble homoj babilas.
Subira suno en arbaro
sur la verda musko rebrilas.

Spekti ĉasadon

En forta vent' krakadas korn-pafarko.

Ĉasas en Weicheng generalo lofe.
Tra velkaj herboj akras agl-okuloj.
Finiĝis neĝ'. Galopas facilmove.
Ĵus preter Xinfeng lia trupo kuris,
kaj fulme jam revenis al kazerno.
Rigardu al la lok' de gipfaligo —
pendas senlim' de vespera nubsterno.

Surŝtona Fluokuro

Susuras laŭ aŭtuna pluvo,
sur ŝtonoj glitas flu' rapide.
Interpuŝiĝas akvoperloj.
Arde' subiĝas surprizite.

En Montaro

Sur blankaj ŝtonoj kuras rojo.
Folioj mincas. Tago frida.
Ne pluvas en montara vojo.
De vaku' iĝis vest' humida.

Adiaŭ al printempo

Oldiĝis homo tag' post tago.
Printemp' forpasis jar' post jaro.
Drinku la tason ĝis la fino,
kaj ne bedaŭru pri l' florfalo!

Sola en Aŭtuna Nokto

Mi sidas sola, vee pri tempioj.
Baldaŭ noktmeze, en vaka salono.
En pluvo dise falas montaj fruktoj,
Sub lamp' insektoj ĉirpas de gazono.
Neeviteblas blankiĝo al haroj,
Nek gajnos oron per saĝula ŝtono.
Por fori de oldeco kaj malsanoj,
la vojo — studi pri Buda rezono.

Ŝerce Skribi Sur Roko

Ĉarma roko ĉe fonto en izolo.
Vintason tuŝe salikharoj pendas.
Se mankas al printempa vent' bonvolo,
Kial petalojn falajn blove sendas?

La Blua Rojo

En riveron Flava Floro jen fluas,
la Blua Rojo galopas senĉese.
Laŭ montoj ĝi dekmil-foje sinuas,
kuras malpli ol cent liojn loese.

Aŭdiĝas inter disaj ŝtonoj bruo.
Fone de pinoj koloras kviete.
Trapoj, nimfojdoj flosas en rojfluo,
kaj svingiĝas fragmitoj siluete.

Mia pens' delonge vagas libere,
inkline al klara rivera fluo.
Sur granda roko sidiĝu prefere,
por kontenti per la fiŝkapta ĝuo.

La Flavflora Rivero

Sinuas dekmil-foje la montpadoj.
Estos tri ripozoj en kelkaj lioj.
Retrorigarde: miaj kamaradoj
malklare vidiĝas post arbfolioj.
Falas jen pluvo sur pinoj susure,
kaj inter ŝtonoj lirle kuras fonto.
Ĉe roj' profunda babilas plezure.
Buŝfajfas sur alta supro de monto.
Diste ĉe la Suda Monto mi vidas:
nebule disŝutiĝas blanka roso,
ĉe horizont' altaĵo bela sidas,
ombras arbaro en verda etoso.
Post longa tedado de sufokĝeno,
nun malaperas jam ĉia ĉagreno!

Landlime

Je dek lioj ĉeval-galopo.
 Je kvin lioj urĝa vip-svingo.
 Ke Jiuquan hunoj jam sieĝis,
 jen militraporta atingo.
 Neĝo flugas super montaro,
 dum alarma fajro-estingo.

Portreto de Cui Xingzong

La portreto pentras vin en junaĝo.
 sed vi jam oldas post forpas' de jaroj.
 Nun novaj konatoj ankoraŭ scias
 multe pri viaj malnovaj bonfaroj.

Disiĝo en Montaro

Post la disiĝo en montaro,
 fermis heĝon en vesperhoru.
 Herboj reverdos venontjare,
 ĉu vi ne revenos, sinjoro?

Sendite al Landlimo

Kien kaleŝo mia veturcelas?
 Al landlimo pro diplomat-afero.
 Kiel erigerono en ventblovo,
 aŭ norden fluga sovaĝa ansero.
 Soleca fumo rektas en dezerto,
 rondas suno super longa rivero.
 Ĉe renkont' informas rajdanta skolto:
 Komandas generalo en front-sfero.



elĉinigiŝ **Guozhu** (Ĉinio)

Luiza Carol (Israelo)



Malnaskiĝtago

Tiu ĉi estas fantazia ŝerco, pri utopia evento kiu okazas en la jaro 3144. La ĉefa rolulo estas s-ino Lunalum', komedia aktorino kaj verkistino naskita sur la planedo Tero. La lasta tago de ŝia vivo, ŝia tiel nomata "malnaskiĝtago", okazas en iu imaga planedo, en la

aŭtorino, Luiza Carol

imaga urbo Obru de la imaga lando Odnalio. La alia rolulo estas la raportist(in)o kiu intervjuas ŝin. En tiu imaga lando de la estonto, ĉiu homo kapablas uzi sian naturan provizon de vivenergio laŭ konstanta maniero, ĝis la vivofino. Tiel, oni povas forpasi sana, ĝuante sian vivenergion ĝis la lasta guto. La homa korpo funkcias bonorde ĝis sia natura fino, samkiel aparato kiu funkcius bonorde ĝis elĉerpiĝus sia neanstataŭebla baterio.

Dekoracio: floroj kaj balonoj.

Roluloj:

1. Raportist(in)o (R)
2. S-ino Lunalum', komedia aktorino kaj verkistino (L)

R: Saluton, karaj televidspektantoj de la unua televidkanalo de Odnalio. Jen rekta elsendo el la hotelo "Bonhumoro" en la urbo Obru. Ni troviĝas en la plej eleganta ejo de la hotelo: la Adiaŭa Salono. Ni festas la baldaŭan vojaĝon al la transmondo, farota de unu el la plej famaj komediaj aktorinoj de la Kosma Federacio : S-ino Lunalum'!

[*Aplaŭdoj. S-ino Lunalum' eniras la scenejon. Ŝi ŝajnas tre juna, estas brile kaj gaje vestita, ridetanta, tenanta etan hundon en la brakoj. La hundo havas helkolorajn rubandojn.*]

Kara S-ino, laŭ la tradicio de Odnalio, ni, viaj admirantoj, deziras al vi tutkore:
ĜOJAN MALNASKIĜTAGON!

[*Aplaŭdoj. La spektantoj kantas kune: "Ĝojan malnaskiĝtag'! Ĝojan malnaskiĝtag'!
Ĝojan tag' kara Lunlum'! Ĝojan malnaskiĝtag'!"*]

L: Dankon al ĉiuj, kaj apartan dankon al la geamikoj de la planedo Tero, kiuj faris tiom longan vojaĝon ĝis ĉi tien, nur por ĝojigi min dum mia lasta tago en ĉi-vivo. La planedo Tero estas mia denaska planedo, kaj mia koro estas por ĉiam ligita de ĝi.
R: Nun, ni aŭskultu la adiaŭajn vortojn pretigitajn de nia kara vojaĝonto.

L: Karaj geamikoj! Hodiaŭ, mi ĝojas prezenti al vi miajn lastajn tri ŝercojn, kiujn mi pretigis por vi dum multaj jaroj. Jen mia unua ŝerco. Mi naskiĝis en la jaro 3012 laŭ la kalendaro de la planedo Tero. Tio signifas, ke mi ne aĝas 97 teranajn jarojn, kiel la amaskomunikiloj anoncis antaŭ nelonge. Mi fakte estas 132-jara, laŭ la sama kalendaro. Mi preparis tiun ŝercon por provi konvinki la publikon, ke niatempe, danke al niaj geniaj kuracistoj, homoj post la aĝo de 120 teranaj jaroj ja kapablas resti aktivaj se ili tion deziras. (*Aplaŭdoj*) Jen mia dua ŝerco: mi ne aspektas kiel vi konas min laŭ la televidekrano. Tiu estis ĝis nun mia plej grava sekreto. Ekde la aĝo de 50, kiam mi debutis en televida staranta komedio, mi publike portas la maskon nomitan "S-ino Linakum", faritan de la firmao "Paralelvivo". Nur sursceneje kaj surekrane mi portis ĝin. Kompreneble, mi portis ĝin ankaŭ kiam mi akceptis intervjuojn, do mi portas ĝin ankaŭ nun. La resto de la tempo mi vivis trankvile kaj diskrete, sen masko kaj sen altiri la intereson de klaĉemuloj.

R: Mi... ne komprenas... kiel... kial...

L: Tio estas simpla afero: S-ino Lunalum' estas nur rolo, kiun mi mem kreis kaj ankaŭ ludis dum 82 jaroj. Mia plej interesa rolo ĝi estis! Mi ludis rolon de aktorino, kiu siavice estis ludanta diversajn komikajn rolojn sursceneje kaj surekrane. Sed la resto de la tempo estis mia privata tempo, kiun mi rajtas protekti de scivolemuloj kaj klaĉemuloj. Kompreneble, mia vera hejma adreso estas sekreta por la publiko ...

R: Kaj... kaj... kio pri viaj 28 geedziĝoj kaj eksedziĝoj?

L: Ho, ĉio rilate mian privatan vivon estis fikcio. Mi intence preparis tiun ĉi ŝercon por primoki la klaĉemulojn.

R: Ĉio? Ĉu vere ĉio estis ludo?!

L: Jes. Ĉio. Mi ne havis ion ajn hontindan por kaŝi pri mia persona vivo. Sed mi volis vivi diskrete, trankvile, sen ĝeni mian familion. Tial mi ne volis permesi al la raportistoj kaj raportistinoj eniri mian personan vivon. Fakte, mia vivo estis tre banala. Mi edziĝis nur unufoje. La plej gravaj momentoj de mia vivo okazis kiam mi iĝis edzino, patrino, bopatrino, avino, praavino kaj pra-praavino. Pri la malĝojoj, ne indas paroli dum festa momento. Mi havis la plej banalan personan vivon kiun

oni povas imagi! La raportistoj ja povas sufiĉe multe komenti pri miaj starantaj komedioj kiujn mi improvizis kaj pri la filmoj kies scenarojn mi kreis kaj kies ĉefa protagonisto mi estis. Kiuj ne kapablas komenti arton, tiuj ne nepre devas paroli pri la privataj vivoj de la artistoj anstataŭe, ĉu ne?

R: Sed... kio pri viaj fikciaj edzoj? Ĉu ankaŭ ili portis maskojn?

L: Jes. Ili estas aktoroj, kiujn oni dungis por ludi en tiu ĉi interaktiva spektaklo.

R: Ĉu ĉion, kion ni konas pri via vivo, estis "interaktiva spektaklo"?!?

L: Jes. Nur mia sekreta familia vivo estis vera.

R: Tamen... ĉu vi vere kreis 71-jaran ŝercon, nur por eviti la malĝentilecon de la televidraportistoj?! Ĉu nur pro tio?!

L: Porti maskon sursceneje kaj surekrane, estis pli oportune kaj pli malmultekoste ol pagi fortajn gardistojn kiuj akompanu min ĉiupaŝe. Vi certe scias, ke tiaj maskoj ja estas uzataj pli kaj pli ofte en la kinoarto niatempe. Krome, pli kaj pli multaj geaktoroj kaj gekantistoj en ĉiuj planedoj de la Kosma Federacio uzas ilin por protekti siajn privatajn vivojn. Mi ne estas la sola. Mi ŝategis ludi por tiu ĉi interaktiva ŝerco. Ĝi estis mia plej amuza rolo.

R: Sed vi mem kreis viajn rolojn, ĉu ne? Vi ja estis verkistino kaj aktorino, ĉu ne?

L: Jes. Tio estis mia profesio, do S-ino Lunalum' havas mian realan personecon kaj ludis nur rolojn en kiuj ŝi estis ŝi mem.

R: Kion pri la tria ŝerco kiun vi anoncis ?

L: Vi ĉiuj konas mian hundon Jojo, ĉu ne?

R: Certe! Jojo estas la plej fama hundo de Odnalujo! Fotoj pri li aperis en dekoj da revuoj kaj sur skatoloj de hundmanĝaĵoj! Ĝi estas preskaŭ same fama kiel vi!

L: Bonege! Nun aŭskultu. Fakte, Jojo ne estas hundo. Li estas kato. Li portas maskon, faritan de la firmao "Paralelvivo". (*Ŝi piruetas kaj vidigas katon anstataŭ hundon. Aplauĉoj.*)

R: Ĉu vi volas aldoni alian mesaĝon por la publiko?

L: Jes. Mi tutkore dankas al ĉiuj brilaj kuracistoj zorgintaj pri la sano de mia materia korpo. Ili ebligis al mi ĝui la vivon plene ĝis la lasta guto de mia natura energistoko. (*paŭzeto*) Mi tutkore dankas mian instruistaron de la unua klaso de bazlernejo, kiu estis la modelo de mia tuta vivo. Ŝi jam troviĝas en la transmondo, sed en mia koro mi iel sentas kvazaŭ ŝi iel ĉeestas nun. Mi ĉiam kondukis tiel, ke ŝi povu priferi pri mi hodiaŭ. Ŝi transdonis al mi sian vivoĝojon, sian ludemon, sian malmalican ŝercemon kaj sian malmalican kreemon. (*paŭzeto*) Mi dankas al la teamo de metapsikologoj, kiuj liberigis min de senracia timo pri la baldaŭa malnaskiĝo. Ili saĝe kaj ame preparis min por la malnaskiĝo fine de ĉi-tago, kaj samtempe por la naskiĝo en la nova mistera mondo de la transvivo. Danke al ili, mi atendas la aventurojn de la onta mondo kun scivolo kaj kuraĝo. (*paŭzeto*) Dankon, s-r(in)o raportist(in)o. Nun mi petas vin fini la intervjuon kaj lasi min retiriĝi, por pasigi miajn lastajn horojn en la intimeco de mia kara familio.

Kato: Miaŭ!

(Fino)

John Huang (Kanado)



aŭtoro, John Huang

Turisma vojaĝo tra Tanzanio

(2)

Dum mia vojaĝo tra la Tanzania Serengeti daŭris en la komenco de aŭgusto 2024, mi estis profunde kaptita de la mirinda faŭno, imponaj pejzaĝoj, kaj la lokaj masaiaj homoj. Serengeti estas loko, kie ŝajnas, ke la tempo haltas, permesante al vi plene mergiĝi en la ĉirkaŭanta natura beleco. Dum tiuj tagoj, mi kaptis fotojn, kiuj ne nur reflektas la esencon de Serengeti – ĝiajn bestojn, ĝian trankvilon, kaj ĝian sovaĝan belecon, kiu daŭras jam dum milionoj da jaroj – sed ankaŭ la vivon de la lokaj masaioj, kiuj dum generacioj vivis en harmonio kun ĉi tiu tero. Ĉiu foto, kiun mi prenis, estas unika momento, plena de vivo, energio, kulturo kaj miro.

1. Luda Paviano



En unu freŝa mateno, kiam la suno komencis varmigi la vastajn ebenaĵojn, mi observis grupon de pavianoj, kiuj lerte moviĝis tra la arboj. Unu aparte kaptis mian atenton: juna paviano, kiu pendis de maldika branĉo kaj svingiĝis libere tien kaj reen, kvazaŭ ĝuante la momenton de senzorga ludado. La klara, blua ĉielo en la fono perfekte kadrigis ĉi tiun scenon, montrante la ludeman, lertan naturon de la pavianoj. Pavianoj estas konataj pro sia granda inteligenteco kaj fortaj sociaj ligoj, kaj ĉi tiu momento plene reflektis la vigecon kaj sendanĝerecon de la vivo en Serengeti.

2. Hipopotamoj en la Akvo



Pli malfrue en la tago, mi iris al proksima akvotruo, kie grupo de hipopotamoj kuŝis en la akvo. Pli ol duono de iliaj grandaj korpoj estis subakvigita, kun nur iliaj okuloj, oreloj kaj la supra parto de iliaj masivaj naztruoj videblaj super la akvosurfaco. La akvo lante moviĝis ĉirkaŭ ili, spegulante ilian preskaŭ tute senmovan staton. Inter la hipopotamoj, du ŝajne interagis, tuŝante sin per iliaj kapoj, kvazaŭ silente komunikante. Hipopotamoj pasigas multan tempon en la akvo por malvarmetiĝi sub la varma afrika suno, kaj kvankam la sceno estis kvietaj kaj paciga, oni povus senti la grandan forton kaj latentajn kapablojn de ĉi tiuj imponaj bestoj, eĉ en ilia ŝajna malstreĉiteco.

3. La Potenco de Hipopotamo



Dum mi observis la grupon, unu hipopotamo subite larĝe malfermis sian buŝon, montrante siajn grandajn dentojn kaj masivajn makzelojn. La larĝeco de ĝia buŝo estis tre impona, kaj la longaj, akraj dentegoj elstaris minace. Nia gvidisto klarigis, ke ĉi tiu movo estas averta gesto, montranta sian dominadon kaj intencanta forpuŝi ajnajn minacojn. Hipopotamoj ofte estas konsiderataj kvietaj kaj pacaj bestoj, sed ĉi tiu momento memorigis min pri ilia terura forto kaj la ebla danĝero, kiun ili povas prezenti. Mi sentis min tre feliĉa, ke mi povis uzi longan lenson por fotadi la hipopotamon de sekura distanco, ĉar ĉi tiuj bestoj estas konataj kiel tre teritoria kaj povas esti tre agresemaj. Fakte, kvankam oni ofte pensas pri grandaj predantoj kiel la plej danĝeraj, estas la hipopotamo, kiu kaŭzas plej multajn homajn mortojn en Afriko. Tiu imponeco kaj forto estas egale fascina kaj timiga, precipe kiam ili sentas sin minacataj aŭ provokataj. Ĉi tiu elmonro de potenco estis forta memorigilo pri la danĝero, kiun ĉi tiuj bestoj povas prezenti, eĉ en trankvila akvotruo.

4. Simbiozo en la Naturo



Dum ni daŭrigis la vojaĝon, mi rimarkis alian hipopotamon promenantan tra la vasta herbaro, for de la kutima akvofonto. Sur ĝia larĝa dorso sidis grupo da birdoj, verŝajne bokspecoj, kiuj estis fervore manĝantaj parazitojn de ĝia haŭto. La kontrasto inter la masiva hipopotamo kaj la malgrandaj, viglaj birdoj estis rimarkinda. Ĉi tiuj birdoj ne nur profitas de la libera manĝaĵo, sed ankaŭ ŝajnis trovi komforton kaj sekurecon sur la dorso de la hipopotamo. Nia gvidisto klarigis, ke ĉi tiu rilato inter la birdoj kaj la hipopotamoj estas klasika ekzemplo de simbioza interagado en la naturo: la birdoj purigas la hipopotamojn de ĝenaj parazitoj, dum la hipopotamo provizas al ili stabilan platformon kaj fonton de nutraĵo. Ĉi tiu sceno memorigis min pri la kompleksa interligiteco de la vivo en Serengeti, kie ĉiu besto ludas gravan rolon en la ekosistemo, kaj dependas de aliaj por supervivo. Ĉi tiu interagado, kvankam subtila, estis klara ekzemplo de la perfekta harmonio, kiu ekzistas inter malsamaj specioj en ĉi tiu sovaĝa, bela pejzaĝo.

5. Gracia Girafino Transiranta



Dum ni veturis pli profunden en Serengeti, la vastaj, ŝajne senfinaj ebenaĵoj malfermiĝis antaŭ ni, kun kelkaj akaciaj arboj punktantaj la horizonton. Subite, la silueto de majesta ĝirafino aperis antaŭe, trankvile transirante la sablan vojon. Ĝi estis mirinda vidaĵo—ĝia longa kolo elegante streĉiĝis direkte al la ĉielo, dum ĝiaj kruroj moviĝis malrapide kaj intence. Nia veturilo haltis, dum ni observis ĉi tiun imponan estaĵon paŝi trans la vojon. La ĝirafino ŝajnis tute neĝenita de nia ĉeesto, rapide ekrigardante nin antaŭ ol daŭrigi sian nehasteblan vojaĝon. La grandeco de la ĝirafino

estis frapa kompare kun nia veturilo; ĝi ŝajnis superi ĉion ĉirkaŭ ĝi. Nia gvidisto klarigis, ke ĝirafoj ofte moviĝas laŭ sia propra ritmo, ne facile ĝenataj de la agadoj de homoj aŭ aliaj bestoj. Ĉi tiu ĝirafo ŝajnis enkorpigi la esencon de Serengeti mem— vasta, senfina, kaj trankvila. Kiam ĝi finfine malaperis en la altan herbon ĉe la alia flanko de la vojo, mi ne povis ne senti profundan ligan al ĉi tiu majesta besto, mallongan momenton de kvieteco meze de la sovaĝejo. La pura gracio kaj trankvilo de ĉi tiu renkonto lasis daŭran impreson sur mi, rememorigante la silentan belecon, kiu prosperas en Serengeti.

6. Girafao en la Malferma Ebenaĵo



Pli poste dum la tago, mi renkontis ĝirafon starantan sola en la vastaj ebenaĵoj de Serengeti, ĉirkaŭita de ikonecaj akaciaj arboj. La ĝirafao staris senmove, kun la longa kolo leviĝanta alte super la herbejoj, rigardante en la distancon, kvazaŭ pripensante la senfinan horizonton, kiu ankaŭ logis min. Ĝia gracia tamen potenca ĉeesto enkorpigis la sovaĝan belecon de ĉi tiu pejzaĝo. La akaciaj arboj, kun siaj ombreloformaj kanopeoj, perfekte kadris la scenon, aldonante ekvilibron kaj harmonion. La oraj herboj sube molmove balanciĝis en la varma vento, ĵetante molan lumon super la tuta pejzaĝo. En tiu trankvila momento, la ĝirafao ŝajnis simboli la senfinan pacon de Serengeti, viva reprezentanto de la ligo inter bestoj kaj ilia medio. Dum mi observis, mi sentis profundan trankvilon, kvazaŭ la ĝirafao kaj la pejzaĝo kunfandiĝis en unu tuton, reflektante la purecon kaj grandiozecon de la naturo en ĉi tiu netuŝita sovaĝejo.

7. La Eleganta Zebro ĉe la Krepusko en Serengeti



Je la krepusko, dum la suno komencis subiri, kovrante la ebenaĵojn de Serengeti per molaj nuancoj de oranĝo kaj rozkoloro, mi vidis zebbron gracie kurantan tra la altaj herboj. La malfortiĝanta lumo pentris la ĉielon per varmaj koloroj, kreante serenan kaj trankvilan atmosferon. La nigraj kaj blankaj strioj de la zebro vive kontrastis kontraŭ la pastelaj nuancoj de la vespero. Ĝi moviĝis kun flua gracio, ĉiu paŝo moviĝis malpeze kaj senpene, kvazaŭ ĝi glitis tra la pejzaĝo. La flirtanta vosto de la zebro aldonis ludeman energion al la pacema krepusko. Dum la tago finiĝis, ĉi tiu momento kaptis la sovaĝan belecon de Serengeti, perfekta miksaĵo de eleganteco kaj sovaĝeco. La silento de la alvenanta nokto nur plifortigis la movojn de la zebro, igante la scenon preskaŭ superreala. Estis unu el tiuj raraj momentoj, kiam la tempo ŝajnis malrapidiĝi, permesante al mi plene aprezi la harmonion inter la besto kaj ĝia ĉirkaŭaĵo.

8. La Reĝo de Serengeti



Dum mia vojaĝo tra Serengeti, unu el la plej memorindaj momentoj estis renkontiĝi kun potenca leono vaganta tra la alta herbo. Lia majestaj kolhararo, brila sub la posttagmeza suno, tuj kaptis mian atenton. Liaj movoj estis trankvilaj kaj decidaj, elmontrante la aŭtoritaton de la reĝo de la savano. La leono paŝis tra sia teritorio kun memfido, kvazaŭ li sciis, ke li estas la nekontestebla reganto de ĉi tiu pejzaĝo. Rigardi ĉi tiun imponan predanton en sia natura medio estis senkompara sperto. Lia okuloj estis fiksita sur la horizonto, kvazaŭ li esplorus sian regnon kun atento kaj trankvilo. Dum mi observis ĉi tiun scenon, mi sentis lian grandegan potencon kaj la respekton, kiun li inspiris. Ĉiu paŝo reflektis lian perfektan harmonion kun la ĉirkaŭa pejzaĝo. Ĉi tiu renkonto estis unu el tiuj specialaj momentoj, kiuj memorigas nin pri la sovaĝeco kaj beleco de la natura mondo.

9. Striaj Mangustoj en Moviĝo



Dum mi marŝis tra la seka pejzaĝo de Serengeti, unu el la unuaj bestoj, kiuj kaptis mian atenton, estis paro da striaj mangustoj. Ili moviĝis rapide kaj sinkrone tra la sun-bruligita herbo, verŝajne serĉante insektojn aŭ malgrandajn predojn. La strioj sur iliaj felaj korpoj perfekte kamuflis ilin kontraŭ la fono de la flava herbo, farante ilin preskaŭ nevideblaj por predantoj. Kvankam mangustoj estas malgrandaj, ili estas konataj pro sia inteligenteco kaj socia naturo. Ĉi tiuj du laboris kune, tiel demonstrante la fortan kunlaboran ligan, kiu ekzistas inter ili. La maniero kiel ili kunordigis siajn movojn estis fascina, kaj mi povis senti la sekurecon kaj forton, kiuj venas de ilia grupo.

10. La Ĉielarka Agamo



Unu el la plej okulfrapaj momentoj de la vojaĝo, verŝajne, estis kiam mi renkontis la mireginde koloran ĉielarkan agamon. Ĝia frapa rozkolora kapo kaj blua korpo tuj kaptis mian atenton. La agamo kviete kuŝis sur varma trunko, kvazaŭ ĝi plene ĝuis la sunlumon. Ĉi tiuj lacertoj estas famaj pro siaj brilaj koloroj, precipe dum la pariĝa sezono, kiam la maskloj montras siajn plej intensajn kaj allogajn nuancojn por logi kunulojn. Dum mi rigardis la agamon, mi ne povis ne senti admiron pri la mirinda diverseco de naturo. La brilaj rozaj kaj bluaj koloroj de la agamo estis tiel elstaraj sub la suno, ke ĝi ŝajnis kvazaŭ vivanta arko de ĉielarko en la senakva pejzaĝo de Serengeti. Ĝi trankvile sunumis, kvazaŭ fierante pri sia beleco. Tiaj serenaj momentoj instigas vin aprezi la pli subtilajn, tamen same belajn, aspektojn de la faŭno en Serengeti.

11. Agamo kaj Brilsturno en Interagado



Post kiam mi unue rimarkis la ĉielarkan agamon sunumi, ĝi poste moviĝis al nova loko, kie ĝi renkontis brilegan stelon. La sama agamo, kun siaj rozkoloraj kaj bluaj skvamoj, nun kontrastis eĉ pli bele kun la brilsturno, kies irizaj bluaj kaj oranĝaj plumoj kaptis la sunlumon kaj brilis intense. Dum la agamo paŝadis trankvile sur la grundo, la brilsturno rigardis ĝin kun scivolema esprimo, kvazaŭ mirigita de ĝia kolorplena aspekto. La du bestoj staris tre proksime, sed iliaj agoj montris neniun signon de malamikeco, anstataŭe ili ŝajnis komplete komfortaj kun la ĉeesto de unu la alia. Ĉi tiu sceno, en kiu la brilsturno kaj la agamo interagis, memorigis min pri la senstreĉa kunezistado de malsamaj specioj en Serengeti, kie la naturo ĉiam troviĝas en perfekta ekvilibro.

12: Bonega Brilsturno en Flugo



Post kiam la brilsturno observis la ĉielarkan agamon, ĝi finfine decidis flugi for. La momento estis subita kaj eleganta. Unu el miaj plej ŝatataj bildoj de la vojaĝo montras ĉi tiun brilsturno dum flugado. Ĝiaj bluaj, oranĝaj, kaj blankaj plumoj fariĝis iomete malklaraj dum ĝi ekflugis, sed ĝia flugo restis impona kaj gracia. Kaptante per fotilo birdon en flugo ĉiam estas defio, sed la rapideco kaj moviĝo de ĉi tiu stelo enkaptis la vigecon de la vivo en Serengeti.

13. Majestaj Flugoj sur la Serengeti Ĉielo



Post kiam la brilsturno forflugis, miaj okuloj kaptis la belan vidaĵon de du pelikanoj, majestaj birdoj, flugantaj kune super la ebenaĵoj. La du blankaj pelikanoj, kun siaj grandaj flugiloj malfermitaj, ŝajnis gliti tra la aero kun mirinda facileco. Estis io tre trankviliga en ilia sinkrona movado, kvazaŭ ili perfektigis sian flugon tra jaroj de praktiko. La sereneco de ilia flugado super la vastaj afrikaj pejzaĝoj estis kontrasto al la vigla moviĝo de la stelo, kiun mi antaŭe observis. Ĉi tiu spektaklo memorigis min pri la riĉeco de la birdaj vivoj en Serengeti, kie ĉiu momento povis oferti novan mirindaĵon.

14. Birdoj Sidantaj Sur Akacia Arbo



Posttagmeze mi kaptis per fotilo du grandajn pelikanojn sidantajn alte sur la branĉoj de delikata akacia arbo. Iliaj flugiloj iomete disvolvigitaj, ili ŝajnis pretaj ekflugi en iu ajn momento. Akaciaj arboj estas simbolo de la afrika savano, kaj vidi ĉi tiujn pelikanojn supre igis ĝin perfekta Serengeti-momento. La simpleco de ĉi tiu sceno—pelikanoj pretas ekflugi, kaj iliaj siluetoj konturitaj kontraŭ la ĉielo, kvazaŭ en ĉina pentraĵo—reliefigis la trankvilan belecon, kiun karakterigas Serengeti.

15. Masaia Virino en Ruĝa Robo



Krom la faŭno, mia vojaĝo donis al mi la ŝancon observi la lokajn masaiajn homojn, kiuj vivas en harmonia kunekzisto kun la naturo. En ĉi tiu foto, mi kaptis belan momenton de sola masaia virino, kiu staras meze de la ebenaĵo, vestita en tradiciaj ruĝaj vestaĵoj. La intenseco de la ruĝo kontrastis perfekte kun la vasta ĉirkaŭa pejzaĝo, igante ŝin elstara kvazaŭ figuro el viva pentraĵo. Ŝia pozo estis digna kaj trankvila, spegulante la forton kaj memfidon de ŝia kulturo. La masaia gento estas konata pro sia forta ligo al la tero kaj la bestoj de Serengeti, kaj ĉi tiu renkontiĝo estis pripensiga memorigilo pri la graveco de la homa historio en ĉi tiu sovaĝa regiono. Por mi, la bildo ne estis nur pri ŝia fizika ĉeesto, sed ankaŭ pri la profunda respekto, kiun ĉi tiuj homoj havas por la tero, sur kiu ili vivas.

16: Lernejanaj Knaboj en Uniformoj



Dum mi forlasis la parkon kaj komencis vojaĝi tra la vilaĝo, mi ekvidis tri junajn tanzaniajn lernejanajn, revenantajn hejmen post lerneja tago. Vestitaj en siaj netaj uniformoj, kun siaj dorsosakoj surŝultrigitaj, ili ridis kaj babilis vigle. La amikeco inter ili estis evidenta, kaj iliaj ridetoj radiis junecan senĝenemon. Mi sentis min kortuŝita de ilia senzorga ĝojo, en medio kiu, kvankam plena de sovaĝa naturo, ankaŭ estas hejmo al junaj knaboj, kiuj kreskas en ĉi tiu unika pejzaĝo. Ĉi tiu momento estis memorigilo, ke Serengeti ne nur gastigas majestajn bestojn, sed ankaŭ estas hejmo de fortikaj homaj komunumoj. La vivo ĉi tie estas kolorriĉa

teksaĵo, kaj tiuj knaboj, lokaj tanzaniaj lernejanoj, simbolis la estontecon de la regiono, kiu baldaŭ estos plena de la vigla junularo. Estis perfekta fino al mia tago, observante ĉi tiun simplan, tamen potenčan momenton de homa konekto.

Konkludo

Dum mia vojaĝo tra Serengeti, mi estis privilegia atesti la nekredeblan diversecon de vivo, kiu ekzistas en ĉi tiu mirinda pejzaĝo. De la majestaj ĝirafoj kaj viglaj pavianoj ĝis la impona ĉeesto de la leono, ĉiu momento kaptis la esencon de la afrika naturo. La Serengeti estas pli ol nur loko, ĝi estas viva ekosistemo, kie bestoj kaj homoj interagas en perfekta harmonio. La renkontiĝoj kun la loka Masaia gento, kiel la virino en tradiciaj ruĝaj vestoj, aldonis profundan homan dimension al mia sperto, memorigante min pri la longa historio de kunvivado inter homoj kaj naturo. La lernejanoj, ridantaj kaj babilantaj post la lerneja tago, simbolis la estontecon de ĉi tiu regiono, kaj mi foriris kun pli granda aprezo por la riĉa teksaĵo de vivo en Serengeti. Ĉi tiu vojaĝo estas io, kion mi ĉiam memorfestos.

(daŭrigota)

Ĉiuj fotoj en la teksto estas fotitaj de la aŭtoro mem.



La impona subiranta suno super vasta Serengeti savano radias en oranĝaj nuancoj.